

IL POPOLO CINIO

中国报道

10 1987



En sunlumo

Foto de CAJ MING



Enhavo

Reformado — la dua revolucio de Ĉinio	2
VOJAĜO LAŬ JANGZI-RIVERO (10): Nova ŝtala urbo Dukoŭ	64
JUBILEA JARO DE ESPERANTO:	
Centjara jubileo de Esperanto en Pekino	12
Ĉinio: Aplikado de Esperanto en scienc-teknika kampo	15
Por ke pli da ĉinoj lernu kaj uzu Esperanton	18
ESP-NOVAĴOJ	20
POR KOMENCANTOJ: Erinaco kaj glano; Kato kun rozario; Baleno	61
Jang Jang, nova volana stelo	29
POR VIA SANO: Masaĝo (II)	19
Li iris de la landlima urbo al la mondo.	31
NOVELO: Ŝjaŭŝjaŭ (Unua parto)	34
ĈINA LITERATURO:	
Ĉefaj poeziaj skoloj kaj iliaj poetoj en la Sudaj kaj Nordaj Dinastioj	39
Kvar poemoj de la Sudaj kaj Nordaj Dinastioj	41
Printempo de ĉinaj porinfanaj filmoj	42
ĈINAJ ARTOJ: Brodarto	23
Ŝtonaj reliefoj de Han-dinastio	48
Loĝantoj ĉe Ĉengĝong-strato en Nantong	51
TRA NIA LENSŬ: Mallarĝaj stratetoj en Suĝoŭ	45
En la "Maro de Morto"	54
Rimedo kontraŭ aids-malsano	57
ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Pri ĉinaj proverboj	59
AMUZO	50
KURANTAJ AFEROJ	62
INTER NI	72
KORESPONDI DEZIRAS	22
SUR LA KOVRILO: Inter floroj (Ujgura ĝenro)	de ĜIN ĈJEGONG
INTERNE DE LA KOVRILO: En sunlumo	Foto de CAJ MING
INTERNE DE LA DORSKOVRILO: Ĉinaj Poŝtmarkoj	
SUR LA DORSKOVRILO: La Tri Pagodoj en Junnan	Foto de HUANG TAŬPENG

Reformado — la dua revolucio de Ĉinio

Ĉinio faras reformadon, antaŭ ĉio reformadon de la ekonomia sistemo, kiu daŭris jam ok jarojn. Ĉina gvidanto Deng Ŝjaŭping nomis la nunan reformadon “la dua revolucio”. La unua revolucio de Ĉinio komenciĝis en 1921, de kiam la Komunista Partio de Ĉinio gvidis la tutlandan popolon por fari la armitan batalon per la vojo sieĝi la urbojn per la kamparo, kaj finiĝis en 1949, kiam fondiĝis la Ĉina Popola Respubliko post la venko en la tuta lando.

Kiajn ŝanĝojn alportis la okjara reformado kun tiel granda signifo? Eble utilis montri kelkajn simplajn ciferojn: Dum la periodo de 1979 ĝis 1986 la totala socia produktovaloro de Ĉinio

kreskis ĉiujare meznombre je 10.1%, interalie plej alte je 16.5% kaj plej malalte je 4.6%. La neta pokapa enspezo en la kamparo en 1986 plimultiĝis de 134 al 424 jŭanoj kaj la pokapa vivtena enspezo en la urboj pliiĝis de 316 al 828 jŭanoj, kompare kun 1978. En la ok jaroj oni havigis laboron al ĉirkaŭ sesdek milionoj da loĝantoj de urboj kaj urbetoj. Tiuj ciferoj montras, ke en la reformado la nacia ekonomio de Ĉinio stabile kreskis kaj la popola vivo de la urboj kaj kamparo pliboniĝis paŝon post paŝo. Iuj ne klare videblaj, tamen pli profundaj ŝanĝiĝoj nerimarkite aperas en pluraj ĉeneroj de la funkciantaj maŝinoj de la ekonomio, en la profundo de la socio.

Song Beifang (meze, pioniro de la reformado kaj estro de la Fabriko de Motorveturiloj de Ĝengĝoŭ, kontrolas novan aŭton.



Kampanarino Ĝu Ĉjilan (dekstre) de Ŝandong-provinco fondis vestofarejon en la reformado. Jen ŝi instruas laboristinojn.



ROMPIĜIS LA MALNOVA EKONOMIA MODELO

Pasintece Ĉinio provis gvidi la tutan socian ekonomian aktivadon per ĉioampleksa plano kaj efektiviĝi tion per administraj ordonoj. Tio estis modelo de produktaĵa ekonomio kun alta centralizismo regata de la ordona plano. La administrado laŭ tiu modelo tro emfazis la ordonan produktaĵan planon, ekskluzivis la leĝon de valoro kaj la rolon de merkato kaj rigidigis la funkciajn maŝinojn de la ekonomio.

En la reformado de la ekonomia sistemo, la kamparo la unua rompis la malnovan ekonomian modelon, abolis la sistemon de popola komunumo, organizo de unuigita registara kaj komunuma administrado, kaj restarigis subdistriktan regpotencon, disigante la registaran administradon disde la komunuma. Tiel oni ŝanĝis la antaŭan agmanieron de unuigita administrado kaj kolektiva laborado kaj kulturado de greno kaj kotono senescepte laŭ la ordona plano de la ŝtato, praktikas la respondecan sistemon de familia laŭkontrakta produktado, disponiginte la agrojn kaj produktajn rimedojn al la kamparanoj, kaj plenforte disvolvas multspecan entreprenadon kaj komercaĵan ekonomion. Rilate al la kulturata areo kaj produktokvanto de gravaj agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj, kiaj greno kaj kotono, la ŝtato donas proponitan planon anstataŭ ordona plano. El la totala produktovaloro de agrikulturo en 1986, forstumado, brutobredado, flankokupoj kaj fiŝkaptado konsistigis jam 51%. Ekde tiu jaro oni praktikas en la kamparo novan politikon de aĉetado fare de la ŝtato laŭ plano kaj kontrakto kaj entreprenoj rajtas libere vendi en merkato la produktaĵojn ekster la kontrakto, tiamaniere pli vastiĝis la sfero de merkata reguligo kaj la kampara ekonomio suriris la trakon de planizita komercaĵa ekonomio.

Depost kiam la reformo de la ekonomia sistemo etendiĝis al la urboj, ilia ekonomio rapide turniĝis al la modelo de planizita komercaĵa ekonomio. Oni aplikas multspecajn entreprenadajn metodojn kun multspecaj ekonomiaj elementoj, ekspansiigas la memstarecon de entreprenoj, starigas kaj disvolvas diversajn merkatojn, kuraĝigas entreprenojn al konkurenco kaj samtempe atentigas reguligi ekonomion per ekonomiaj kaj leĝaj rimedoj por akceli la transiron de la malnova ekonomia sistemo al la nova.

Nuntempe Ĉinio praktikas la laŭplanan administran sistemon kun planizita ekonomio



Pordomafermo akcelis la ĉinan ekonomion. La foto montras, ke ekspertoj de la Ŝipkonstrua Kompanio IHC de Nederlando kaj teknikistoj de la ŝipfabriko Maŝej de Fuĝjan-provinco de Ĉinio interkonsiliĝas pri teknika problemo.

kiel la ĉefa kaj merkata reguligita ekonomio kiel la helpa. Laŭ tiu sistemo, en la lastaj jaroj la ŝtato grandmezure reduktis la produktaĵojn administratajn per la rekta plano kaj pligrandigis la sferon kaj proporciojn de merkata reguligo. Ĝis la fino de 1986 la laŭplanaj industriaj produktaĵoj administrataj de la ŝtataj gvidaj departementoj pri planado reduktiĝis de 120 specoj al 60 kaj ilia proporcio en la industria produktovaloro reduktiĝis de 40% al 20%.

ŜANĜIĜIS LA NESIMETRIA INDUSTRIAL STRUKTURO

Pasintece agrikulturo kaj malpeza kaj peza industrioj en la ĉina ekonomio disvolviĝis ne harmonie pro la nesimetria strukturo. Sub la

malnova ekonomia sistemo mankis dum longa tempo diversaj konsumajoj. La terciara industrio el la tri grandaj industrioj serioze postigis, kio ege malfavoris al la disvolvo de produktado, oportuno de la vivo kaj dungigo de pli da homoj. La reformado reguligis la proporciojn de agrikulturo kaj malpeza kaj peza industrioj kaj tiun de la tri grandaj industrioj kaj ŝanĝis la ĵus menciitan neracian fenomenon. Sekve de tio, agrikulturaj laborantoj pli rapide sin direktas al neagrikulturaj kampoj, la marbordaj regionoj kun grandaj latentaj produktaj fortoj en orienta Ĉinio ludas pli grandan rolon, la riĉfontoj en centra kaj okcidenta Ĉinio estas laŭplane ekspluatataj kaj tiel estas formiĝanta blua plano kun racia kaj simetria dispozicio. Kompreneble, ĉefe pro historiaj kialoj, ankoraŭ ne foriĝis la neraciaj fenomenoj en la industria strukturo de la ĉina ekonomio, precipe en iuj profundaj tavoloj. Ekzemple, kvankam la manko de provizado per energio kaj krudaj materialoj iom ripariĝis (interalie elektroenergio ankoraŭ mankas), tamen ankoraŭ en povas esti kontentigita la bezono de disvolvo de la prilabora industrio kaj ankoraŭ ne akordiĝas la produkta strukturo de konsumajoj kaj la strukturo de bezono. La solvo de tiuj problemoj dependas de la plua profunda reformado.

PLURSPECAJ POSEDANTECOJ MONTRAS ĈIU SIAN KAPABLON

La reformado akcelis ŝanĝon de la posedanteca strukturo kaj rompita la monotonan modelon de la publikaj posedantecoj ŝtata kaj kolektiva. Konsiderante la ĝeneralan staton, ke malaltas la nivelo de produktaj fortoj, ne ekvilibras la disvolviĝo en diversaj regionoj kaj diversaj fakoj, persistante ĉe la publikaj posedantecoj kiel la bazo kaj daŭre disvolvante la ekonomion de tutpopola posedanteco kaj ĝian gvidan rolon, Ĉinio aktive disvolvas kolektivajn ekonomion kaj privatan ekonomion, ekonomion de kuna investado de Ĉinio kaj aliaj landoj, ekonomion de investado de aliaj landoj kaj akcian ekonomion por adaptiĝi al la bezono de disvolvo de produktaj fortoj. Ĝis la fino de 1986, en la totala industria produktovaloro la proporcio de tutpopola posedanteco reduktiĝis de 80% en 1978 al 70%, tiu de kolektiva ekonomio kreskis de malpli ol 20% al 28% kaj tiu de privata ekonomio kaj aliaj ekonomioj disvolviĝis de nulo al 2%. La industria produktovaloro de la entreprenoj de kolektiva posedanteco en 1986 estis egala al la

totala industria produktovaloro de tutpopola posedanteco en 1975. Inter la totala sumo de podetala vendo de sociaj komercaĵoj, la vendsumo de ŝtata komerco reduktiĝis de 90% en 1978 al 40% en 1986 kaj tiu de kolektiva komerco (inkluzive de provizvendaj kooperativoj) kreskis de 7.4% al 36% kaj tiu de privata kaj aliaj komercoj de 2% al 24%.

DIVERSAJ FLEKSEBLAJ METODOJ DE ENTREPRENADO

Kun la transiro de produkta ekonomio al planizita komerca ekonomio kaj kun la apartiĝo de posedanteco disde administra rajto en la entreprenoj, la monotona kaj meĥanisma formo de entreprenado estas anstataŭata de diversaj flekseblaj formoj de entreprenado.

Depost la reformado, en la kamparo 98% de la kamparanaj familioj praktikas la respondecan sistemon de laŭkontrakta produktado kun familio kiel unuo. En la urboj, laŭ malsamaj cirkonstancoj de la entreprenoj, la ŝtataj komercaj kaj industriaj entreprenoj aplikis la respondecan sistemon de laŭkontrakta laboro kaj de luigo kaj diversajn aliajn respondecajn sistemojn de entreprenado kaj iuj ekonomiaj organizoj akceptis formon de reciproka akciedo kaj kuna entreprenado. La petrolaj, karbaj, petrolkemiaj, metalurgiaj, nefer-metalaj, fervojaj, poŝtaj kaj telekomunikaj kaj civil-aviadaj entreprenoj praktikas la laŭkontraktan laborsistemon. Viglas la transversaj ekonomiaj kombinoj transentreprenaj kaj transregionaj. Aperis en la tuta lando 32 000 ekonomiaj kombinatoj.

Rezulte de la reformado, certgrade pligrandiĝis la rajto de la entreprenoj de tutpopola posedanteco, pli fortiĝis ilia respondeco kaj koncepto pri konkurenco kaj pionira spirito.

NOVA PORDOMALFERMA POLITIKO

Pro diversaj kialoj Ĉinio longtempe praktikis la pordoferman politikon, ekskluzivis la avangardajn teknikojn kaj administrajn spertojn de aliaj landoj, kio serioze katenis la disvolviĝon de la ĉina ekonomio kaj altiĝon de la teknikoj kaj administra kapablo. La okjara reformado malfermis la pordon de Ĉinio al la eksterlando. Ĉinio solene deklaris: La pordomalfermo al la eksterlando estas baza ŝtata politiko de Ĉinio. Ŝenĝen, Ŝantoŭ, Ĝuhaj kaj Ŝjamen la unuaj malfermiĝis al la eksterlando kiel specialaj ekonomiaj distriktoj, sekvis Tjanĝin, Ŝanhajo, Daljan kaj



La konstruata hidroelektrejo Tjanŝengĉjaŭ, kiu povos produkti 13.45 miliardojn da kilovatthorojn da elektro

Foto de **ŜIN HŬA**



Bazaro prosperigita de la ekonomia reformado

Foto de **ŜJŬE ĈAŬ**




La plej granda dutraka ponto sur la Hengjang-Kantona Fervojo

Foto de LI ŜUANDE


Laborlinio en la muntejo de motoroj de la Ĉina Dua Aŭtofabriko. La fabriko gajnis rimarkindajn profitojn dank' al la ekonomia reformado.


Foto de HAJ FENG



Reformado en la kamparo riĉigis la kamparanojn, kaj en la kamparo de Siĉŭan aperis sennombraj novtipaj domoj de kamparanoj.


Foto de HŬANG LUKUJ






Ĉinio rapide disvolvas sian maran petrolan industrion kaj boris multajn altproduktajn ole-gasajn putojn. Jen platformo sur maro.

Foto de LIŬ ŬENMIN





La ĝenerala muntejo por la aeroplano MD-82 kune produktata de Ĉinio kaj Usono Foto de ŬANG HONG

Riĉa rikolto dank' al la laŭkontrakta laborsistemo

Foto de HŬANG LUKUJ



aliaj 11 apudmaraj urboj kaj Hajnan-insulo, kaj pli poste la delto de Jangzi-rivero kaj la delto de Perlo-rivero kaj la tri specialaj distriktoj en suda Fuĝjan-provinco. Tiamaniere formiĝis malfermita zono laŭ la marbordo, kiu etendiĝas iom post iom al la landinterno. Ĝis la fino de 1986 Ĉinio kolektis el la eksterlando 20 miliardojn da usonaj dolaroj, importis pli ol 10 000 teknikojn, funkciigis 7 700 entreprenojn investitajn de aliaj landoj aŭ kune investitajn de Ĉinio kaj aliaj landoj, kreskigis la importan kaj eksportan komercon duoble pli multe ol antaŭ la reformado kaj altigis la proporcio de la totala eksporta sumo en la nacia enspezo de 5.6% en 1978 al 12% en 1986. Tio signifas, ke la pordo estis tre larĝe malfermita en la lastaj jaroj kaj la pordomalferma politiko ludas ĉiam pli grandan rolon en la disvolviĝo de la ĉina ekonomio.

EKSPANSIIGAS RAJTOJ DE LA URBOJ

En Ĉinio kun vasta teritorio kaj miliono da entreprenoj, la ŝtato ne povas rekte rilatiĝi kun ĉiuj entreprenoj por bone organizi ekonomian konstruadon, sed devas elvolvi la kapablon mastri ekonomion ĉe la meza tavolo. Pasintecce la ŝtato sin apogis ĉefe sur ministerioj kaj regionoj, kio kaŭzis apartiĝon de entreprenoj, blokadon inter regionoj kaj senĉesan disputadon pri kontraŭdiro. La okjara reformado direktis la atenton de homoj al la urboj. Nun estas formiĝantaj paŝopostpaŝe en la tuta lando diversaj transversaj ekonomiaj retoj, kiuj sin apogas sur la urboj, precipe grandaj kaj mezgrandaj, kaj prenas la grandajn kaj mezgrandajn entreprenojn kiel la spinon kaj la produktaĵojn kaj ekspluatadon de riĉfontoj kiel la centron. Pli kaj pli ekspansiigas la financa rajto kaj ekonomimastruma rajto de la urboj kaj multe kreskas ties altira forto, radiada povo kaj kapablo de ĝenerala servo.

KRESKO DE LA VIVIPOVO DE ENTREPRENOJ

Pasintecce la ĉinaj entreprenoj estis nur dependaĵoj de la administraj organoj kaj plenumantoj de la ordona plano de la ŝtato. Ili devis nur plenumi diversajn taskojn difinitajn de la ŝtata plano, sed ne havis memdecidan rajton, por ne paroli pri kresko de sia vivipovo. Dum la okjara reformado la ŝtato klare difinis la devojn de la entreprenoj kiel relative sendependaj produktantoj kaj administrantoj de komercaĵoj, iliajn rajtojn



Kampano U Fengĉji de Anhuj-provinco akiris riĉan rikolton de greno dank' al la laŭkontrakta laborado.

kaj interesojn, pligrandigis ilian memdecidan rajton kaj faris ilin memstaraj ekonomiaj ekzistaĵoj. Antaŭe la entreprenoj donis profiton al la ŝtato kaj nun donas al ĝi enspezan imposton kaj aliajn impostojn. La proporcio de memrezerva profito el la totala sumo de profito altiĝis de 3.7% en 1978 al 42.4% en 1986, tiel la entreprenoj ekhavis la kapablon de memakumulado, memreformado kaj memevoluo. Interne de la entreprenoj estas aplikataj diversaj laŭkontraktaj laborsistemoj kun la respondeca sistemo de fabrikestro kiel la ĉefa, kio akcelis la reformadon de administraj maŝinoj de entreprenoj. Laŭ nekompleta statistiko, en la tuta lando troviĝas pli ol 3 000 ŝtataj industriaj entreprenoj, kiuj praktikas laŭkontraktan kaj luigan laborsistemojn.



Importita laborlinio en la Fabriko de Kameraoj de Ĉingdaŭ

GLATA CIRKULADO DE VAROJ

Antaŭ la reformado la ŝtato ĉiam laŭplane kaj laŭordone liveris varojn por la vendado, kio kaŭzis malekvilibron inter liverado kaj vendado kaj ofte estigis, ke la liverado ne povis kontentigi la bezonon aŭ superis la bezonon. Nun la varoj laŭplane administrataj rekte de la Ministerio de Komerco reduktiĝis de 188 specoj en 1979 al 23 specoj. Post plenumo de la unueca varprodukta plano difinita de la ŝtato, la entreprenoj estas permesataj mem vendi la pliproduktitajn varojn. Sekve de la pliiĝo de liverataj varoj, aboliĝis jam 42 el la 44 specoj de kuponoj dumlonge uzataj kaj emisiitaj por limigita aĉetkvanto, krom du por greno kaj manĝoleo. En la cirkulado de varoj nun funkcias diversspecaj posedantecoj, entreprenadaj metodoj kaj cirkulaj kanaloj kaj malfortiĝas la antaŭa komerca sistemo kun unu kanalo kaj pluraj rilatoj de liverado. En la lastaj jaroj, en multaj lokoj de la lando stariĝis komercaj centroj, bazaroj de pogranda vendo, foiroj de agrikulturaĵoj kaj diversaj komercaj kaj servaj punktoj, kio multe oportunigis la popolan vivon. Krome, iagrade disvolviĝis la enlandaj merkatoj de produktaj rimedoj, portempa kapitalo, teknikoj kaj laboraj servoj.

RACIĜO DE LA PREZA SISTEMO

Por teni la stabilecon de prezoj, la ŝtato fiksas la prezojn de la plej granda parto de varoj, tro severe regante la prezaron. La unuflankeca strebado por preza stabileco kaj la neglekto al la rolo de la leĝo de valoro kaŭzis neracian konsiston de la prezaro, ke tro malaltas la prezoj de la primaraj produktaĵoj, kiaj energio, minaĵoj kaj bazaj agrikulturaĵoj, dum tro altas la prezoj de prilaboritaj produktaĵoj. Ne raciaj estas ankaŭ la interrilatoj de prezoj kaj preza diferenco, bonkvalitaj kaj malbonkvalitaj produktaĵoj vendiĝas ne prezoinde.

Nun la aĉetado kaj vendado de multaj ĉefaj agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj estas farataj je prezoj altigitaj aŭ tiuj proponitaj de la ŝtato. La varspecoj, kies prezoj estas fiksitaj de la ŝtato, reduktiĝis de 113 al 25. La pli granda parto de varoj vendiĝas kontraŭ proponitaj prezoj de la ŝtato kaj reguligitaj merkataj prezoj, tiel ke unuapaŝe solviĝis la problemo de "tondila preza diferenco" inter industriaĵoj kaj agrikulturaĵoj malfacile solvebla dum multaj jaroj kaj la interrilatoj de prezoj fariĝas raciaj paŝon post paŝo. En 1985 Ĉinio komencis altigi en la urboj la


prezojn de legomoj, viando, ovoj, akvoproduktaĵoj kaj aliaj ĉefaj almanĝaĵoj, kio stimulis la agrikulturan kaj flankokupan produktadon kaj multe altigis la kvaliton kaj pliigis la kvanton. La subvencio donita de la ŝtato al la grandaj kaj mezgrandaj urboj por legomoj reduktiĝis de 1.2 miliardoj da jŭanoj en 1984 al 700 milionoj da jŭanoj en 1986. Rilate la industriaĵojn, en la lastaj jaroj la ŝtato sinsekve reguligis la prezojn de koncernaj produktaj rimedoj, reguligis kaj altigis prezojn de parto da porkonsumaj industriaĵoj, la proporcio de la varoj, kies prezojn fiksas la ŝtato, konsistigas nur ĉ. 40% de la totala venda sumo, kaj pli ol mil specoj de etkomercaĵoj vendiĝas iom post iom kontraŭ altigitaj prezoj. Ĉio ĉi ludas pozitivan rolon por akceli la produktadon kaj cirkuladon de porkonsumaj industriaĵoj, plibonigi la konsiston de produktaĵoj kaj provizadon de la merkato. Post la reguligo de prezoj rimarkindaj ŝanĝoj okazis al ambaŭ flankoj de provizado kaj produktado de porkonsumaj industriaĵoj. Ĉesis la historio de manko de varoj. Iuj

varoj estas eĉ tiel abundaj, ke la vendanto turniĝis en aĉetanton, kaj ankaŭ daŭremaj konsumiĵoj, kiuj tute ne videblis antaŭ la reformado, havis rapidan disvolviĝon en la lastaj jaroj. La jara produktokvanto de lavmaŝinoj kreskis de 400 en 1978 al 8 990 000 en 1986, tiu de fridujoj de 28 000 al 2 240 000, tiu de televidiloj de 517 300 al 14 470 000, interalie tiu de koloraj televidiloj de 3 800 al 4 140 000, kaj tiu de magnetofonoj de 47 000 al 16 390 000.

Unuvorte, la reformado forte akcelis la daŭran stabilan kreskon de la nacia ekonomio de Ĉinio, tiel ke Ĉinio eniris en la periodon, en kiu la ĉina ekonomio disvolviĝas plej prospere, la nacia forto kreskas plej rapide kaj la popolo gajnas plej multe da profitoj de post la fondiĝo de la popola respubliko. Nun ni povas diri, ke jam fundamente solviĝis la vesta kaj manĝa problemoj de miliardo da ĉinaj popolanoj, kiuj ekiris sur la vojon al bonhaveco. □

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Nantong
2. Ŝandong-provinco
3. Ĝjangsu-provinco
4. Henan-provinco
5. Anhuj-provinco
6. Ŝjangfan
7. Ĉengdu
8. Ŝenŝji-provinco
9. Ŝanŝji-provinco
10. Suĝou
11. Hunan-provinco
12. Siĉŭan-provinco
13. Kantono
14. Foŝan
15. Ĉaŭĝou



Centjara jubileo de Esperanto en Pekino

de HOŬ ĜIPING

La 27-an de junio la Ĉina Esperanto-Ligo, la Ĉina Nacia Komitato de Unesko, la societo "Amikoj de Esperanto", la Pekina Esperanto-Asocio kaj la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj okazigis kunvenon en Pekino por solene celebri la centjariĝon de Esperanto. Ĝin ĉeestis gvidantoj de iuj departementoj, eminentuloj de diversaj rondoj kaj 250 esperantistoj el la urboj Pekino kaj Tjanĝin kaj la provincoj Ŝandong, Hebej, Ljaŭning, Anhuj, Hejlongĝjang kaj Henan.

La kunvenon prezidis Chun-Chan Yeh, membro de la Konstanta Komitato de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj fama ĉina verkisto. Ĉu Tunan, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko kaj prezidanto de la societo "Amikoj de Esperanto", salutis la kunvenon en la nomo de la societo kaj de li mem, kiel simpatianto de Esperanto, kaj dankis UEA pro ĝia granda kontribuo al la disvolviĝo de Esperanto kaj Uneskon pro ĝia speciala rezolucio por la centjara jubileo de Espe-

ranto. Li emfazis: "Malsameco de lingvoj estas obstaklo por la socia interkomunikiĝo de la homaro. Por forigi tiun obstaklon estas necese uzi komunan lingvon kiel internacian komunikilon. La centjara historio de Esperanto pruvis, ke ĝi ludis grandan rolon en akcelo de la internacia kultura interŝanĝo kaj pliigo de la interkompreno kaj amikeco inter la popoloj de ĉiuj landoj." Li diris: "Mi kredas, ke en sia dua jarcento Esperanto certe ricevos angoskon de la mondo per sia pli kaj pli granda rolo kaj alta idealo por la homa interkompreno, frateco kaj progreso, por ke Esperanto fariĝu ĝia komuna lingvo." Li esperis, ke la ĉinaj esperantistoj daŭre studos, aplikos kaj disvastigos Esperanton, profunde diskonigos ĝiajn signifon, rolon kaj altan idealon kaj ofte kontaktiĝos kun alilandaj esperantistoj kaj kune kun ili antaŭenigos ĝin.

S-ro Ĉu Tunan kaj Ĵelezo, la aganta prezidanto de ĈEL



Ĝang Ĉjiĉeng, la ĝenerala sekretario de ĈEL, rakontis pri la Esperanto-movado dum pli ol 80 jaroj en Ĉinio. Per ekzemploj li pruvis, ke Esperanto ludis grandan rolon en akcelo de kultura interŝanĝo inter Ĉinio kaj aliaj landoj, en konigo de la ĉina revolucio kaj konstruado, en pliigo de interkompreno inter la



S-roj Ĉen Haŭsu kaj Yosimi Umeda sur la podio



Gang Ĉjiĉeng parolas en la kunveno. Apude estas Chun-Chan Yeh.

ĉina kaj aliaj popoloj kaj en defendo de la mondpaco. Li montris: "La signifo kaj rolo de Esperanto pli kaj pli evidentiĝis en sia 100-jara ekzisto kaj evoluo. La lingvo estas pli kaj pli vaste agnoskita internacie, kio metis bazon por ĝia disvolviĝo en la sekva jarcento." Li substrekis: "La Komunista Partio de Ĉinio, la ĉina registaro kaj eminentuloj de diversaj

socitavoloj subtenas Esperanton. Esperanto estas promesplena en Ĉinio. Okaze de la centjara jubileo de Esperanto ni, ĉinaj esperantistoj, devas unuanime labori, por ke Esperanto ludu pli grandan rolon en Ĉinio kaj faru pli grandan kontribuon al la Esperanto-movado ĉina kaj monda."

Ankaŭ vicprezidanto de UEA s-ro Y. Umeda ĉeestis la kunve-

non. En varma aplaŭdo li donis salutvortojn. Li diris: "Por mi, vicprezidanto de UEA, estas granda plezuro kaj honoro partopreni en la jubilea memorkunveno en Ĉinio. Unue, mi transdonas al vi la korajn dankojn de la estraro kaj ĉiuj funkciuloj de UEA pro tio, ke vi donis grandan helpon por sukcesigi la 71-an Universalan Kongreson de Esperanto en Pekino. Mi dankas

Kunvenejo





S-ro Ĝaŭ Jongkuj donas salutvortojn.



S-ro Ĝang Hongĉen donas salutvortojn.

al ĉiuj honoraj gastoj, kiuj grandioze helpis la sukcesigon de la Universala Kongreso en Pekino. La 71-a Universala Kongreso brile malfermis la novan etapon de la Esperanto-movado ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en la tuta mondo." Li opiniis, ke la dua jarcento de Esperanto estos jarcento vere internaciigi Esperanton. Li deziris pli grandajn sukcesojn al la ĉina Esperanto-movado.

Ĉen Haŭsu, vicurbestro de Pekino kaj honora prezidanto de la Pekina Esperanto-Asocio kore deziris al Esperanto pli grandan progreson en ĝia dua jarcento. Li diris: "Mi esperas, ke la idealo de Zamenhof, la kreinto de Esperanto, kuraĝigos nin antaŭeniri, kaj ke la verda stelo pli brilos en nia vivo."

Ĝaŭ Jongkuj, vicĉefsekretario de la Ĉina Nacia Komitato de Unesko, donis salutvortojn al la kunveno. Li emfazis, ke Esperanto faris multe da gravaj laboroj por akceli interkomprenon

kaj amikecon inter la popoloj de Ĉinio kaj aliaj landoj kaj profundigi konon pri la mondo. Tiuj laboroj kongruas kun la celo de Unesko. Li diris, ke la Ĉina Nacia Komitato de Unesko helpos la ĉinan Esperanto-Ligon disvastigi Esperanton en kiel eble plej granda sfero. Li esperis, ke ili ambaŭ oftigos kunlaboron kaj kune akcelos la disvolviĝon de Esperanto.

Ĝang Hongĉen, vicĉefsekretario de la Ĉina Akademio de Sciencoj, voĉlegis gratulan leteron en la nomo de Jan Dongŝeng, prezidanto de la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj. En la letero estas skribite: "En la nuna mondo la internacia interŝanĝo pli kaj pli oftiga. Ĝi estas aparte grava por scienco. La lingva obstaklo fariĝis problemo atentata de ĉiuj. Tial la naskiĝo kaj evoluo de Esperanto estas neevitebla fenomeno." Li deziris, ke Esperanto ludu pli grandan rolon

en la kultura interŝanĝo de la homaro.

La kunveno estis plena de solena kaj varma atmosfero. La Centra Televido de Ĉinio teleŝendis la kunvenon tiuvespere. Ankaŭ la Ŝinhŭa-a Novaĝ-agentejo kaj la Popola Ĵurnalo raportis pri tio. □


(Daŭrigo de p. 49)

la renkontiĝo estas nomata renkontiĝo sur la piga ponto.

En la ŝtonaj reliefoj pri la socia vivo oni heredis klasikan realisman tradicion. Kaj el iliaj ornama intenco kaj hiperbola esprimo oni trovas romantikismon. La raraj artaĵoj havigas al ni konkretajn kaj figurajn impresojn pri la socia vivo de Handinastio kaj servas kiel materiaĵoj gravaj por studi tiun vivon. □

Ĉinio: Aplikado de Esperanto en scienc-teknika kampo

de ŜEN ĈENGJU*



Ŝen Ĉengju

La 15-a de junio 1987 estis la 3-a datreveno de la naskiĝo de la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj. Por rememori niajn travivaĵojn dum la pasintaj tri jaroj, por antaŭenrigardi la perspektivon de nia laboro, por danki en- kaj eksterlandajn amikojn pro ilia zorgo kaj subteno al ni kaj speciale por respondi la demandojn de sinjoro Mark Fettes, redaktoro de la organo de UEA "Esperanto", ni verkis tiun ĉi artikolon, dezirante diskuti kun ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj.

I. Ĉu la lingva baro minacas postrestigi Ĉinion en scienc-teknika kampo? Ĉu multaj ĉinaj

kleruloj kredas, ke lernado de la angla lingvo solvos la komunikantan problemon, aŭ ĉu oni vidas en tio nur provizoran solvon?

Ni opinias, ke en la antikveco Ĉinio antaŭiris en scienc-teknika kampo kaj per siaj multaj inventaĵoj influis la mondon. En la moderna epoko Ĉinio postgigas, kvankam ĝi faris grandan kontribuon al la homaro en kelkaj flankoj, ekzemple en spaconaviga tekniko kaj farado de insulinoj. La ĉefa kialo estas "kaŝiĝi en sia ŝelo" kaj "sin fermi en rutino". Por akceli la evoluon de scienco, tekniko, eduko kaj ekonomio de Ĉinio, la ĉina registaro praktikas pordmalferman kaj reforman politi-

kojn kaj plifortigas la rilatojn kun diversaj landoj. Nun la lingva baro fariĝis ĉefa problemo. Oni soife lernas fremdajn lingvojn. Delonge en Ĉinio la angla lingvo estas lernata kiel la unua fremda lingvo. Lernado de la rusa, japana, franca, germana kaj hispana iam estis atentata. Kompare kun ili, Esperanto multe disvastiĝis nur en la lastaj jaroj.

Grava estas la vidpunkto. Oni ĝenerale opinias, ke la angla lingvo estas internacia lingvo. Kun ĝi oni povas trairi la tutan mondon. Por scienc-teknika interŝanĝo jam sufiĉas la angla lingvo. Fakte ekzistas multaj objektivaj kondiĉoj favoraj al la lernado de tiu lingvo. Laŭ la difino de la Eduka Ministerio de Ĉinio, oni instruas la anglan lingvon en mezlernejoj, eĉ en iuj elementaj lernejoj. Abundas lernolibroj, referencaj materialoj, elektraj aŭdovidaĵaj aparatoj. Oni instruas ankaŭ pere de radio kaj televido. La socio kaj familioj donas grandan atenton al ĝia lernado kaj kreas bonan kondiĉon por la infanoj. Pro tio kreskis nemalmultaj kapablujoj pri la angla lingvo. Tamen estas tre malfacile lerni tiun lingvon, ĉar ĝia strukturo estas komplika kaj ĝia uzo, tro fleksebla. Fakte multaj personoj lernis dum sia duona vivdaŭro, sed ankoraŭ ne povas ĝin uzi. Tio malhelpas ilin lerni de aliaj landoj kaj par-

topreni en internaciaj akademiaj aktivadoj. Tion profunde spertis la estraro de la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj multaj eminentaj sciencistoj. Ili opinias, ke por evoluigi sciencon kaj teknikon oni bezonas interŝanĝon, kaj por interŝanĝi sciencojn kaj teknikojn oni devas posedi lingvojn. Oni devas lerni la anglan lingvon, sed ĝi estas malfacila; oni devas lerni ankaŭ Esperanton, ĉar ĝi estas facile lernebla. Ĉu ne estas pli bone, ke sciencistoj kaj teknikistoj posedas Esperanton? Tial la estraro de la akademio foje-refoje alvokis sciencistojn kaj teknikistojn lerni Esperanton kaj donis al nia asocio grandan subtenon kaj zorgon.

Kiam fondiĝis nia asocio, multaj homoj ne sciis, kio estas Esperanto. Iuj pensis, ke la internacia lingvo estas la angla. Nemalmultaj sciencistoj kaj teknikistoj spertis la malfacilon en lernado de fremda lingvo. Ili pensis, ke oni bezonas multe da tempo por lerni Esperanton. Ĉar iliaj scienc-esploraj taskoj estas

tre pezaj, ili ne volas malŝpari valoran tempon. Ni ripetade propagandis al ili la karakterizaĵojn kaj avantaĝojn de Esperanto. Ni funkciigis Esperanto-kursojn kaj per bona sukceso eĉ nia instruado pruvis, ke Esperanto estas facila kaj scienca. Tiuj, kiuj jam posedas iun fremdan lingvon, povas ellerni Esperanton en mallonga tempo. Post 3-monata trejnado ili jam povas verki aŭ traduki simplajn scienc-teknikajn artikolojn. Kompreneble, ni devas daŭre helpi ilin plialtigi la lingvan nivelon.


Unuvorte, la angla lingvo kaj Esperanto ambaŭ devas esti lernataj. Por ŝpari tempon, lerni Esperanton estas pli efike. Esperanto povas fari sian kontribuon en akcelado de evoluo de scienco, tekniko kaj ekonomio de nia lando. Se en la mondo ĉiuj lernos Esperanton, ĝi havos pli brilan perspektivon ol la angla lingvo.

II. Kia estas la sinteno de neesperantistaj sciencistoj al Esperanto? Kiel oni taksas ĝin en Ĉinio?

“Ĉu Esperanto estas utila?” — tio estas demando, kiun ni ofte aŭdas. Nia respondo estas jesa. Ekde la fondiĝo de nia asocio ni ĉiam uzas Esperanton. Ekzemple, ni funkciigas kursojn, publikigas revuon, korespondas kun en- kaj eksterlandaj kolegoj, akceptas fremdlandajn esperantistojn, okazigas internacian akademian konferencon, partoprenas en UK, vizitas aliajn landojn, interŝanĝas scienc-teknikajn librojn kaj materialojn ktp. Ni trovis, ke ekster nia atendo la uzo de Esperanto estas tre vasta kaj ĝia efiko, tre evidenta.

Ĉe la fondiĝo de nia asocio multaj personoj diris al ni: “Vi intencas uzi Esperanton en scienc-teknika rondo, sed la ebleco de sukceso estas malgranda. En la mondo malmultaj sciencistoj kaj teknikistoj konas Esperanton. Kun kiu vi interŝanĝas? Mondskale disvastigi kaj uzi Esperanton estas afero de kelkaj generacioj kaj kelkaj jarcentoj. Ni ne vidos ĝian venkon.” Tiuj vortoj ne senkuraĝigis nin. Post nia alvoko al la tuta mondo kaj post nia vasta kontaktiĝo kun aliaj landoj ni trovis, ke en la mondo estas multaj esperantistaj sciencistoj kaj teknikistoj. En Ĉinio kaj aliaj landoj troviĝas multaj bravuloj kaj pioniroj, kiuj laboras senlace por enkonduki Esperanton en scienc-teknikan kampon. Ekzistas la Akademio Internacia de la Sciencoj San Mariono, Internacia Scienca Akademio Comenius (Svedio), Internacia Scienca Asocio Esperantista, aliaj internaciaj Esperanto-organizaĵoj pri fervojo, poŝto, medicino, komputilo, media protektado, matematiko, agronomio, filozofio, eduko ktp. En Ĉinio fondiĝis fakaj asocioj en la Interna Mongolio, Ŝinĝjang, Uhan, Ĉangĉun, Gŭangŝji k.a. Ili faris

Redaktoroj de “Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj”



kaj faras grandajn kontribuojn per sia signifoplena laboro.

Tamen ni devas konfesi, ke Esperanto nur debutis en scienc-teknika kampo. En esperantista rondo la apliko de Esperanto en tiu kampo ankoraŭ ne ricevis sufiĉan atenton. En scienco kaj tekniko Esperanto ankoraŭ ne povas sin kompari kun la angla lingvo. Ĉinaj esperantistoj intencas uzi Esperanton en scienc-teknika kampo, sed ili ne havas ŝancon. Ekzemple, ne ĉiuj povas viziti aliajn landojn aŭ partopreni en internacia konferenco; ne ĉiuj povas trovi esperantistajn kolegojn; ne ĉiuj povas trovi materialojn verkitajn en Esperanto pri ilia fako. Ni, tutmondaj esperantistoj, unuiĝu kaj mobilizu homan, materialan kaj finanĉan fontojn por krei diversajn ŝancojn kaj kondiĉojn uzi Esperanton en scienc-teknika kampo. Ni ĉiam opinias, ke ni ne devas atendi, sed tuj agi. La sukceso de Esperanto dependas de nia nuna strebado. Se ni pli multe uzos Esperanton en ĉiuj flankoj, pli multaj homoj, inkluzive de sciencistoj kaj teknikistoj, lernos ĝin kaj ĝuos ĝian frukton.

III. Kial ĉinaj sciencistoj lernas Esperanton? Ĉu nur pro ĝia utileco kaj facileco?

La lernomotivo de ĉinaj sciencistoj estas malsama ol tiu de nesciencistoj. La lastaj lernas Esperanton eble nur por korespondi kun fremdlandaj amikoj, koni la mondon, plimultiigi sciojn, plialtigi sian kulturan nivelon aŭ starigi amikecon, sed la antaŭaj ĉefe por akademia interŝanĝo kun alilandaj kolegoj kadre de sia fako. Ju pli rapide interŝanĝiĝas scienc-teknika informo, des pli rapide progresas ekonomio. Esperanto montriĝas pli utila nur tiam, kiam ĝi kom-



Renkontiĝo de ĉinaj kaj fremdlandaj sciencistoj kaj teknikistoj

biniĝas kun sciencoj kaj tekniko. Uzado de Esperanto en scienc-teknika kampo estas bezono de informa interŝanĝo, ekonomia evoluo kaj komuna progreso de la homaro. Ni esperas, ke UEA kaj aliaj internaciaj Esperanto-organizoj faros siajn kontribuojn en tiu aspekto.

IV. Kiajn evoluojn oni plej bezonas en la scienc-teknika aplikado de Esperanto?

Post la fondiĝo de nia asocio ni ricevis multajn leterojn el diversaj lokoj de Ĉinio kaj aliaj landoj. Oni postulis Esperantajn lernolibrojn, legaĵojn, vortarojn kaj disertaĵojn pri sciencoj kaj tekniko.

Ĝang Ĝjafu, konsilanto de la Ĉina Akademio de Sciencoj, dufoje montris en siaj leteroj, ke Esperanto nepre devas kombiniĝi kun sciencoj kaj tekniko por disvastiĝi kaj esti aplikata. Sen fakaj eldonaĵoj sciencistoj kaj teknikistoj ne povas persiste lerni Esperanton. Oni devas fari kolekton de mondonaco por havi sufiĉan eldonan fonduson kaj altigi la honorarion. Post tio, oni devas alvoki diversfakajn

esperantistojn kiel eble plej multe verki sian disertacion en Esperanto. Nur tiel, Esperanto fakte sed ne filozofie estos prenata kiel la dua fremda lingvo kaj iom post iom fariĝos internacia lingvo en vera senco. Aliaj konsilantoj de nia asocio Tan Haŭŝeng (mekanikisto), Liŭ Dongŝeng (geologo) kaj Ĝoŭ Mingĝen (paleontologo) proponis al ni traduki kaj eldoni ĉefajn sciencajn verkojn. Laŭ nia opinio la plej urĝe bezonataj sciencaj eldonaĵoj estas: 1) Scienc-teknikaj vortaroj kaj diversfakaj leksikonoj, kiuj estas necesaj por sciencistoj kaj teknikistoj en legado kaj tradukado de akademiaj verkoj; 2) freŝaj informoj pri la plej novaj sciencoj kaj tekniko, inkluzive de esploraĵoj kaj eksperimentaj raporto; kaj 3) popularaj sciencaj legaĵoj.

La bezonoj de diversaj fakuloj estas malsamaj. Ni devas komenci de la plej urĝaj aferoj. Unue popularigo kaj poste plialtigo. Se niaj eldonaĵoj respondas al la bezono de la vasta legan-

(Daŭriĝo sur p. 19)

Por ke pli da ĉinoj lernu kaj uzu Esperanton

de ĜJANG ĈUNFANG*

En la nuna jarcento pli kaj pli graviĝas la rolo de lingvo kun la ekonomia disvolviĝo kaj la oftigo, vastiĝo kaj profundiĝo de komerca kontakto, kultura interŝanĝo, politika intertraktado kaj socia komunikado de diversaj landoj. Oni postulas lingvon pli kaj pli perfektan. Tio estas, kiel oni povas tuj esprimi sian penson per plej simpla kaj komprenebla lingvo kaj uzi tiun lingvon kiel komunan por la internacia komunikado. El la naturaj lingvoj la

plej ofte uzata estas la angla, cetere la franca, hispana, rusa kaj ĉina. Naturaj lingvoj kun tiaj kaj aliaj limigitecoj ne taŭgas por la internacia komunikado.

En la komplika situacio, ke oni uzis milojn da naturaj lingvoj, scienca artefarita lingvo Esperanto naskiĝis antaŭ cent jaroj. Dum la jarcento Esperanto kiel internacia komuna lingvo estis bone disvastigata kaj uzata en diversaj landoj kaj



Ĝiang Ĉunfang

faris en la homa historio senprecedencan kontribuon al akcelo de pli kaj pli intimaj rilatoj kaj pli kaj pli amika kunlaboro kaj al defendo de la mondopaco, la sankta afero por la homaro.

Ĉinio kun miliardo da loĝantoj uzas ĉefe Han-lingvon, kiu estas tute alia ol Esperanto. Ke pli da ĉinoj ellernos Esperanton, tio ludos gravan rolon por igi Esperanton vera mondlingvo. Instigi pli da ĉinoj lerni kaj uzi Esperanton estas nia glora tasko. Oni pli kaj pli klare konas ĝian signifon, vidante ke ĵaron post jaro kreskas en Ĉinio la nombro de fervoraj lernantoj de Esperanto.

Estas espereble vaste kaj profunde diskonigi Esperanton en Ĉinio. Hodiaŭ ni celebras la centjaran jubileon de Esperanto ĝuste por fari pli grandan penon por efektiviĝi tiun esperon. □

* La aŭtoro estas konsilanto de la Ĉina Enciklopedia Eldonejo, prezidanto de la Ĉina Tradukista Asocio kaj membro de la societo "Amikoj de Esperanto". Li verkis la artikolon laŭ nia peto.

Esperanto instruata en iu infanĝardeno de Ĉingdaŭ



Masaĝo (II)

MASAĜO DE LA FRUNTO

Movoj: Metu la maldekstran manplaton sur la frunton (kun fingroj dekstren), forte masaĝu ire-reire (unu fojo konsistas el unu iro kaj reiro), movu la manon kiel en la bildo 6 kaj poste masaĝu inverse per la dekstra mano. Spiru nature.

Fojoj: Po 12-20 dekstren kaj maldekstren.

Efiko: Akceli la sango-cirkuladon, delikatigi la haŭton kaj forigi makulojn kaj sulkojn sur la frunto.

MASAĜO DE LA TEMPIOJ

Movoj: Masaĝu supren-malsupren la maldekstran tempion per la maldekstra brovofino oblikve al la dekstra tempio (unu fojo konsistas el unu iro kaj reiro). Movu la manon kiel en la bildo 7. Poste masaĝu inverse per la dekstra mano.

Fojoj: Po 12-20 dekstren kaj maldekstren.

Efiko: Akceli la sango-cirkuladon, delikatigi la haŭton kaj forigi makulojn.

MASAĜO DE LA VIZAĜO

Movoj: Masaĝu supren-malsupren la vizaĝon per la manplatoj, kun kunmetitaj fingroj supren ĝis la hararo. Movu la manojn kiel en la bildo 8. Spiru nature.

Fojoj: 12-20 supren kaj malsupren.

Efiko: Akceli la sango-cirkuladon, delikatigi la haŭton kaj forigi makulojn sur la vizaĝo.

MASAĜO DE LA OKULOJ

Movoj: Frotu la hipotenarojn ĝis varmiĝo, metu ilin sur la okulojn, milde frotu ilin de la granda ĝis malgranda okulunguloj. Tenu vin kvieta, kun fermitaj okuloj, liberigu vin de ĉiaj pensoj kaj silente nombru la fojojn. Frotu la okulojn kiel en la bildo 9. Spiru nature.

Fojoj: 60, 80 aŭ 120. Faru la frotadon matene kaj vespere, aŭ tiam, kiam viaj okuloj laciĝas de laboro.

Efiko: Levi la vidkapablon kaj senlacigi la okulojn. La frotado efikas por kuraci vian miopecon aŭ presbiopecon, se vi longe persistas en tia ekzercado.


MASAĜO DE LA NAZO

Movoj: Kunmetu la manojn kaj per tenaroj masaĝu malsupren de la larmosakoj (grandaj okulunguloj) laŭ ambaŭ flankoj de la nazo. (Nur malsupren!) Masaĝu kiel en la bildo 10. Spiru nature.

Fojoj: 12-20.

Efiko: Preventi malvarmumon kaj stimuli la larmosakojn. □

(Daŭrigota)



(Daŭrigo de p. 17)

taro, la vendado estas senproblema. Por kontentigi la ĉinajn legantojn, nia revuo "Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj" aperigas ĉefe informojn pri scienca evoluo. Kvankam la nivelo de nia revuo ne estas sufiĉe alta, tamen nia prova projekto estas laŭdata en- kaj eksterlande. Pasis pli ol unu jaro post la publikiĝo de la unua numero, niaj legantoj jam troviĝas en diversaj partoj de la mondo. Ni senĉese ricevas leterojn kaj kontribuojn de ĉinaj kaj alilandaj kolegoj. Ili esprimis al ni sian subtenon por plibonigi nian revuon.

Eldoni sciencajn verkojn estas unu el la ĉefaj taskoj de nia asocio. Antaŭ nelonge ni fondis redakcion de Esperantaj sciencaj libroj, kiu konsistas el specialistoj de Esperanto kaj altklasaj sciencistoj, kaj ĝi tuj komencis redakti scienc-teknikajn vortarojn kaj librojn. Ni planas eldoni en la venontaj 2-3 jaroj Esperanta-angla-ĉinajn vortarojn pri medicino, geologio, meteologio, mikrobo-genetiko kaj komputilo, kaj aliajn sciencajn legaĵojn. Ni kore esperas, ke la internaciaj Esperanto-organizo kaj diverslandaj kolegoj kunlaboros kun ni por krei novan situacion de la internacia Esperanto-movado kaj renkonti la duan jarcenton de Esperanto per pli brilaj sukcesoj. □

* La aŭtoro estas vicprezidanto de la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, ĉefredaktoro de la ĉinlingva eldono "Influo de Scienco sur Socion" de Unesko kaj ĉefredaktoro de "Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj".

FINIĜIS LA SESA ESP-KURSO POR ALTLERNEJAJ INSTRUISTOJ

Posttagmeze de la 16-a de junio okazis en la Ŝanhaja Fremdlingva Instituto la ferma ceremonio de la sesa Esp-kurso el 12 altlernejaj instruistoj. S-ro Li Najŝji, vicĉefsekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo, parolis en la nomo de la ligo. Li esperis, ke la kursanoj daŭre studos, senĉese disvastigos Esperanton kaj plenumos la instrukcion de la Ŝtata Eduka Komisiono pri instruado de Esperanto kiel fakultativa lernobjekto en altlernejoj. Post la ceremonio vicrektoro de la instituto Daj Ŭejdong kaj aliaj gvidantoj de la instituto kaj fakultatoj fotiĝis kun la kursgvidanto kaj kursanoj. Lingvisto Grant Goodall el Usono kaj vicprezidanto de UEA s-ro Yosimi Umeda vizitis la kurson kaj kunsidis kun la kursanoj respektive en la 11-a kaj la 17-a de junio. Ili laŭdis ilian grandan progreson dum la pasinta lernojaro kaj esperis, ke ili ludos gravan rolon poste en instruado de Esperanto.

Partoprenantoj de la fondkunveno de la Esperanto-societo "Amikeco"



Ĉe la ferma ceremonio de la 6a E-kurso de altlernejaj instruistoj


"KATALOGO DE ESPERANTAJ POŝTMARKOJ" ELDONITA

Okaze de la centjara jubileo de Esperanto aperos "Katalogo de Esperantaj Poŝtmarkoj" kompilita de la ĉina esperantisto-filatelisto Song Ŝengtjan kaj eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo. Ĝi estas la unua tiurilata katalogo por la filatelista rondo. La libro certe estos bonvena al la filatelistoj.

La libro prezentas diverslandajn poŝtmarkojn, poŝtkartojn kaj filatelajn tutaĵojn kun Esperanto kiel temo, el kiuj iuj estas tre raraj. Ili ĉiuj estas koloraj kaj ofsete presitaj.

ESPERANTO EN LA ŜINGĴANG-A MILITMEDICINA KOLEGIO

Ekde septembro de 1985 la Ŝingĵang-a Milit-medicina Kolegio en la Ŝingĵang-a ujjura Aŭtonoma Regiono en nordokcidenta Ĉinio, funkciigis sinsekve du Esp-kursojn por 264 interesitoj. Por plialtigi la lingvan nivelon, la kursanoj finintaj la kurson sin organizis por lerni duagradan lernolibron de Esperanto kaj medicinan instrumaterialon en Esperanto. Al tio la kolegio donis grandan atenton. Kun ĝia subteno oni okazigis en majo Esperantan ekspozicion de libroj kaj gazetoj kaj projekciis bildobendon pri la 71-a UK. La presejo de la kolegio jam aĉetis Esperantajn tipojn por krei favorajn kondiĉojn por presi esperantaĵojn. Iuj instruistoj, multjare laborantaj pri medicina instruado, organizis Esperantan



Esperant-kurso en la Ŝinĝiang-a Milit-medicina Kolegio



S-ro Yosimi Umeda prelegas por esperantistoj de Ĉingdaŭ.

grupon por tradukado kaj kompilado. Jam en 1986 ili komencis tradukadon kaj kompiladon de "Ofteuzata Terminaro Esperanta-Angla-Ĉina". Nun ili ĝenerale plenumis la laboron.

ESP-KURSO EN LA HEBEJ-A NORMALA INSTITUTO

La Fremdlingva Fakultato de la Hebej-a Normala Instituto starigis nedevigan Esp-kurson por esplorstudentoj el la fako de la angla lingvo kaj literaturo. La kurso kun prof. Tang Ĝongjan kiel gvidanto daŭros unu jaron. En la pasinta jaro prof. Tang funkciigis rapidan kurson de Esperanto en la fremdlingva fakultato de la instituto, kun partopreno de ok junaj instruistoj.

S-RO YOSIMI UMEDA VIZITIS LA ŜANDONG-AN OCEANOGRAFIAN INSTITUTON

La 18-an de junio s-ro Yosimi Umeda, vicprezidanto de UEA, vizitis la Ŝandong-an Oceanografian Instituton en akompano de laboranto de la Ĉina Esperanto-Ligo s-ro Daj Song'en.

La instituto instruas fakojn de naturaj sciencoj, teknologio, maraj estaĵoj, medio, administrado kaj literaturo. Subtenate de la Ĉingdaŭ-a Esperanto-Asocio, la esplorstudenta societo de la instituto starigis preparan komisionon por fondo de Esperanta asocio kaj okazigis Esp-kurson. Jam pli ol 300 studentoj sin anoncis por lerni Esperanton.

Gvidantoj de la instituto intervidiĝis kun s-ro Yosimi Umeda. La gasto montris grandan intereson pri apliko de Esperanto en oceano-grafio. Li prelegis al centoj da kursanoj kaj bone respondis iliajn demandojn.

RAPORTO EL ŜID

En la urbeto Ŝid, Jugoslavio, la 22-an de marto okazis rimarkinda afero: fondiĝis Esperanto-Societo sub la nomo "Amikeco". Inter la 27 kunfondintoj la plej agemaj por fondo de la societo estis malnova E-aktivulino Cvetanka Tubiĉ kaj studento Slobodan Mitroviĉ. Cvetanka Tubiĉ estis elektita kiel prezidanto de la societo. Tri membroj de la nova societo realigas Esperanto-elsendojn ĉe Radio Ŝid, kio kontribuas al ĝia pli efika disvastigado.

FOTO-KONKURSO

Esperanto-Klubo, PARKOWA 6, D.D.K., 28-200 STASZOW,

Speciala poŝtkarto eldonita de JAFE por la centjara jubileo de Esperanto


Pollando organizas Foto-konkurson pri la temo "Esperanto-aranĝoj" kondiĉe ke sur la fotografaĵo videblas unu el elementoj (signifoj) de Esperanto. Formato 13×18 cm kaj pli. Bonvolu skribi la titolon. La tempolimo: ĝis la 30-a de oktobro 1987. La fotografaĵoj ne estos resenditaj.

ESPERANTO KAJ TURISMO

Multaj landoj, regionoj kaj urboj (mondscale) eldonas turismajn prospektojn en Esperanto. Okaze de la "Jubilea Jaro de Esperanto" la Komisiono por la Jubilea Jaro 1987 prezentas "Transporteblan ekspozicion" kun granda kolekto de prospektoj kaj elekto el la Esperantaĵoj pri "100 Jaroj Esperanto".

LIEPAJA FESTIS 100-JARAN JUBILEON

La 6-an de junio okazis en Liepaja (Latvio, Sovetio) klubo-vespe-



ESPERANTO
100 JAROJ EN SERVO DE HOMARO



ro dediĉita al la 100-jara jubileo de Esperanto kaj la 30-a datreveno de la renoviĝo de Esperanto-movado en Liepaja. En la aranĝo partoprenis ankaŭ gastoj el Riga, Klaipeda, Daugavpils k.a. La prezidanto de la E-klubo Honars Briska kaj la instruisto de elementa kurso Leonids Kurakins faris paroladojn pri Esperanto kaj ĝia apliko en la praktiko. Ili aranĝis ankaŭ dis-tran vesperon, en kiu junularo ĝuis multajn ludojn, kaj ekskurson tra la urbo.


INFORMO EL SVEDIO

Laŭ la informo de Gustav Stenholm la sveda sekcio de la Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) okazigis la 10-an — 13-an de aprilo sian jarkonferencon en Stokholmo kadre de la jubilea konferenco de la Sveda Esperanto-Federacio. La konferencon ĉeestis pli ol 260 svedaj kaj alilandaj esperantistoj, inter kiuj estis ĉ. 30 svedaj KELI-anoj. Profesoro John Wells, London, kaj Humfrey Tongkin, prezidanto de UEA, honoris la konferencon per siaj distingegaj prelegoj.

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: 1 internacia respondkupo por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* S-ro Li Linmao, ĉinlingva instruisto deziras interŝanĝi Esperantajn filatelaĵojn kaj aliajn pm. tutmonde. Mi povas sendi la filatelajn tutajojn pri la 71-a UK kaj la ĉinan poŝtmarkon pri la centjariĝo de Esperanto. Adr.: Li Linmao, Li-xian Di Er Zhongxue, Hunan, China.



Esperantaj glumarkoj presitaj en Hispanio

* 26-j. fraŭlino Xie Xiaoyu dez. kor. tutmonde. Adr. 23/407 Jiunanhaixianjie, Zhongshanliulu, Guangzhou, Ĉinio.

* Huang Liya, instruistino de angla lingvo, dez. kor. kun ĉiuj alilandaj amikoj en angla lingvo pri arto, literaturo, sporto, muziko kaj kolektado de poŝtmarkoj kaj poŝtkartoj. Adr.: Changdexian Weisheng Xuexiao, Changdexian Wulingzhen, Hunan, Ĉinio.

* 28-j. bibliotekistino dez. kor. kun geamikoj tutmonde en Esperanto pri diversaj temoj kaj interŝanĝi fotojn, pm., pk. Adr.: Wang Lan, 173 Shi, Jinshan Lu 43, Shanghai 200080, Ĉinio.

* 31-j. laboristo dez. kor. kun geamikoj de la mondo pri literaturo, poemo, poŝtmarko, bildkar-to, libroj kaj aliaj. Adr.: Liu Jian-

xin, Cangzhou Lian You Chang, Hebei, Ĉinio.

* 21-j. laboristo Liao Shanbin dez. kor. kun esperantistoj el la tuta mondo pri diversaj temoj kaj kolektas bk. kaj pm. Adr.: Liao Shanbin, Mucai Zhan, Xiao Shan Jiang, Lian Shan Xian, Guangdong, Ĉinio.

* Xu Ping 24-jara dez. kor. kun geesperantistoj tutmonde pri E-libroj, scienco kaj tekniko aŭ aliaj temoj. Adr.: Technological section, Carburettor plant of the second automobile works, Shiyan, Hubei, Ĉinio.

* La Esperanto-Asocio de gubernio Hua-an dez. kor. kun samideanoj en kaj eksterlandaj. Adr.: Li Shuzhi (ĝenerala sekretario), Huafengzhen Xiabancun, Hua-an Xian, Fujian, Ĉinio.

Brodarto

de CANG JAN

Brodado estas fari desegnon, bildon aŭ ideogramon sur silka aŭ kotona teksaĵo per diverskoloraj fadenoj el silko, lano, koton, oro kaj arĝento, aŭ haroj.

La plej frua brodaĵo nun trovebla en Ĉinio estas elterigita en 1958 el Ĉu-regna tombo de la Periodo de Printempo kaj Aŭtuno (770-476 a. K.) ĉe la urbo Ĉangŝa. La silka brodaĵo portas la desegnon de drako kaj fenikso broditan per ĉenaj kudreroj. La kudreroj estas ordaj,

la brodado delikata kaj la figuroj vivecaj.

En Han-dinastio (206 a. K.-220 p. K.) jam aperis broda metodo. En Tang-dinastio (618-907 p. K.) la brodarto perfektigis, aperis bonorda kaj seria manieroj. En Song-dinastio (960-1279 p. K.) brodado estis uzata pli vaste. Troviĝis broditaj silka romba surbrustaĵo, gaza punto, silka kapkuseno, kaptuko, silka supervesto, silka porjupa zono ktp. La desegnoj sur brodaĵoj

estis simplaj kaj vivecaj kun densa loka stilo. Estis aplikitaj diversaj komplikaj brodmanieroj. En Ĉing-dinastio (1644-1911) la brodarto de Ĉinio atingis sian plej florantan tempon. Pli ekspansiis la produkta sfero kaj stariĝis en diversaj lokoj privataj metiejoj, kiuj konkurencis kun la ŝtataj. La brodistinoj strebadis al ĉiam pli perfekta projektado de desegnaĵoj kaj lerta tekniko kaj kreis senprecedence abundajn specojn kaj brodmanierojn, kiel ekz. ambaŭflanka silka brodaĵo, ambaŭflanka gaza brodaĵo, lanfadena brodaĵo. Tiel formiĝis la epoka stilo harmonie kombinanta realismon kaj dekoron. Aparte menciindas, ke la aktoraj kostumoj broditaj per pluraj manieroj impresas lukse kaj impone kaj plene spegulas la superan teknikon kaj arton de brodarto de Ĉing-dinastio.

Inter la ĉinaj brodaĵoj la brodaĵoj de Suĝoŭ, Hunan, Siĉŭan kaj Gŭangdong estas konataj kiel kvar famaj specoj de la ĉinaj brodaĵoj.

La Suĝoŭ-stila brodaĵo produktiĝas en la urbo Suĝoŭ kaj Uŝjan-gubernio kaj servas ĉefe kiel apreca kaj enĉambra ornamaĵoj. Ĝi karakteriziĝas per fajne kaj simetrie dividitaj silkaj fadenetoj, elegantaj fadenkoloroj, riĉaj manieroj kaj glataj kaj ordaj kudreroj. Dum longa praktikado la tieaj brodistinoj kreis la teknikon dividi silkajn

Brodistino





Siĉŭan-stila brodaĵo «Pandoj»

fadenojn en pli fajnajn fadenojn, mikse tordi tiujn dividitajn dukolorajn aŭ plurkolorajn fadenetojn en unu fadenon kaj brodi per tia fadeno. Por ekzakte kaj perfekte prezenti karakteron, sintenon kaj spiriton de malsamaj figuroj, la brodistinoj ofte devas atenteme studi kaj analizi la projekton kaj uzi kelkdekojn, eĉ centojn da brodmanieroj.

Dum la pasintaj 40 jaroj, sur la bazo de tradicia broda tekniko la brodistinoj de Suĝoŭ elbrodis grandan nombron da elstaraj artaĵoj, kiaj “Blanka Pavo”, “Turdo sur Spektabilo” kaj “Ok Katoj”. Precipe la broditaj katidoj ĝuas renomon pro delikateco kaj viveco. La ambaŭflanka brodaĵo “Blanka Katido kaj Manto” allogas per subtila kaj eleganta brodado, lakona strukturo, viveca bildo, mildaj kaj atikaj koloroj kaj trafe prezentas interesan ludon de blanka

katido kaj manto. Ĝi estas ĝuebla de ambaŭ flankoj. Vere supernatura majstraĵo de la ĉina brodarto!

La Hunan-stila brodaĵo disvolviĝis sur la bazo de popola brodado kaj ĉefe karakteriziĝas per bildigo de ĉinstilaj pentraĵoj, precipe de tuĉpentraĵoj kaj havas realisman stilon. Ĝi aplikas pli ol 30 brodmanierojn. Laŭ malsamaj desegnaĵoj oni uzas malsamajn manierojn kun komplikaj varioj. La brodaĵo “Pavo kaj Peonio” impresas lukse, kolorvarie kaj donas belan artan ĝuon. La majstra tekniko de la brodaĵo de Hunan estas brodi leonon kaj tigron. Bonan ekzemplon donas la artaĵo “Leono”. La brodita leono kun ronde malfermitaj okuloj kaj levita kapo, muĝanta kaj staranta alte, montras la majeston. Por tiu brodaĵo oni uzis novan brodmanieron, tiel ke la leonharoj vidiĝas kvazaŭ veraj.

La Siĉŭan-stila brodaĵo produktiĝas en la Ebenajo de la Okcidenta Siĉŭan-provinco kaj distingiĝas per variaj brodmanieroj, glataj kudreroj kaj kolorbrileco. Ĝiaj reprezentaj verkoj estas “Karmo sub Hibisko”, “Kokoj kaj Rinantoj”. “Karmo sub Hibisko” estas brodita sur neĝblanka atlaso kaj bildigas, kiel vigle naĝas grasaj karmo grandaj kaj malgrandaj sub hibisko. Por versimile brodi unu karpon, oni uzis pli ol 30 brodmanierojn. Ekz. la naĝiloj kaj vosto subtile broditaj impresas leĝere, maldike kaj diafane.

La brodaĵo Ĝuangdong-stila dividiĝas en du skolojn, unu estas Ĝuang-brodaĵo produktita ĉefe de Kantono kaj Foŝan kaj la alia estas Ĉaŭ-brodaĵo produktita de Ĉaŭĝoŭ. La brodmanieroj de la du skoloj diferencas unu de la alia. Ĝuang-brodaĵo karakteriziĝas per pompeco, ordeco, ornameco, brilaj koloroj kaj glata surfaco. Ekz. tre imponas kaj pompas la brodaĵo “Naŭ Drakoj Petolas en la Maro”. La skvamoj de la drakoj anaglifaj duone kovras unu alian kaj la marondoj estas broditaj per arĝentaj fadenoj. Ĉaŭ-brodaĵo havas la artan efikon de “glateco, anaglifeco, elstareco kaj vigleco” pro tio, ke oni uzas pli ol 60 brodmanierojn per oraj kaj arĝentaj fadenoj kaj pli ol 40 manierojn de lanfadena brodado. Ni prenu ĝian reprezentan verkon “Cent Birdoj ĉirkaŭ la Fenikso” kiel ekzemplon. La brodaĵo montras, ke cent birdoj en diversaj pozoj kolektiĝas kaj flugas ĉirkaŭ la fenikso, kiujn reliefigas la suno, verdaj pinoj, smeraldaj bambuoj, peonioj kaj ruĝaj umefloroj sur la fono. La brodaĵo estas saturita de arda etoso kaj simbolas bonaŭguron. □

*Brodaĵo de la Okcidenta
Han-dinastio (206 a.K. — 25
p.K.)*



*Drako kaj fenikso (Güang-
dong-stila brodaĵo)*





*Blanka pavo
(Suĝoŭ-stila
brodaĵo)*

*Koko (Siĉŭan-stila
brodaĵo)*




Karpoj sub hibisko (Siĉŭan-stila brodaĵo)



Leonoj (Hunan-stila brodaĵo)





Ok katetoj (Suĝoŭ-stila brodaĵo)

Blanka kato kaj manto (Suĝoŭ-stila brodaĵo)

Pavoj sur magnolia arbo (Hunan-stila brodaĵo)



ĈEN BAŬHE:

Jang Jang, nova volana stelo

En la 5-a Monda Volana Ĉampionea Konkurso okazinta kurantjare en Pekino, la ĉina teamo gajnis ĉiujn 5 ĉampioneojn, kio mirigis la koncernajn ekspertojn kaj rigardantojn. Neatendite, la vira solluda ĉampioneco estis gajnita de la 23-jara ĉina sportisto Jang Jang.

UNUA PAŜO

La gepatroj de Jang Jang estis membroj de la Flugpilkaj Teamoj de Ĝjansu-provinco en la 50-aj jaroj. Lia patro nun funkcias kiel instruisto en la Sportinstrua kaj esplora Sekcio de la Hŭadong-a Hidraŭlika Instituto, dum lia patrino kiel sporta instruistino en mezlernejo en Nankino.

La sportamo de la gepatroj influis rekte la volon de Jang Jang. Li estas vigla kaj preskaŭ interesiĝas pri ĉiuj sportoj.

Kiam li estis infano, lia hejmo sidis proksime al la Postleciona Sporta Lernejo de Nankino. Li ofte glitis en la lernejon

por rigardi trejnadon de geknaboj, kaŝe imitante ilin. La gepatroj rimarkis la fortan inklinon de Jang Jang al sporto. Post kiam li vizitis elementan lernejon, ili sendis lin al la sporta lernejo.

Li unue lernis ludi tablotenisson. Post nelonge la trejnisto opiniis, ke li ne estas promesplena en tiu sporto, kaj li estis elkribrita. Li do sin turnis al korbopilado, sed estis rifuzita de la trejnisto pro lia malalta staturon. Tio multe ĉagrenis Jang Jang. Analizinte la kondiĉojn de lia korpo, lia patro proponis, ke Jang Jang lernu volanan ludon.


En 1975, 11-jara Jang Jang komencis trejniĝi per volanado

en la sporta lernejo. Per tio li faris la unuan paŝon sur la vojo al la volana ĉampioneco.

ZIGZAGA VOJO

1978 estis la jaro plej kontentiga por Jang Jang en la knabeco. Li estis feliĉe elektita kiel membro de la trejna volana teamo de Ĝjansu-provinco.

En la sekvanta jaro Jang Jang renkontis malfeliĉon. La provinca trejna volana teamo kolektis eminentajn volanistojn de diversaj lokoj. Inter tiuj viglaj knaboj, Jang Jang, introvertito, estis malsupera pri nealteco kaj neforteco. Tial, li estis elkribrita de la trejna teamo, ĉar mankis al li necesa kvalito fariĝi eminenta volanisto.



Jang Jang en ludo

Tamen, la patro pli bone konis sian filon. Li vidis kaj liajn mankojn de nealta staturo kaj negranda forto kaj ankaŭ liajn superaĵojn de rapidaj reago kaj pensado. Samtempe, li ankaŭ trovis, ke kompare kun ordinariaj knaboj, Jang Jang estas pli aplomba kaj pli obstina antaŭ malfaciloj. Tio estas ne mankigebla por eminenta sportisto. Pro tio li opiniis, ke Jang Jang estas esperiga, kaj lia problemo estas tio, ke liaj superaĵoj ankoraŭ ne estas konitaj de aliaj.

Post nelonge, la patro refoje sendis Jang Jang al la trejna teamo kaj konsiliĝis kun la trejnisto pri unujara provado.

Post kelkaj monatoj, je reordigo de la trejna teamo Jang Jang estis refoje enlistigita kiel elkribrito. Tamen, ĉifoje li renkontis savanton. Hŭang Jiĉong, unu el liaj trejnistoj, parolis pro Jang Jang, ke li estas sportisto ne forto-tipa, sed ideale lerto-tipa. Jang Jang estis finfine restigita. Finiĝis la plej maltrankviligaj tagoj en lia vivo de volana ludo.

VIDEBLA TALENTO

Septembre de 1983, Ĉinio okazigis la Kvinan Tutlandan Sport-kunvenon. Ĝi estis ŝlosila tempo en la sporta vivo de Jang Jang, ĉar li jam sin trejnadis 4 jarojn en la provinca trejna teamo. Ĉifoje li devis demonstri sian kapablon en la volana ludo.

Dum la konkursado, Jang Jang plene disvolvis sian supercon, ke li movis per varia volanfaligo sian rivalon por trovi breĉojn kaj fari reatakon. Lia taktiko sukcesis kaj tiel li akiris la trian lokon de la vira solludo.

La volana ludado de Jang Jang en la konkurso vekis atenton de Hoŭ Ĝjaĉang, trejnisto

de la Ŝtata Volana Teamo. Li tre admiris la lertajn movojn kaj varian taktikon de tiu juna sportisto kaj elektis lin en la ŝtatan trejnan teamon.

Sub direktado de Hoŭ Ĝjaĉang, Jang Jang komencis pli rigoran kaj celhavan trejniĝon. Post duonjaro, li plie levis sian kapablon regi la volanon dum la ludo, multe fortigis sian rebatan teknikon kaj komencis rivali kontraŭ fortuloj en internaciaj konkursoj.

Jang Jang vekis veran atenton en la 13-a Thomas-pokala Konkurso okazinta en Malajzio majo de 1984, kiun li partoprenis kiel kandidata membro de la Ĉina Volana Teamo. En la konkurso, kvankam la ĉina teamo estis venkita de la indonezia teamo, tamen Jang Jang kiel kandidata membro per 2:0 venkis Icuk Sugiarto, volanan reĝon de Indonezio, kiu gajnis la mondan ĉampionecon en la jaro 1983. Post la konkurso, multaj volanistoj opiniis, ke Jang Jang vidiĝis la esperon de Ĉinio por gajni la pokalon en la venonta konkurso.

En 1986, Jang Jang, unu el la ĉefaj membroj de la Ĉina Volana Teamo, refoje partoprenis la Thomas-pokalan Konkursion kun siaj kolegoj kaj fine gajnis la ĉampionecon.

BRILA ATINGO

En 1986, kiam Jang Jang kun siaj kolegoj gajnis la Thomas-pokalon, lia patro sendis al li jenan telegramon: "Ne malŝparu viajn orajn jarojn kaj antaŭen marŝu por gajni la mondan sol ludan ĉampionecon."

Jang Jang jam fariĝis unu el la mondfamaj volanistoj, sed li ne forgesis, ke li estis venkita de Eddy Kurniawan, nova

elstara sportisto de Indonezio, kaj eĉ ne akiris la kvaran lokon en la Volana Ĉampionea Konkurso de Britio. Kiam oni demandis lin kiel rigardi la malsukceson, li respondis: "Tiaj malsukcesoj estis realaj, kiuj ne nur ĉagrenis min, sed ankaŭ lernigis al mi multon. Mi devas alte taksi kaj transpasi ilin."

En majo de la kuranta jaro, okazis en Pekino la Monda Volana Ĉampionea Konkurso. Ĝi estis unu el la internaciaj volanaj konkursoj kun plej alta nivelo kaj alte taksata de diversaj volanistoj. La volana reĝo de Danlando Morten Frost, enlistigita kiel la unua sportisto de la konkurso, antaŭe jam gajnis la ĉampionecon de ĉiuj periodaj gravaj volanaj konkursoj. Tial, gajni la ĉampionecon de la konkurso fariĝis lia lasta celo. Antaŭ la konkurso, M. Frost esprimis, se li ĉifoje gajnus la ĉampionecon, li ekŝiĝos el la volanludo.


En la 24-a de majo, la Ĉefurba Sporta Halo en Pekino kun 18 000 sidlokoj estis plenkuna de rigardantoj kaj la finalo okazis inter M. Frost kaj Jang Jang. Antaŭ tio, Frost jam venkis alian ĉinan volaniston Ĝaŭ Ĝjanhŭa, kiu estis por li plej granda minaco. Frost pasinte havis ok renkontiĝojn al Jang Jang, kun la rezulto 5:3. Tio pliigis lian kredon super Jang Jang.

La fakto tamen pruvis, ke la monda volana reĝo malalte taksis la forton de la ĉina silenta sportisto Jang Jang. Sub la rapidmova, varia kaj sagaca atako, Frost tute perdis la iniciativon en la volanado kaj estis finfine venkita de Jang Jang per la rezulto 1:2. Jang Jang finfine atingis novan altan pinton en sia volana ludo. □

BJAN LJAŬ:

Li iris de la landlima urbo al la mondo

— Pri la fama ĉina
verkisto Ŝen Congŭen



S-ro Ŝen Congŭen

En 1923 sur strato de Pekino iris malriĉa, sed ambicia junulo. Li skribis sur la registrolibro de iu gastejo:

“Ŝen Congŭen, dudek-jara lernanto el Fenghŭang-gubernio, Hunan-provinco.”

Post kelkaj jaroj ĝuste tiu junulo aperigis serion da verkoj en ĵurnaloj kaj revuoj, priskribantaj la vivon de ordinaraj popoloj de okcidenta Hunan-provinco kaj lian propran travivaĵon, kio vekis grandan atenton de la legantoj kaj literaturistoj. Liaj verkoj senĉese elfluis kiel rivera fluo kaj disvastiĝis en Ĉinio. Kaj tiel li fariĝis fama verkisto.

Ŝen Congŭen naskiĝis en 1902. Kiam li estis 14-jara, li devigite forlasis lernejon kaj aliĝis al armeo pro la malriĉeco de sia familio. Li travivis ses jarojn kiel duonmigra soldato. Li

travojaĝis ĉiujn guberniojn de Hunan-, Siĉŭan- kaj Gujĝoŭ-provincoj kaj la tutan basenon de la longe etendiĝanta Jŭanĝjang-rivero. Tio donis al li ŝancon kontaktiĝi kun kamparanoj, militistoj, banditoj, friponoj, boatistoj, prostituitinoj, ministoj kaj forĝistoj kaj vidi vivmanierojn de diversaj homoj. En tiu malluma socio burĝonis kaj kreskis liaj suspektoj al la ekzistantaj socia ordo kaj koncepto. Tial li decidiĝis sin liberigi de la ŝajne destinita sorto, eliris el okcidenta Hunan-provinco kaj venis sola al Pekino.

Sed lin atendis sur la vojo de la homa vivo nur malriĉeco, senlaboreco kaj straba rigardo. Pro sia element-lerneja edukiteco li ne povis viziti altlernejon. Li forlasis postenon de malgranda oficisto kaj komencis sian povran vivon de juna literaturisto

en Pekino, kiu havis milionon da loĝantoj.

Liaj unuaj verkoj aperis en la felietono de “Matena Ĵurnalo”. De la dudekaj ĝis la kvardekaj jaroj li verkis 40-50 novelkolektojn, kaj plus liaj aliaj verkoj la totala sumo atingis pli ol 70.

La verkoj de Ŝen Congŭen prezentas diversajn vivmanierojn kaj ĝojon kaj triston de subaj popoloj, kiujn li vidis. Li prenis la historian ŝanĝiĝon de okcidenta Hunan-provinco kiel fonon de sia verko. Liaj reprezentaj verkoj “Landlima Urbo” kaj “Longa Rivero” priskribas, kiel okcidenta Hunan ŝanĝiĝas de fermita kaj memproviza kampara socio kun primitivaj moroj al la moderna socio. La epoko, en kiu vivis la verkisto, estis epoko de abrupta ŝanĝiĝo de la ĉina historio. Li vidis la pezan impostadon,



S-ro Ŝen Congŭen en 1932, en Ĉingdaŭ



Usona literatura doktoro (dekstre) vizitas s-ron Ŝen Congŭen.

pirabadon kaj buĉadon de militaristoj, la bankroton de la kampara ekonomio kaj la moralan putriĝon pro la enstrudiĝo de la "moderna civilizacio". Liaj verkoj montras liajn kordoloron, triston kaj konfuziĝon.

La noveloj de Ŝen Congŭen havas diversajn temojn. Sed ĉiujn liajn verkojn trairas ĉefe etikaj principoj. Li komparis la mondumon kun la malsupra tavolo kaj klare montris siajn simpatiojn kaj malamon kaj siajn idealojn kaj esperojn por plibonigi la homajn rilatojn. Komparu "Bozi" kaj "Landlima Urbo", kiuj priskribas la povran vivon de maristo kaj infano-fianĉino respektive, kun "La Bildo de Ok Ĉevaloj" kaj "Grandsinjorino", kiuj priskribas la amaferon kaj embarasan vivon respektive, kaj vi trovos unuflanke la virtan animon, kiu eltenis la ŝercadon de la sorto, kaj aliflanke la putriĝintan moralon, ke luksaj vestoj ne povas kaŝi malpuran animon nek altrangeco hipokritecon.

La noveloj de Ŝen Congŭen sin karakterizas per lirikeco. La verkisto ne rekte esprimas sian senton, kiu speguliĝas tamen en

la travivaĵoj de herooj sub lia plumo. La subjektiva sento de la verkisto kunfandiĝas kun la priskribita bildo de vivo kaj rezulte la verkoj donas reliefan artan medion. La verkisto prezentas unu post alia ĝenrojn (liaj verkoj priskribas precipe la vivon de okcidenta Hunan-provinco). Li lertas kapti efemerajn fenomenojn en la naturo kaj reala vivo kaj sentumas per ĉiuj sensoroj ĉion sentumeblan, kiel koloro, odoro, formo, mieno

kaj pozo, kiujn la verkisto reaperigas en siaj verkoj, donante densan etoson de fora montvilaĝo de Ĉinio. La priskribita bildo kunfandas la primitivecon, simplecon, belecon kaj dezertecon en unu tuton. Sur tiu specifa fono disvolviĝas ĝojaj aŭ mornaj intrigoj.

Ŝen Congŭen lertas ankaŭ priskribi la homan psikon. En liaj noveloj estas malofte trovebla paragrafo de pura monologo. Li ĉiam kaptas etajn psikajn

S-ro Ŝen Congŭen (maldekstre) interparolis kun popola artisto en 1982.



ŝanĝiĝojn de herooj en specifa medio kaj la mienon kaj konduton ilin esprimantajn, kaj tiel sugestas plenan internan mondon de herooj kaj vivigas ilin figure kaj spirite. Liaj verkoj "Landlima Urbo" pri tragedio de amo, "San San" pri knabino de muelisto kaj "Edzo" pri malriĉa edzo, kiu devigite prostituis sian edzinon por sia vivteno — ĉiuj kaptas la psikan ŝanĝiĝon en la konfliktoj en diversaj eventoj kaj spegulas la animan skuadon en internaj kaj eksteraj kontraŭdiroj kaj la ĝojon kaj triston kaŭzitajn de tiu skuado, kio faras grandan artan efekton.

Al la aparta stilo de Ŝen Congŭen helpas lia perfekta lingvouzo. La lingvaĵoj en liaj noveloj estas simplaj, tamen nebanalaj. La dialogoj sub lia plumo estas humuraj kaj la parolesprimoj originalaj.

Ŝen Congŭen estas honorita kiel "ĉiustila verkisto". Li ja meritas tian nomon. Li provis verki novelojn en diversaj stiloj, sen ajna fiksita formo. La komenco kaj fino de liaj noveloj ĉiam varias, precipe la aranĝo de la fino. La verkisto ŝatas subitan turniĝon ĉe intrigosolvo, kaj ĉiuj intrigosolvoj sin montras diversaj pro malsamaj historioj kaj personoj.

La kontribuo de Ŝen Congŭen al la ĉina moderna literaturo vekis grandan atenton de la monda literaturistaro. Specialistoj opinias, ke la verkoj de Ŝen Congŭen klare prezentas la profundan historian horizonton, estas striktaj strukture, freŝaj stile kaj kovritaj de simbolismo kaj elmetas problemojn pensigajn por legantoj.

Nun jam troviĝas pli ol 20 ĉinologoj sin okupantaj pri studo de Ŝen Congŭen. En Fran-

cio verkoj de Ŝen Congŭen estas prenitaj kiel legaĵoj por studentoj lernantaj la ĉinan lingvon. En Japanio iuj altlernejoj funkcigas kurson de Ŝen Congŭen.

En 1984 Hongkongo eldonis 12-volumajn "Verkojn de Ŝen Congŭen" kun 4 milionoj da ĉinaj ideogramoj, en kiuj estas kolektitaj liaj noveloj, traktatoj pri literaturo kaj arto, prozaĵoj kaj eseoj verkitaj dum la duonjarcento.

Sed bedaŭrinde, en la kvindekaj jaroj Ŝen Congŭen subite malaperis en la ĉina literatura rondo. Multaj amantoj de liaj verkoj veis pro tio.

En la komenco de la kvindekaj jaroj Ŝen Congŭen rezignis la postenon de doktoro de la Pekina Universitato kaj faris studadon pri historiaj objektoj unue en la Ĉina Historia Muzeo kaj poste en la Historia Instituto sub la Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj.

En 1982 eldoniĝis lia libro "Studo pri Ĉinaj Antikvaj Kostumoj" kun 250 000 ideogramoj, kio admirigis arkeologojn.

En la libro estas kolektitaj 700 bildoj pri ĉinaj kostumoj de diversaj dinastioj de 3 000 — 4 000 jaroj, kiuj prezentas la brilan historion de la ĉina kulturo.

Pri tiu libro iu fama literatura komentisto kun emocio diris: "Lia sukceso en tiu flanko ne estas malpli granda ol tiu de lia literatura verkado."

Jes, Ŝen Congŭen estas ankaŭ specialisto en studo de ĉinaj antikvaj metiartaĵoj. En la lastaj 30 jaroj estis eldonitaj liaj "Artaj Drakoj kaj Feniksoj", "Bronzaj Speguloj de Tang- kaj Song-dinastioj", "Desegnoj de Ĉinaj Silkaĵoj", "Brokato de Ming-dinastio" kaj "Lakaĵoj de la Periodo de Militantaj Regnoj". Nun li jam estas 85-jara, tamen ne ĉesas labori. Li havas pliajn temojn por studi, kiel antikvaj mebloj, jadaĵoj kaj lanternoj.

Ni povas aserti, ke Ŝen Congŭen venis de sia hejmlanda rivereto kaj nun iras kontraŭflue laŭ granda rivero de la 5 000-jara historio de Ĉinio. □

Gesinjoroj Ŝen Congŭen (maldekstre) renkontiĝas kun geaktoroj de la filmo "Landlima Urbo". La tria de maldekstre estas fama ĉina reĝisoro Ling Zifeng.



ŜJAŬŜJAŬ*

(Novelo)

(Unua Parto)

En la kampano nupto akompanata de muziko de surnao** okazis preskaŭ ĉiun tagon en la dekdua monato de la ĉina kalendaro.

Post la surnao-ludisto sekvis palankeno ekvilibre portata de du portistoj. En la palankeno estis enŝlosita per latuna seruro novedzino en freŝe ruĝaj kaj verdaj vestoj, kiujn ŝi neniam surportis antaŭe. Ŝi ploregis. Tiuj knabinoj pensis, ke ili forlasis la patrino kaj mem fariĝos patrino kaj renkontos multajn novajn aferojn. Kiel en sonĝo, ili kuŝos kun tute fremda viro en la sama lito por plenumi la taskon daŭrigi la generaciojn de la edza familio. Tion pensante ili ektimis kaj opiniis, ke ili devas plori kiel aliaj.

Tamen estis knabinoj, kiuj ne ploris ĉe la edziniĝo, kaj tion ekzemplis Ŝjaŭŝjaŭ. La knabineceto ne havis patrino kaj loĝis en la vilaĝo kie ŝia onklo terkulturis. Ŝi tutan tagon iradis surkampe kun bambua korbo, kolektante hundan fekaĵon kaj manĝeblajn herbojn. Por ŝi edziniĝo estis nur transloĝiĝo de tiu familio al alia, tial en la tago de ŝia edziniĝo ŝi ankoraŭ estis gaja kaj ridetanta. Ŝi ne estis hontema, nek timema. Antaŭ ol

kompreni la aferon, ŝi jam fariĝis alies edzino.

Ŝjaŭŝjaŭ edziniĝis en la aĝo de 12 jaroj, kaj la edzo havis apenaŭ 3 jarojn. La edzo estis 9 jarojn pli juna ol ŝi kaj ankoraŭ mamsuĉis. Laŭ la moro de la loko ŝi nomis lin frateto. Ŝia ĉiutaga afero estis amuzi la frateton aŭ sub la saliko antaŭ la vilaĝo aŭ ĉe la rivereto. Se li malsatiĝis, ŝi donis al li manĝaĵon, se li ploris, ŝi distris lin, metis sur lian kapon kukurban floron aŭ kolomboherbon, aŭ kisis lin dirante: "Frateto, kis, refoje kis." Ŝi kisis kaj rekisis la makulitan vangeton de la infano, kaj tiu ekridis. Do post ĝojigi venis barbara konduto: la infaneto taŭzis al ŝi la harojn flavajn, malofte prizorgatajn. Kelkiam li longe tiradis ŝian harligon, la ruĝa ŝnureto malligiĝis, kaj tiam ŝi koleriĝis kaj faris kelkajn batojn sur lin kaj la frateto ekploris. Ŝjaŭŝjaŭ do ŝajniĝis sin ekploranta kaj diris, per fingro montrante al lia vizaĝo: "Hej, estas maldece agi impertinente!"

Ĉu serenajn, ĉu pluvajn tagojn, ŝi pasigadis amuziĝante kun sia edzo en la brakoj, kaj kelkiam faris ian laboron kiun ŝi povis. Ŝi ofte lavis vestojn kaj

urintukojn ĉe la rivereto, serĉante intertempe belajn litorinojn por la malgranda edzo sidanta apud ŝi. En nokto ŝi ofte havis diversajn sonĝojn kiujn ofte havas knabinoj en tiu aĝo: aŭ ŝi trovis multajn monerojn ĉe la posta pordo aŭ en iu alia loko, aŭ frandis bongustaĵon aŭ grimpis sur arbon, aŭ fariĝis fiŝo kaj naĝis gaje en akvo. Alifoje en sonĝo ŝi fariĝis tre malgranda kaj tre leĝera, flugis inter la steloj sur la ĉielo, sed vidis neniun krom blanka kaj ora lumo, kaj tiam ŝi vokis sian panjon kaj vekigiĝis de timo. La koro forte batis post la vekigo. Kiam ŝia krio vekis aliajn en la apuda ĉambro, tiuj insultis: "Frenezulo, kion vi pensas! Tage vi distriĝis senbride, certe havas inkubsonĝon nokte!" Ŝjaŭŝjaŭ nur subridis. Kelkfoje la edzo vekis ŝin el bela sonĝo. Kutime la edzo dormis apud sia patrino, por ke li povu facile suĉi lakton. Sed kelkfoje aŭ li tro multe suĉis aŭ pro io alia, li ploregis noktomeze, pisis aŭ fekis. La edzo ploradis ĝis lia patrino povis fari nenion, kaj tiam Ŝjaŭŝjaŭ ellitiĝis senbrue, venis kun dormemaj okuloj al lia lito, prenis lin en siajn brakojn, lasis lin rigardi la lunon kaj la stelojn, aŭ ŝmace kisis lin,

aŭ krietis: "Hej, rigardu la kanton", por distri lin. La edzo ekridis, poste laciĝis kaj iom post iom fermis la okulojn. Ŝi do metis lin en la liton, zorgis lin starante apud la lito, aŭskultis kokerikojn respondantajn unu al alia en malproksimo, kaj kalkulis, kioma horo estis. Poste ŝi kuntiriĝis en sia malgranda lito kaj endormiĝis. Heliĝis. Ŝi jam ne sönĝis, tamen ŝi povis senintence fermi kaj malfermi la okulojn, rigardis flavajn sunflorojn kun purpura centro senĉese variantajn antaŭ ŝiaj okuloj. Tio ja estis vera plezuro.

Ŝjaŭŝjaŭ edziniĝis al la malgranda edzo, sed ŝi vivis ne pli malfeliĉe ol antaŭe, kaj tion atestis ŝia kresko. En la vento kaj pluvo de la vivo, ŝi kreskis sane, kiel ricino kun prospera foliaro kreskanta en angulo de ĝardeno, atentata de neniuj. Pli kaj pli maturiĝis la virineto, kvazaŭ tute ne konsiderante la edzon.

Someraj noktoj estis kiel sonĝo. Post vespermanĝo oni sidis meze en la korto por ĝui malvarmeton. Oni swingadis palmofoliajn ventumilojn, rigardis la stelojn sur la ĉielo kaj lampirojn ĉe anguloj de la domo, aŭskultis tiratan ĉirpadon de lokusto en kukurbaj pergoloj. Aŭdiĝis diversaj susuroj proksimaj kaj malproksimaj kiel pluvado, kaj la vento saturita de aromo de riza spiko karesis la vizaĝojn de la homoj. . . . ja estis bona tempo por gaja bablado.

Ŝjaŭŝjaŭ sidis plej alte, sur la pajlostako, kun la dormanta edzo en la brakoj. Ŝi mallaŭte kantis kanton kiun ŝi mem elpensis, kaj ŝia kantado hipnotizis ŝin.

En la korto ŝiaj bogepatroj, bogeavoj kaj du viroj, dungitaj



de ŝia familio, senorde sidis sur benketoj, pasigis tempon per bablado.

Ĉe la avo fumis plektaĵo el artemizio, lumanta en mallumo. La plektaĵo estis tre efika por forpeli moskitojn. La artemizia plektaĵo serpentsimile volviĝis ĉe la piedo de la avo, kiu de tempo al tempo prenis kaj swingis ĝin en la aero.

Rememorante scenon viditan sur la draŝejo en tago, la avo diris al la apudsidantoj:

"Mi aŭdis de Sangin, ke an-

taŭhieraŭ preterpasis lernantinoj."

Ĉiuj eksplodis de rido.

Kion signifis la rido? Ĉar en ilia impresio, lernantinoj ne havas harplektaĵon, kun neligita hararo ĝis la nuklo, simila al la vosto de koturno, kaj iom ankaŭ al la hararanĝo de monaĥino. Ili vestis sin kiel okcidentanoj, sed ili ne estis okcidentanoj. Kaj iliaj manĝaĵoj, la uzaĵoj. . . ĉiuj estis malsamaj al la kutimaj, tre komikaj.

Sed Ŝjaŭŝjaŭ ne komprenis

kaj ne ridis. Tiam la avo denove ekparolis:

“Ŝjaŭŝjaŭ, ankaŭ vi estos lernantino, kiam vi kreskos!”

Kaj ĉiuj eksplodis de pli gaja rido.

Ŝjaŭŝjaŭ ne estis ja stulta kaj, opiniante la aferon malfavora al ŝi, diris al la avo:

“Mi ne volas fariĝi lernantino.”

“Vi tre similas al lernantino, kaj vi absolute devas esti.”

“Mi ne volas.”

La aliaj intence ŝercis pri ŝi kaj unuvoĉe diris: “Ŝjaŭŝjaŭ, la avo diris prave, kaj vi nepre devos fariĝi lernantino!”

En konsterniĝo ŝi respondis: “Do mi estos, mi ne timas.” Sed fakte ŝi tute ne sciis, ĉu bone aŭ malbone estos fariĝi lernantino.

Tamen por la kamparanoj de la loko lernantino ĉiam estis mistero. Ĉiun sesan monaton, aŭ en feriaj tagoj, la lernantinoj kelkope venis de iu absurda homplena loko, kaj iris al iu ilia fora loko, preterpasante la vilaĝon. Por la vilaĝanoj tiuj lernantinoj en groteskaj vestoj estis homoj de alia mondo kaj kondukis en neimagebla maniero. Kiam preterpasis lernantinoj, la tuta vilaĝo preparolis ilin dum la tuta tago.

La avo estis gravulo en la vilaĝo. Li iom aŭdis pri la vivo de lernantinoj en urbego, kaj ŝercis pri Ŝjaŭŝjaŭ ke ŝi estu lernantino. La vortoj ne estis senencaj, ilin aŭdinte, la apudsidantoj sentis komikan ŝercon kaj Ŝjaŭŝjaŭ konsterniĝon.

Ŝjaŭŝjaŭ informiĝis de la avo, ke lernantinoj estas tiaj homoj: Ili vestas sin ne konsiderante temperaturon, manĝas ne konsiderante saton kaj malsaton; ili

enlitiĝas en noktomezo, sed nenion faras tage krom ludi pilkon kaj legi fremdlingvajn librojn. Ili estas prodigemaj, kaj ilia jara elspezo estas sufiĉa por aĉeti 16 bubalojn. Kiam ili volas vojaĝi ien, ili ne piediras kaj nur bezonas eniri en grandan skatolon, kiu portas ilin al la celloko. En urboj estas multaj diversaj grandaj kaj malgrandaj skatoloj movataj de maŝino. En lernejo ili lernas kune kun knaboj, konatiĝinte kun la lastaj, ili povas laŭplaĉe dormi kun iu ajn el la knaboj, sen svatanto, sen doto, kaj tion ili nomas “libereco”. Ili rajtas funkcii kiel gubernatoro aŭ prefekto kaj vivi kun siaj familianoj ĉe la ofico, el kiuj viroj estas nomataj “sinjoroj” kaj knaboj “sinjoridoj”. Ili ne bredas bovojn, sed trinkas bovlakton aŭ ŝaflakton konservatan en fera skatoleteto. Kiam ili havas nenion por fari, ili iras al teatrejo simila al granda templo, elpoŝigas unu arĝentan moneron kiu sufiĉas por aĉeti kvin kokinojn en la kamparo, aĉetas malgrandan paperpecon, iras kun la paperpeco en la teatrejon, kaj tie ili sidiĝas kaj rigardas ombro-teatron (filmo). Miskulpiĝite, ili ne ĵuras, nek ploras. Iuj el ili volantas resti fraŭlinoj ĝis la aĝo de 24 jaroj, dum iuj el ili tute ne sentas honton edziniĝi en la aĝo de 30 eĉ 40 jaroj. Ili ne timas virojn, la viroj ne rajtas ofendi ilin, kaj je ofendiĝo ili tuj akuzas kaj postulas monpuni la virojn, kaj la punmonon ili aŭ sole disponas aŭ dividas inter si kaj la juĝejo. Ili ne lavas vestojn nek kuiras, bredas nek porkon nek kokon. Se ili havas bebon, ili pagas kvin aŭ dek dolarojn monate al dungito, por ke tiu vartu la bebon, kaj ili mem tuttage rigardas teatraĵon, ludas kartojn aŭ legas tute senutilajn, distrajn librojn. . .

Unuvorte, tiuj aferoj estis tre strangaj, fremdaj por la kamparanoj, kaj iuj el ili eĉ absurdaj. La rakonto de la avo vekis ĉe Ŝjaŭŝjaŭ svagan deziron: ĉu ŝi agos kiel la lernantinoj priskribitaj de la avo, se ŝi fariĝos lernantino? Bone aŭ malbone, fariĝi lernantino estas nenio timinda.

Informiĝinte de la avo pri la lernantinoj, Ŝjaŭŝjaŭ ridis plej longe. Kiam ŝi plezuriĝis de plena rido, ŝi diris:

“Avo, se morgaŭ preterpasos lernantinoj, vi nepre rimarkigu min, mi volas vidi ilin.”

“Se vi rigardos ilin, ili forportos vin kaj prenos vin kiel servistinon.”

“Mi ne timas ilin.”

“Ĉu vi ne timas, ke ili legas fremdlingvajn librojn kaj preĝlibrojn?”

“Mi ne timas, eĉ se ili legos budhismajn sutrojn.”

“Kiel mandarenoj ili mordas homojn, kaj precipe kamparanojn. Ili manĝas homojn, eĉ ne lasante la ostojn. Ĉu vi ne timas?”

Ŝjaŭŝjaŭ respondis certige: “Ne timas.”

Sed tiutempe la edzo en ŝiaj brakoj ekploris en dormo, kaj ŝi devis malplorigi lin duontimige en patrina maniero:

“Fraĉjo, ne ploru, ne ploru plu, alie lernantino mordos vin.”

Sed la edzo ankoraŭ ploris, kaj ŝi devis iradi tien kaj ĉi tien kun li en la brakoj. Ŝi foriris de la avo kaj tiu babilis pri aliaj aferoj.

De tiam Ŝjaŭŝjaŭ ĉiam havis lernantinon en sia koro. En sonĝo ŝi vidis ke ŝi iras en ilia

vico. Ŝi sentis ke ŝi kvazaŭ iam estis en la kurpova skatolo, sed tiu kuris malpli rapide ol ŝi. La skatolo en ŝia sonĝo estis simila al grentenejo, en kiu kuradis malgrandaj grizaj ratoj kun ruĝaj okuloj, kelkfoje enŝoviĝis tra la fendo de pordo kaj restigis la malgrandan voston ekstere.

Kaj post tio la avo ne nomis Ŝjaŭŝjaŭ “knabineto”, nek Ŝjaŭŝjaŭ, sed “lernantino”. Kaj ŝi pretervole respondis al la voko.

La tagoj en la kamparo ĉiam variis same kiel la tagoj de la mondo. Parto de la homoj en la mondo prodigis la tagojn, dum Ŝjaŭŝjaŭ kaj ŝiakategoriaj homoj tre domaĝis la tagojn. Oni ricevis laŭ la destino. Multaj civilizitoj en la urboj pasigis la tutan someron en molaj silkaj vestoj, delikataj trinkaĵoj kaj diversaj plezuraj aferoj; dum la familio de Ŝjaŭŝjaŭ rikoltis dank’ al la penado en la somero dekelkajn ĝin-ojn (unu ĝin-o egalas 0.5 kg.) da kanaba fibro kaj 20-30 pikulojn da kukurboj.

Dum la somero, zorgante pri la edzo, Ŝjaŭŝjaŭ ŝpinis 4 ĝin-ojn da kanaba fibro. Aŭtune, en la oka monato, la dungitoj rikoltis kukurbojn kaj ŝi distriĝis inter la kukurboj grandaj kiel pelvo, kovritaj de maldika tavolo da grizeta pulvoro. Ĉe la rikoltado de kukurboj venis aŭtuno, kaj en la korton alflugis de la arbaro post la domo ruĝaj kaj flavaj folioj. Ŝjaŭŝjaŭ staris apud la kukurba stako, kun fasko da folioj en la mano, kaj plektis por la edzo malgrandan ĉapelon.

Inter la dungitoj estis 23-jara junulo nomata Piga Hundo. Li prenis la edzon de Ŝjaŭŝjaŭ en siajn brakojn kaj iris sub jujubarbon. Li frapis per bambua stango la branĉojn kaj multaj jujuboj falis teren.



“Fraĉjo Piga Hundo, ne frapu plu, jam estas tro multe.”

Malgraŭ ŝia peto li daŭre frapis la branĉojn, kvazaŭ li klopodis tute por la malgranda edzo kaj tial ne aŭskultis ŝin. Kaj ŝi avertis sian malgrandan edzon: “Frateto, ne prenu plu. Via ventro doloros, se vi tro multe manĝos!”

La edzo obee iris al Ŝjaŭŝjaŭ kun multe da jujuboj kaj petis ŝin manĝi.

“Franjo, prenu, jen la granda.”

“Mi ne volas.”

“Manĝu almenaŭ unu!”

Sed ŝiaj manoj estis okupataj — ŝi estis plektanta la randon de la ĉapelo kaj bezonis helpon.

“Frateto, metu jujubon en mian buŝon.”

Li plenumis la ordonon kaj ekridegis pro sia interesa helpo.

Ŝi ordonis al li demeti la jujubojn kaj firme teni la ĉapelan randon, por ke ŝi povu enplekti pliajn foliojn.

La edzo obeis al la ordono, sed li petole svingiĝis kantante. La infaneto estis petolema, kiam li ĝojis, same kiel kato.

“Frateto, kion vi kantas?”

“Kanton instruitan de frato Piga Hundo.”

“Kantu por mi.”

Tenante la ĉapelrandon, la edzo kantis laŭ sia memoro:

Sur la ĉielo nuboj floras,

Inter maizoj faboj kreskas,

Altan maizon fabo volas,

Fraŭlon knabino flora ravas.

*Sur la ĉielo nubo ŝvebas super
nubo,*

*Sur la tero tombo staras apud
tombo,*

*Ĉarma knabino lavas bovlon
post bovlo,*

*Sur ŝia lito homo kuŝas sur
homo.*

La edzo tute ne komprenis la kanton. Kantinte, li demandis Ŝjaŭŝjaŭ, ĉu la kanto estas bona. Ŝjaŭŝjaŭ kapjesis kaj demandis, kiu instruis al li, kvankam ŝi jam sciis, ke tion al li instruis Piga Hundo.

“Fracjo Piga Hundo diris al mi, ke li povas kanti ankoraŭ multajn kantojn kaj promesis instrui al mi kiam mi kreskos.”

Informiĝinte, ke Piga Hundo estas lerta en kantado, ŝi petis lin:

“Frato Piga Hundo, bonvolu kanti por mi belan kanton.”

Piga Hundo aspektis ne kiel honestulo. Petite de Ŝjaŭŝjaŭ, li kantis por ŝi “Dekjara edzino

kaj unu-jara edzo”. La kanto diris, ke la edzino povas fari malvirtaĵojn, ĉar la edzo nenion scias krom mamsuĉi. La edzo de Ŝjaŭŝjaŭ tute ne povis kompreni la kanton, kaj Ŝjaŭŝjaŭ komprenis nur iom. Aŭskultinte la kanton, Ŝjaŭŝjaŭ ŝajnis sin komplete kompreninta kaj diris al Piga Hundo en ŝajnigita koleto:

“Frato Piga Hundo, ne licas kanti tian kanton, ĝi estas insulta kanto!”

Piga Hundo ekskuzis: “Ne, ĝi ne estas insulta kanto.”

“Mi ja komprenas, ĝi estas insulta.”

Estis malfacile ekskuzi sin. Piga Hundo do petis ŝian pardonon promesante ne plu kanti tian kanton. Rimarkinte, ke ŝi jam komprenas la aferon, li timis, ke ŝi diros la aferon al la avo, sekve tiu insultos lin. Li turnis la parolon al “lernantinoj”. Li demandis Ŝjaŭŝjaŭ, ĉu ŝi iam vidis la lernantinojn gimnastiki kaj kanti fremdlingvajn kantojn.

Se Piga Hundo ne menciustion, ŝi preskaŭ forgesus la aferon pri lernantinoj. Nun li menciis “lernantinojn”, kaj ŝi demandis lin, ĉu preterpasos ankoraŭ lernantinoj, kiujn ŝi volas vidi.

Transportante kukurbojn de la pergoloj en la angulon de la korto, Piga Hundo rakontis al Ŝjaŭŝjaŭ pri la kantado de lernantinoj, kaj la fonto de lia rakonto estis de ŝia avo. Li fanfaronis al Ŝjaŭŝjaŭ, ke li iam vidis sur la ŝoseo kvar lernantinojn, kiuj, tenante flagon en la mano, kantis same kiel militisto, kvankam ili ŝvitis kaj anhelis pro la longa irado. Sendube tio estis absoluta mensogo, sed tio jam estis sufiĉe ĝojiga por

Ŝjaŭŝjaŭ, ĉar Piga Hundo nomis tion “libereco”.

Piga Hundo estis flirtema, gaja kaj ŝercema. Kiam Ŝjaŭŝjaŭ diris kun envio: “Frato Piga Hundo, kiel grandaj estas viaj brakoj,” li respondis: “Grandaj ne nur miaj brakoj.”

“Ankaŭ via korpo estas granda.”

“Ĉio sur mia korpo estas granda.”

Ŝi ne povis tute kompreni lian sugeston, kaj nur sentis, ke li estis stulteta kaj ridiga.

Kiam Ŝjaŭŝjaŭ foriris kun sia edzo, kamarado de Piga Hundo, kiu nomiĝis Mutulo, ekparolis rompante sian silentemon:

“Piga Hundo, ne faru malvirtaĵon. Ŝi estas virgulino nur dektri-jara kaj devas atendi almenaŭ dek jarojn ĝis la efektiva edziniĝo.”

Piga Hundo nenion diris, donis frapon al li kaj iris pluki la jujubojn sur la tero.

Ĝis la aŭtuno Ŝjaŭŝjaŭ pasigis jam unu kaj duonan jarojn en la familio de sia edzo.

Esperantigis **ŬANG GENĜONG**
(Daŭrigota)

* *La novelo estis verkita en 1929. Ĝi fidele prezentas la socion de la tiama Ĉinio, precipe de okcidenta Hunan-provinco. En la posta duonjarcento granda ŝanĝiĝo okazis al la ĉina socio, kaj la malbona moro de feŭdisma edzeco kaj la distordiĝo al la homeco kaŭzita de la izolita socio de la tiama okcidenta Hunan-provinco, kiujn la aŭtoro priskribas en la novelo, jam fariĝis foraj pasintaĵoj.*

** *Ĉina blovinstrumento en formo de korno, kun truita tubo kaj latuna tasa buŝpeco.*

Ĉefaj poeziaj skoloj kaj iliaj poetoj en la Sudaj kaj Nordaj Dinastioj

de MEJ ĜI



Portreto de Šje Ling-jun

Kiam Ĝin-dinastio (265-420) pereis, la norda nacimalplimulto Ŝjanbej kun la ĉefo Tŭoba Guj konkeris la nordan Ĉinion, kaj de tiam Ĉinio eniris la periodon de la Sudaj kaj Nordaj Dinastioj (420-589) en la ĉina historio.

La suda Ĉinio estis regata de la dinastioj Song, Ĉji, Ljang kaj Ĉen unu post alia, la politiko estis relative stabila, la ekonomio prospera kaj ankaŭ la literaturo vigla. Sed la norda Ĉinio dronis en sinsekvaj militoj, tial ĝia poezia rondo en la pli ol cent jaroj estis malprospera kaj havis nenian menciindan sukceson.

En tiu periodo evidenta ŝanĝiĝo okazis en la literaturo (precipe evidenta en poezio), nome pejzaĝaj poemoj iom post iom anstataŭis metafizikajn poemojn. En la periodo de Ĝin-dinastio furoris metafiziko, kies influo daŭris ankaŭ en la periodo de la Sudaj kaj Nordaj Dinastioj. Literaturistoj ofte ekskursis kune kaj ĝuis la belecon de la naturo. Precipe la poetoj de la Sudaj Dinastioj sin plezurigis ĉe montoj kaj riveroj sude de Jangzi-rivero kaj babilis pri metafiziko. Ili komencis meti pejzaĝajn versojn en siajn poemojn pri metafiziko. Tio poste plie disvolviĝis. Šje Ling-ĵun (385-433) naskiĝis en plutokrata familio kaj vivis lukse. Sed lia oficista vojo estis malglata, kaj fine li estis mortigita en konflikto inter plutokrataj klikoj. Li travojaĝis multajn pejzaĝajn lokojn kaj krome havis malfeliĉajn travivaĵojn, tial li turnis sian intereson al la naturo kaj verkis multajn bonajn versojn priskribantajn la belecon de la naturo, kiuj estas freŝaj kaj ŝatataj por la legantoj. Ekz.:

*En kamparo sabla bordo puras,
Aŭtunluno helas sur ĉielo.*

*Ĉarmas verdejo en printempo tarda,
Hezitas blankaj nuboj super monto alta.
Lageto prosperas danke de printempaj herboj,
En saliko kantas diversaj birdoj.*

Krome, Šje Ling-jun verkis ankaŭ lirikojn kun priskribo de pejzaĝoj. Ekz., lia poemo "Jarfino" estas bona lirika poemo kun priskribo de pejzaĝo.

*Mi sendormas de profunda zorgo,
Turmentita en senfina nokto.
Sur blankan neĝon la luno lumas,
Norda vento triste muĝas.
Jen forpasas tempo la senhalta,
Mi jam urĝe sentas min aĝalta.*

La versaĵoj bildiĝas nebulan neĝan scenon inter la tero kaj ĉielo kaj muĝantan blovon de norda vento. Frontante kontraŭ la senlima naturo, la poeto tranoktas sendorme pro forta ĉagreno senti ĉion en la mondo nur efemera, kaj tio vekis ĉe li senliman kaj profundan malĝojon. La poemo estas sukcesa kaj en pejzaĝa bildigo kaj en sento-priskribo.

La pejzaĝaj poemoj de Šje Ling-jun portis freŝecon al tiama poezio. Sed el liaj verkoj tiaj bonaj poemoj kiel "Jarfino" estis malmultaj. Liaj poemoj spegulas vivon relative mallarĝan kaj li ofte metis malfacile kompreneblajn frazojn kaj pasivan metafizikan sentimentalon en la vivecan priskribon pri pejzaĝoj. Tio serioze detruis la perfektecon de liaj poemoj. Postuloj kritikis, ke li havis bonajn versojn, sed ne bonajn poemojn. Tamen li kreis poezian skolon per siaj poemoj.

En la periodo de la Sudaj kaj Nordaj Dinastioj la poezia arto multe progresis. La

plej elstara progreso estis eltrovo de "La kvartona fonetiko de la ĉina lingvo" kaj granda atento donita al antitezo en tono kaj senco en verkado, kio pliperfektigis la rimojn kaj ritmojn de poemoj. En Jongming-erao (483-493) de la Suda Ĉji-dinastio formiĝis nova poezia stilo "Jongming-stilo". Ĝi rigore emfazis rimojn, ritmojn kaj antitezon, kio markis, ke la ĉina poezio faris gravan paŝon en sia evoluo, de la relative libera "antikva stilo" al la moderna stilo kun rigoraj rimoj kaj ritmoj.

Ŝje Tjaŭ (464-499), unu el la fondintoj de Jongming-stilo, estis tre eminenta poeto. Li estis parenco de Ŝje Ling-jun, tial oni nomis lin Malgranda Ŝje. El liaj poemoj la plej elstaraj estas ankaŭ tiuj pri pejzaĝoj. Lia fama poemo "Vespera Retrorigardo de sur Sanŝan-monto al la Ĉefurbo" vivece priskribis la vidaĵojn, kiujn li vidis de sur la alta monto: La majestan palacon, vastan riveron kaj florojn, herbojn kaj birdojn sur insuletoj. El ĝi la jena koplo estas tre bela:

*Krepuskaj nubflokaj satene girdandas,
la klara rivero kviete rubandas.*

La vespera krepusko sur la ĉielo estas kiel satenoj dise pendantaj super la horizonto kaj Jangzi-rivero klara, kvietaj kiel blanka silk-rubando senfina. Kia rava, ebriiga spektaklo! El la poemoj de Ŝje Tjaŭ estas multaj tiaj versoj belaj kaj ravaj. Ekz.:

*De l' horizonto alvenas ŝipveloj,
en nebulo kaŝiĝas foraj arboj,*

La versoj prezentas bildon de revenanta velŝipo kaj arboj ĉe la horizonto kaj esprimas la kvietan, harmonian animstaton de la poeto.

*En fenestroj viciĝas foraj montoj,
En la korto staras altaj arboj.
Ĉe la sunleviĝo disflugas birdoj,
Simisoleca krio en vespera monto.
Montoj konturiĝas sur blanka neĝo,
Vidiĝas tra nebulo l' pala suno,
El vualo rigardas vilaĝo ĉe l' rivero,
Kaj apudmaraj arboj verdprosperaj.*

La versoj prezentas ĉinstilajn pentraĵojn de pejzaĝoj serenaj, sed poezi-riĉaj. Li sukcese verkis ankaŭ mallongajn poemojn, ekz., "Sopiro", kiuj estas naturaj kaj implicaj. Per tio li kreis novan formon de poemoj — kvarversan poemon.

Samtempe kun la kreado de pejzaĝa poemo fare de Ŝje Ling-jun, Ŝje Tjaŭ k.a., alia granda poeto Baŭ Ĝaŭ (414?-466) famiĝis per siaj ĉarmaj *jüefu*-poemoj. El la de li lasitaj pli ol 200

poemoj, pli ol 80 estas *jüefu*-poemoj, kaj ĉiuj eminentaj.

Baŭ Ĝaŭ devenis de malriĉa familio kaj iam okupiĝis pri agrikultura laboro. En la regperiodo de plutokratoj li ne povis glate efektiviĝi sian ambicion. Tia medio ebligis al li heredi kaj disvolvi la tradicion de la *jüefu*-aj popolaj kantoj de la dinastioj Han kaj Ŭej, por priskribi la vastan socian vivon kaj esprimi profundan simpatian al la subpremataj popolanoj.

El liaj poemoj la plej eminentaj estas 18 *jüefu*-stilaj poemoj kun titolo "Laŭ Melodio de Malfacila Vojo". "Melodio de Malfacila Vojo" estas antikva melodio de *jüefu*-o de Han-dinastio. Ili ne estis verkitaj en sama tempo kaj loko kaj ĉiuj estas famaj. El ili la sesa poemo esprimas lian aflikton, rigidecon kaj malcedemon al la plutokrata regado. La kvara estas simila al la sesa. Li komencis per la versoj:

*Akvo verŝita sur ebena tero
Eosten, uesten, suden kaj norden fluas.*

kaj sin konsolis per la verso:

La homan vivon jam destinis la sorto.

Post tio la poeto prezentis sian plendon per jenaj versoj:

*Mi konsolas min per vino,
Sed malfacile peli triston per la kanto.*

El la 18 poemoj kvin temas pri amo kaj edzeco. La naŭa havas jenajn versojn:

*Kanti plore de ĉagreniĝo,
Kiam mi povus vivi feliĉe?
Mi preferus vivi kiel anaso, sed pare,
Ol vivi kiel gruo, sed sole.*

La versaĵo priskribas virinon perdintan liberecon de amo. Ŝi preferas vivi malriĉe kun sia amato, ol esti kromedzino de riĉulo turmentata de soleca vivo, kaj aspiras liberecon de la amo.

El tiuj poemoj kelkaj priskribas la vivon de garnizonaj soldatoj ĉe landlimo kaj ĉagrenan sopiron de iliaj edzinoj en soleca vivo. Ekz., la dekkvara poemo "Li Armeaniĝis en Juneco" prezentas la malesperan ĉagrenon de soldatoj, kiuj devis longtempe garnizoni ĉe landlimo eĉ dum la tuta vivo.

Tiuj poemoj havas riĉan kaj profundan enhavon kun forta sento. Ili portas klarajn kaj variajn ritmojn, tial grave influis multajn postajn poetojn. □

Kvar Poemoj de la Sudaj kaj Nordaj Dinastioj

Senzorga vojaĝo

de ŜJE LING-JUN

*Sereno regas de mateno ĝis vesper' —
eĉ mont' kaj akvo sunbrilon entenas.
Kia delico en la sunradia hel'!
Pro ĝojo l' vagabondo ne revenas?*

*Ĉe la aŭroro mi ekmarŝis el la val';
Vespere en boaton mi eniras —
obskur' sin sternas inter montoj, tra arbar',
kaj horizonte nuboj sin kuntiras.*

*Lotusoj kaj trapoj konkuras per salut',
kaj milde gladioloj min karesas;
mi boras vojon en la verdo al la sud',
ĝis orienta pordo l' gaj' ne ĉesas.*

*Kondukas senzorgemo ĉiam al trankvil',
kaj venas nur kontento kaj plezuro.
Bonfartemuloj, al vi la bona konsil'.
Deviu do neniam de l' naturo!*

Mi ja estas viro!

(en melodio de "Malfacila Vojo")

de BAŬ ĜAŬ

*Dum la manĝo appetit' diskrevas;
mi per glavo frapas la kolonon kun suspiro.
Longe oni povas vivi? Mi ja estas viro!
Ĉu vegeti mi senfare devas?
La oficon firme mi forlasas.
En la hejmo ŝime mi min kaŝas.*

*El la hejm' mi iras en mateno;
kaj vespere mi revenas frue.*



*Jen petoli kun infanoj brue,
jen rigardi tekson de l' edzino.
De la antikveco la sanktuloj est' malriĉaj.
Kio estas do ni, rigidnukaj, senprestigaĵ!*

Vespera retrorigardo de sur Sanŝan-monto al la ĉefurbo

de ŜJE TJAŬ

*La bordo de Baling al Ĉang'an rigardas,
rigardo de Hejang al Lŭojang pli ardas.*

*La suno tenere karesas alerojn;
mi povas tre klare eĉ vidi lintelojn.*



*Krepuskaj nubfloroj satene girlandas,
la klara rivero kviete rubandas;
la delton dorlotas birdetoj trilantaj
kaj kampojn tapiŝas petaloj la floraj.*

*Mi devas foresti por longa tempdaŭro.
Pri jama banked' nur sopir' kaj bedaŭro!
Ho, kiam la tago hejmena alvenos?
Kun larmoj grajlantaj mi vee min trenos. . .*

*Ju pli l' nostalgio persiste turmentas,
des pli la hararon grizeco arĝentas.*

Sopiro

de ŜJE TJAŬ

*noktovual' kurtena fal'
jam morto de flugado de lampiro
maldorma hor' kudrad-fervor'
sed vana al amato la sopiro*

Elĉinigis ŜJE JONGJONG

Printempo de ĉinaj porinfanaj filmoj

Estas mirinde, ke en Ĉinio troviĝas 380 milionoj da infanoj. Ili estas kreskantaj kaj bezonas diversajn kulturajn nutraĵojn, inkluzive de porinfanaj filmoj. Song Ĉong, eksreĝisoro kaj nun estro de la Ĉina Porinfana Filmstudio, diris al mi: "Infanoj ŝatas filmojn. Ili havigas al si ĝojon kaj sciojn kaj nobligas sian spiriton pere de la ekrano. Bonaj porinfanaj filmoj estas fenestroj por ili koni la mondon." Li daŭrigis: "Niaj filmoj devas doni pli da rido al

infanoj, por ke ili kresku en rido."

Song Ĉong estas fakulo kaj bone konas la historion de la porinfanaj filmoj. Mi informiĝis de li, ke la ĉinaj porinfanaj filmoj trapasis tri stadiojn en sia disvolviĝo. La 17 jaroj de 1949 ĝis 1966 estis ĝerma stadio de porinfanaj filmoj. En tiu stadio produktiĝis 39 porinfanaj filmoj, inkluzive de la eminenta filmo "Soldateto Ĝang Ga", prikan-tanta malgrandan kontraŭfaŝisman heroon kaj multe influanta

ĉinajn infanojn. La ĝermaj filmoj penis speguli la buntan vivon de infanoj. Surekraniĝis amindaj figuroj de saĝaj, gajaj, kuraĝaj kaj naivaj infanoj. Kiam glate disvolviĝis la afero de porinfanaj filmoj, okazis la kultura revolucio en Ĉinio, kiu kaŭzis la dekjaran kaoson de 1966 ĝis 1976. Aperis la dekjara dezerta stadio de porinfanaj filmoj. En tiuj dek jaroj produktiĝis nur 7 porinfanaj filmoj, el kiuj nur la filmo "Trembrilanta Ruĝa Stelo", spegulanta la batalan vivon de infanoj en la periodo de revoluciaj militoj, estis relative bona kaj la aliaj havis evidentajn mankojn de formulismo kaj ne estis ŝatataj de infanoj. La kaoso finiĝis kaj la nigra nubo forpasis. Venis printempo de porinfanaj filmoj kaj aperis la dekjara impeta stadio de porinfanaj filmoj. En la dek jaroj de 1976 ĝis 1986 produktiĝis 70 porinfanaj filmoj, dekoble pli multe ol en la dek jaroj antaŭ 1976. Tamen ili estis tro malmultaj por la grandnombraj infanoj de Ĉinio. Nun oni jam rapidigas la paŝojn por produkti porinfanajn filmojn. La ŝtato fondis la Ĉinan Porinfanan Filmstudion. Ĝi markas, ke la filmado de porinfanaj filmoj jam fariĝis entrepreno en Ĉinio. La filmstudio produktas pli ol 5 filmojn ĉiujare, kaj plie la ŝtato postulas, ke la filmstudioj en diversaj lokoj de la lando produktu almenaŭ po unu porin-

Song Ĉong kaj infanoj





Fama ĉina reĝisoro Ŝje Tjan (meze staranta) direktas filmadon de nova porinfana filmo.

fanan filmon ĉiujare. Tiel pli ol 20 novaj filmoj ĉiujare povas ĝuigi la infanojn.

Mi demandis Song: "Kiajn trajtojn havas la ĉinaj porinfanaj filmoj?"

Laŭ lia opinio la unua trajto estas sana enhavo. Konsiderante la edukon rolan de la porinfanaj filmoj, oni rafinas temojn kaj enhavojn de filmoj kaj per sanaj bildoj de vivo kaj figuroj de respektataj personoj edukas infanojn patriotaj, moralaj kaj ĝentilaj. La intrigoj kaj bildoj malutilaj al la spirito de la infanoj, precipe la obscenaj kaj teruraj scenoj, estas malpermesitaj. Scenaristoj, reĝisoroj kaj filmistoj bone scias, ke oni devas infekti la malgrandajn rigardantojn per sanaj filmoj, se oni vo-

las modli belan animon kaj kulturi la nacian spiriton de la infanoj. La filmo "Kabano sub Lunlumo" priskribas, kiel elkarcerigito suriris ĝustan vojon. Antaŭe li enprizoniĝis pro ŝtelo. Lia edzino mortis de kolerego kaj liaj tri filoj fariĝis vagabondoj. Li revenis, sed liaj filoj lin malamamis kaj molestis, kio forte doloris lin. Li silente perlaboris monon, pagis por ilia lernado kaj plibonigis ilian vivon. Per tio li ŝanĝis ilian opinion pri li. La disigita familio ekhavis ĝojon. La filmo edukas ne nur plenaĝulojn, sed ankaŭ infanojn. La filmo kun sana enhavo edukas la malgrandajn rigardantojn per vero, bono kaj belo, ne priskribante kiel la patro faris ŝteladon.

La dua trajto de la ĉinaj porinfanaj filmoj estas variaj temoj kaj specoj. Estas filmoj pri historio, biografio, milito, moderna vivo, mito, popola rakonto, scienca fikcio k.a. Laŭ la specoj estas filmoj pri tradiciaj luktoj, operoj, bestoj, amuzoj kaj komedioj. La porinfanaj filmoj kun variaj temoj, enhavoj, specoj kaj formoj freŝe impresas la malgrandajn rigardantojn kaj multe altiras ilin.

La tria trajto estas akcenti la intereson de la infanoj. La filmoj por infanoj diferencas de tiuj por plenaĝuloj per forta etoso de la infana vivo, iliaj temperamento kaj intereso, t. e. observi kaj speguli la vivon laŭ infana psiko kaj vido. La filmistoj direktas sian atenton al



Sceno el la filmo "Knabo Peng Dehŭaj"

prezentado de infanaj trajtoj, nome parolemo, petolemo, scivolemo kaj revemo, kaj esprimas ilian ĝojon kaj malĝojon por senti al ili, ke la filmoj efektive spegulas ilian vivon. Kombino de eduko kun amuzo celas pensigi kaj ridigi la infanojn. La temoj estas seriozaj kaj la rakontoj humuraj. Eduko troviĝas en amuzo, kaj seriozeco en humuro. Tion ekzemplas la filmo "Tintas Fonto". Ĝi priskribas, kiel iu emerita instruistino amikiĝis kun najbaraj antaŭlernaĝaj infanoj kaj la lastaj tre amas tiun afablan avinon. Foje ŝi enhospitaliĝis pro malsano. Por sendi al ŝi donacon, la infanoj algluis eluzitajn poŝtmarkojn al la paketo, kio vekis ridon ĉe poŝtovicistoj. La filmo prezentas la belan animon de la infanoj per iliaj naivaj agoj. En ĝi estas kaj seriozeco kaj humuro, kaj instruo kaj ĝojo.

La kvara trajto estas, ke oni produktas malsamajn filmojn laŭ malsamaj aĝoj, artaj postuloj kaj komprenpovo de la infanetoj, infanoj kaj geknaboj. La filmo "Bela Fraŭlino" pri bes-

toj servas al infanetoj. Sur ekrano aperas pandoj, simioj kaj tigroj. Amindaj bestoj faris multajn ridindajn agojn kaj ludis akrobataĵojn. Ili vekis sonorajn ridojn ĉe la infanoj. La filmo "Fejfej Filmaktoriĝis" servas al pli grandaj infanoj. Ĝi priskribas, kiel Fejfej hazarde fariĝis aktoro. Li estas infano vigla kaj

kuraĝa kaj scias naĝi kaj rajdi, sed ne kapablas ridi kaj plori en ajna momento kiel plenaĝaj aktoroj. La reĝisoro ordonis, ke li ploru antaŭ la kamerao, sed li ne povis larmi pozante nur kiel ploranto. Tio estas ridiga. La reĝisoro helpis lin en la ludado, ke li fine sukcesis larmi, modlis suferoplenan figuron de infano kaj fortuŝis milojn kaj dekmilojn da malgrandaj spektantoj. La filmo "Knabo Peng Dehŭaj" servas al geknaboj. Ĝi priskribas la heroaĵojn de marŝalo Peng Dehŭaj en la knabeco. Li malfermis grenejon per hakilo por helpi la malsatajn polanojn. Tian filmon ne komprenas infanetoj kaj eĉ dekjaraj infanoj. Ĝi estis farita por geknaboj.

Nun kreskas scenarista trupo de porinfanaj filmoj servanta al la ĉina filma afero. La ŝtato kaj ŝtataj entreprenoj starigis diversajn premiojn kaj okazigas premiadon unufoje ĉiujare por stimuli la scenaristojn, reĝisorojn kaj filmistojn de porinfanaj filmoj. □

Sceno el la filmo "Fejfej Filmaktoriĝis"



Mallarĝaj stratetoj en Suĝoŭ

Foto de CAJ MING

La urbo Suĝoŭ kun historio de 2 500 jaroj konservas multajn mallarĝajn stratetojn, kvankam ĝi pli kaj pli noviĝas en la aspekto. Ambaŭflanke de la mallarĝaj, tamen longaj stratetoj estas popolaj loĝdomoj kun nigrategola tegmento, kalkita muro kaj ligna pordo. La stratetoj pavimitaj per ŝtonpecoj elspiras antikvecon kaj kvietecon. Ĉe angulo de iu strateto la florbutiko Lingling altiras pasantojn

per belegaj floroj. La televidilaj antenoj super la domoj konturiĝas sur la lazura ĉielo, spegulante la modernan vivon de la loĝantoj.

Vespere oni gaje babilas, sidante antaŭ sia domo por ĝui someran malvarmetecon.


Kelkaj mezlernejoj, kiuj intencas partopreni en la enira ekzameno por altlernejoj, diris al mi: "Kvietaj estas la mallarĝaj stratetoj de nia Suĝoŭ, tamen ili ĉiuj kondukas al la ĉefstrato."

Strateto en pluvo



Florbutiko






Ĉe rivero





Amuzejo ĉe iu strateto

Lernantino de elementa lernejo



Infanĝardeno en mateno








Du drakoj (supre), rajdado (meze) kaj intervidiĝo de gasto kaj mastro (sube)


Vojaĝanta karavano



Parto de ĉevalĉaro

Ŝtonaj reliefoj de Han-dinastio

de ŬANG KAJ



Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.) en la historio de Ĉinio estis periodo de ŝtata unueco, nacia solidareco kaj ekonomia kaj kultura prospero. La divers-specaj ŝtonaj reliefoj simbolis la prosperan kulturon de tiu tempo.

La ŝtona reliefo estis ornama bildo, skulptita per tranĉilo sur ŝtono. Tiaj reliefoj plejparte troviĝis en grandaj tombaj ŝtonĉambroj kaj sur ŝtonaj kolonaĵoj, steleoj kaj pontaj balustradoj. Laŭ statistiko, ĉ. 10 000 ŝtonaj reliefoj de Han-dinastio estas elterigitaj en Ĉinio.


La ŝtonaj reliefoj estas trovitaj ĉefe en kvar regionoj: 1. En la limregiono de Ĝjangsu, Ŝandong, Henan kaj Anhuj. La ŝtonaj reliefoj estas multe kaj

Kopiaĵo de bildo pri paŝtado kaj plugado



vaste elterigitaj en la regiono, ilia enhavo riĉa kaj la skulpturo komplika. Ili formas sian apartan artan sistemon, per bildoj delikataj kaj senspacaj. 2. En la regiono de Hubej kaj Henan, t.e., en Nanjang de la sudokcidenta Henan-provinco kaj Ŝjangfan de Hubej-provinco. La ŝtonaj reliefoj tie estas multaj kaj enhavoriĉaj. Ili sin karakterizas per modesteco, versimileco, harmonieco, striokrudeco kaj temoklareco. 3. En la regiono de Siĉŭan-provinco ĉefe en la ĉirkaŭaĵo de ĝia ĉefurbo Ĉengdu. La ŝtonaj reliefoj tie similas al tiuj de la regiono de Henan kaj Hubej en esprimaj manieroj. Sed la nombro estas malgranda kaj la enhavo simpla. 4. Ĉe la limregiono de Ŝanŝji kaj Ŝenŝji, ĉefe en la baseno de Uding-rivero norde de Ŝenŝji-provinco kaj okcidenta Ŝanŝji-provinco. La ŝtonaj reliefoj tie estas ne tre multaj, tamen ilia enhavo estas riĉa. La reliefoj estas faritaj plejparte sur ebena polurita surfaco, tial la bildoj estas klaraj.

La temoj de tiuj ŝtonaj reliefoj estas diversaj. Iuj prezentas scenojn de produktado, kiaj plugado, ŝpinado, teksado, vinfarado, tinkturado, ĉarofarado, veturigado kaj fiŝado, aliaj vidigas luktadon kun malamikoj, triaj montras festenon kaj ĉasadon de altranguloj, kvaraj priskribas dancadon kaj akrobataĵon. Kaj krome, la ŝtonaj reliefoj reaperigas en si historiajn rakontojn kaj mitojn, arkitekturajn ornamaĵojn, bestojn kaj birdojn, sunon, lunon, stelojn, nubojn kaj ankaŭ figurojn de dioj. Precipe menciindas la bildo pri Fuŝji kaj Njuŭa. Ili kun homa kapo kaj serpenta korpo intervolviĝas unu kun la alia. Legendo diras, ke ili estas prapatroj de la homaro, kaj la homoj estas kreitaj de ili. Tio es-



Kopiaĵo de bildo pri Fuŝji kaj Njuŭa

tas simila al la okcidenta legendo, ke la homoj estas kreitaj de Adamo kaj Eva. Estas menciinda ankaŭ la mito pri la Bovisto kaj Teksistino. La Teksistino estas nepino de la ĉiela imperiestro. Ŝi tutjare teksas nubobrokaton por li. Depost kiam ŝi edziniĝis al la Bovisto, ŝi ĉesis teksti. La ĉiela imperiestro kolere apartigis ilin per la Lakta Vojo (la Arĝenta Vojo). Li permesis al ili renkontiĝi nur vespere de la 7-a de la sepa monato laŭ la lunkalendaro de Ĉinio ĉiujare. En tiu vespero ĉiujare pigoj konstruas ponton por ili per si mem, kaj tiel la Bovisto kaj Teksistino renkontiĝas sur la ponto. Tial

(Daŭrigo sur p. 14)

Kolombumo de Matematikisto

(Humuraĵo)

Matematikisto promenas kun sia amatino en parko. La lasta demandas: "Ĉu vere mia lentuga vizaĝo ne malplaĉas al vi?" "Absolute ne," respondas tenere la matematikisto, "la plej granda ŝato dum mia vivo estas trakti pri decimalaj komoj."

Testo de inteligenteco

Fratoj Ming, Hŭa kaj Ĉeng havas po unu seruron kaj ŝlosilon, per kiuj ili ŝlosas sian propran havaĵon en respektiva

kesto de la komuna ŝranko.

Foje la patro diris al ili: "Mi aĉetis piedpilkon kaj netis ĝin en la ŝrankon. Mi postulas, ke vi ŝlosu ĝin tiel, ke ĝi povu esti elprenita nur tiam, kiam vi ĉiuj ĉeestas. Kiel uzi la serurojn?"

Ming diris: "Mi jam elpensis la solvon."

Kiel ili ŝlosas la ŝrankon?

(Solvo trovebla en ĉi tiu numero)

Moviĝanta Alumeto

(Eksperimenteto)

Ludmaniero: Fari fendon sur la alumet-stango ĝis 1/4 de ĝia longo kaj enmeti peceton da sapo en la fendon. Meti la alumeton sur akvon. Nun la alumeto povas moviĝi antaŭen per si mem sur la akvo.


Kialo: Pro la tiro de la mal-supraj molekuloj, estiĝas surfaca streĉforto. La solviĝo de la sapo malforitigas la surfacan streĉforton. Tial do la surfaca streĉforto de akvo ĉe la antaŭa parto de la alumeto fariĝas pli granda ol tiu ĉe la malantaŭa parto, kaj tiel la alumeto estas tirata antaŭen.

Bruligi Poŝtukon


(Magio)

Preparo: Intermiksi akvon kaj alkoholon egalkvante (laŭ volumeno), kirli la solvaĵon ĝis egaldenseco.

Ludo: Trempi la bruligotan poŝtukon en tiu likvaĵo, elpreni la tukon netordita. Bruligi la tukon. La tuko restas sendifekta.



Ne malfacilaj estas la matematikaj operacioj en la fabriko de la patrino.



Sen titolo

de ĜOU ĜONGHŬA

Degenero pro flatado de LIŬ ĈINGTAŬ

Armeo da ĉasistoj kontraŭ unu leporo

de ŬEJ ĈJIMEJ



Loĝantoj ĉe Ĉengĝong-strato en Nantong

Nantong estas mezgranda urbo proksime al la enfluejo de Jangzi-rivero. La lastajn jarojn en tiu nove leviĝinta industria urbo oni konstruis multajn altajn domojn, kaj miloj kaj miloj da familioj transloĝiĝis en la novajn domblokojn. Tamen duono de la loĝantaro de la urbo ankoraŭ vivas en malnovaj domoj.

Kiel vivas tiuj urbanoj ĉe la malnovaj stratoj? Mi vizitis en majo la straton Ĉengĝong en la urbo. Ĉe la strato loĝas 631 familioj el 1 970 membroj. Kiel ili vivas? Kion ili pensas kaj esperas?

MARŜI AL LA VIVNIVELO DE BONHAVA FAMILIO

Ĉe la strato loĝas laboristoj, instruistoj, subaj kadroj, sciencistoj, teknikistoj kaj individuo-komercistoj. Nur malmultaj el ili estis alte edukitaj kaj la plejparto havas mezan klerecon. Parto de la familioj estis nove starigita kaj parto loĝis tie jam dekojn da jaroj.

De post 1979 la plej granda ŝanĝiĝo de la urba vivo estas kresko de la enspezo de ĉiuj familioj, multiĝo de fasonoj de vestoj kaj grandiĝo de la pocentoj de viando kaj ovo en la prenitaj nutraĵoj. Kaj la plej rimarkinda ŝanĝiĝo estas evidenta multiĝo de modernaj konsumaĵoj en ordinaraj familioj.

Inter la 631 familioj akceptintaj mian enketon, nur 45 familioj havis antaŭ 1979 nigra-blankan televidilon, kaj neniuj — koloran. Nun 530 havas nigra-blankan televidilon kaj 70 — koloran. 520 el la familioj havas lavmaŝinon, 430 — fridujon, 440 — magnetofonon kaj 12 — motorciklon. Tiu strato spegulas la tutan fizionomion de Nantong. Oni povas aserti, ke post reformado kaj klopodado de ok jaroj la ordinaraj urbanoj, kiuj longtempe vivis en minimumaj kondiĉoj, estas marŝantaj al la vivnivelo de bonhava familio.

OPINIOJ DE LA URBANOJ

Dum la vizitado mi enketis pri la membroj de familioj —

plenaĝaj viroj kaj virinoj, maljunuloj kaj infanoj.

90% el la fraŭlinoj opinias, ke amo celas ne nur edziniĝon kaj naskon, sed pli grave, trovi kunulon dum la vivo. 60% el la personoj opinias, ke feliĉa familio baziĝas sur la komuna aspiro de la geedzoj, kiuj povas dividi inter si la ĝojon kaj malĝojon.

80% el la lernantoj de malpli ol 18 jaroj esperas fariĝi intelektuloj. Demandite, "kia formo de laboro estas preferata", 90% montris preferon al intelekta laboro.

Mi trovis ekster mia atendo, ke inter junuloj kaj maljunuloj ne ekzistas granda malakordo,

Gu Ĝjanŝan kaj liaj envazaj miniaturaj pejzaĝoj





Gu Meijing (la dua de dekstre) kaj ŝiaj familianoj

kiel iuj opinias. Maljunuloj ĉe la strato Ĉenggong laŭdas la entuziasmon de la junuloj en laboro, ilian lernemon kaj kreivecon, kaj samtempe ankaŭ montras ilian timemon antaŭ malfacilo. Tre malmultaj junuloj ne respektas maljunulojn. 90% el la junuloj opinias, ke la maljunuloj estas riĉaj je sperto, malpli ol 10% rigardas maljunulojn konservativaj. Surbaze de tio, multaj familioj el du aŭ tri generacioj vivas en granda harmonio.

70% el la plenaĝaj geviroj opinias, ke dommastrumado plej multe rabas iliajn postlaborajn horojn. 65% el la virinoj pasigas kvar postlaborajn horojn por dommastrumado.

SCENOJ EL LA VIVO DE VIRINOJ

La 49-jara Gu Meijing, vicestrino de la Komerca Buroo de la urbo, diris al mi: "Mi ĉiam iras labori kun devokonscio. Pro multaj aferoj mi ofte ne povas reveni hejmen en regula horo.

Sed en la hejmo mi estas obeema edzino de mia decidema edzo." Tiu fenomeno estas tre ĝenerala ĉe la ĉinaj profesiulinoj. En la oficejo ili estas diligentaj laborantoj kaj talentaj administrantoj, ili povas fari kion la viroj povas; en la hejmo ili estas teneraj edzinoj kaj bonkoraj patrinoj.

Tamen la ĉinaj virinoj de la 80-aj jaroj havas evidentan personecon, sendependan karakteron kaj kompare fortan konscion pri memstareco. Ili obeas sian edzon en gravaj aferoj de la familio, sed ili ne estas dependaĵo de la edzo. Dum la vizitado mi estis varme akceptata de dommastrinoj. Ilia konduto kaj parolo vidigis, ke ili agas tute laŭ sia propra volo. El la tradicia moro "absoluta obeo al la edzo" restis nur postsigno, kaj tion anstataŭis nova interrilato de geedzoj — egalrajteco kaj reciproka respekto.

La plej multe parolata temo de la virinoj estas peza dommastrumado. Instruistino de pli ol

40 jaroj diris al mi: "Mi neniam opiniis, ke mi devas preni sur min la tutan dommastrumadon. Kiam mi intense laboras en kuirejo kaj, vidante, ke la edzo revenis kaj sidiĝis en sofo kun ĵurnalo en la mano, mi tuj koleriĝis." En nemalmultaj familioj la dommastrumado estas plenumata de dommastrino. Eble tio estas postsigno de malnova tradicia moro.

Mi venis al n-ro 58 de la strato. Eliris viro kun manikoj supren refalditaj. Paŝinte en la domon, mi aŭdis, ke laboras lavmaŝino kaj televidilo. La geedzoj estis lavantaj vestojn kaj la okjara filo televidanta. Certe harmonio regas en tia familio, en kiu la geedzoj kune prizorgas dommastrumadon.

Esence dirite, ankaŭ virinoj devas prizorgi dommastrumadon. La esenca emancipiĝo de la virinoj ne signifas, ke ili povas forlasi dommastrumadon. Dum la vizitado multaj dommastrinoj diris al mi, ke ili tre volas kiel eble plej bone aranĝi la dommastrumadon. Kaj ili opiniis, ke la vera egalrajteco inter viro kaj virino ne signifas absolutan egalrajtecon en ĉiu afero. Ĉu oni povus diri, ke rekoni la diferencon inter la seksoj, laŭeble disvolvi la superecon de virinoj kaj efektiviigi ilian valoron en ofico kaj vivo estas tendenco de la urbaj profesiulinoj?

KONTRIBUO DE MALJUNULOJ

La loĝantara komitato de Hŭandong ĉe la strato havas kvar emeritajn funkciulojn. Ili multe klopodas por helpi la loĝantojn. Mi demandis ilin, kial ili ne restas hejme por ĝui senzorgan vivon. La estro de la komitato Sun Jinhan diris: "Miaj infanoj ne konsentas, ke



Dommastrinoŭĉe puto

mi ĉiutage hastas tien kaj alien, plendante, ke mi ne ĝuas kvietan vivon. Ili ne komprenas, ke mi sentas mian vivon signifa, plenumante ian aferon." Liaj vortoj reprezentis deziron de multaj maljunuloj, kiuj deziras ne nur ricevi prizorgon de siaj gefiloj en la maljuneco, sed ankaŭ fari kontribuon.

Ĉe la strato loĝas 206 pensuloj, kaj triono el ili ankoraŭ laboras por la socio. Se ne por la socio, almenaŭ por siaj gefiloj ili volas ion fari. Ili aŭ dommastrumas, aŭ flegas florojn. Mi eniris en iun korton kaj sentis min kvazaŭ en florgardeno. La 72-jara emerito Gu Ĝjanŝan flegas en la korto 130 envazajn miniaturajn pejzaĝojn. Tiuj envazaj pejzaĝoj en klasika stilo koncentris naturajn pejzaĝojn en vazoj.

ŜANGIGAS IDEOLOGIO PRI FAMILIO

Antaŭe s-ino Gu Ĝenĝen havis multajn membrojn en sia familio. En la lastaj jaroj ŝiaj infanoj plenkreskis kaj laboris sinsekve. Unu filo kaj unu filino jam

havas sian propran familion kaj loĝas aliloke. Ŝi diris al mi: "Antaŭe mia familio konsistis el sep membroj. Por ŝpari elspezojn, ni ĉiuj vivis kune. En la lastaj jaroj multe pliboniĝis la vivo. Mi aĉetis luksajn varojn, kaj mia plej juna filo aĉetis motorciklon." Kiam mi demandis ŝin, ĉu ŝi volas vivi kune kun unu el la filoj, ŝi respondis gajhumore: "Se ni povos kunvivi harmonie, mi loĝos ĉe li kaj vartos por li infanon; se ne, mi loĝos aparte — mi ricevas pension kaj estas sana, kial mi nepre kunvivos kun li?"

La disvolviĝo de la ekonomio kaj kulturo de Ĉinio alportis ŝanĝiĝon al la familioj kaj atakis la tradician ideologion pri familio. Multe malfortiĝis la tradiciaj pensoj, "Filo — apogo por maljuneco" kaj "pli da infanoj, pli da feliĉo." Iu junulo diris: "Multeco de infanoj alportos nenian profiton al la laboro de la gepatroj, al la edukado de la infanoj kaj al la altigo de memkulturo de la familianoj. Mi jam havas unu infanon, kaj mi ne volas la duan,

eĉ se multe pliboniĝos miaj ekonomiaj kondiĉoj."

ĈAGRENO KAJ ESPERO DE LA LOĜANTOJ

De la loĝantoj de la strato Ĉengĝong oni ĉiam povas aŭdi iliajn plendojn, ekzemple maloportuneco en la vivo, manko de banejoj kaj monotoneco de la spirita vivo. Krom televido en vespero ekzistas preskaŭ nenia amuzo por ili. Sed nun ili ankoraŭ ne trovis rimedon por ŝanĝi sian monotonan kulturan vivon. Ili esperas, ke ilia dommastrumado estos anstataŭita de socia servo kaj ilia kultura vivo estos enhavoriĉa.

Krome ili plendas ankaŭ kontraŭ la malvasteco de la loĝejoj. Estas familio el ses membroj, kiu loĝas longtempo en luitaj privataj ĉambroj de 18 kvadrataj metroj. En la malvasta ĉambro maljuna sinjorino Ĝang plendis al mi: "Bonvolu transdiri al aŭtoritatoj pri nia stato, nia loĝejo estas tro malgranda."

Ĉe la strato Ĉengĝong loĝas 20 tiaj familioj el tri generacioj. Iu 60-jara maljunulo diris al mi: "Nun la gefiloj amas la gepatrojn, la maljunuloj mem estas pensiataj, bone prizorgataj en nutrado kaj vestado, kaj la sola problemo estas tromalvasteco de la loĝejo." Post solvo de la problemo de nutraĵo kaj vesto oni urĝe bezonas solvon de la problemo de loĝdomoj. □

Solvo por la "Testo de Intelligenteco"

Ili ŝlosas per la tri seruroj la saman keston kun la pilko. La pilko povas esti elprenita nur kiam la tri fratoj malŝlosas sian seruron respektive.

En la "Maro de Morto"



La aŭtoro sur la ruino de antikva urbo

En la suda parto de Ŝinĝjang, Ĉinio, etendiĝas vasta sablomaro — la dua granda mondfama moviĝanta Taklimakan-dezerto. "Taklimakan" uĝurlingve signifas neelireblecon, tial oni nomas ĝin ankaŭ "Maro de Morto".

Sed kiu atendas, ke en la sablomaro ekzistas oazo, kie vivas multaj homoj! Por malkovri la misteron de la dezerto, sciencistoj nun senlace laboras.

Oktobre de 1986 la "Maro de Morto" eniris plurfaka esplora grupo el 28 sciencistoj de Ĉinio kaj FR Germanio kaj filmistoj de la Ĉina Agronomia Studio.

DAHEJAN INTERNE DE LA DEZERTO

Dahejan en la meza parto de Taklimakan estis la ĉefa loko de nia esplorado.

En la grupo troviĝas kvin germanaj glaĉerologoj, kiuj venis al Taklimakan por serĉi

postsignojn lasitajn de la movado de terciara glaĉero kaj pruvi la influon de la glaĉera movado sur la geologion kaj geomorfologion de Taklimakan. La ĉinaj sciencistoj intencis esplori ĝiajn geologion, klimaton, flaŭron, riĉfontojn k. c. Al ni, filmistoj, oni taskis filmadon de Taklimakan por prezenti ĝian aspekton kaj ĝian damaĝon al la medio.

Je la 3-a de oktobro la esplora grupo ekiris de la gubernia urbo Jutjan. Nia ruĝa aŭto moviĝis al Dahejan laŭ Kerijarivero en la dezerto. La rivero kun malmulte da akvo estas klara kaj kvieta. La ore brilaj gruzoj spegulitaj en la blua akvo montris sian krudan belecon. Aro da sovaĝaj anasoj hazarde alflugintaj aldonis al la dezerto iom da viveco.

Ĝis la tagmezo ni jam veturis 40 kilometrojn. Post la simpla tagmanĝo ni daŭrigis la vojon. Ju pli internen ni veturis, des pli dezerta la loko montriĝis. Ni

aŭdis nur la bruadon de la motoro kaj vidis nur sablajn montetojn unu post alia.


Ĉe la sunsubiro antaŭ ni aperis vaste etendiĝanta arbaro de diversfoliaj poploj (*Popular diversifolia*), el kiuj nemalmultaj jam forvelkis.

Nia aŭto komencis veturi supren laŭ deklivo de monteto, poste ni ne povis ne elaŭtiĝi kaj piediri, kaj fine ni devis puŝi la malŝarĝitan aŭton. Iam ni devis eĉ sterni arbobranĉojn antaŭ la aŭto por ĝin antaŭenpuŝi.

La sekvantan tagon, je la 6-a posttagmeze, la kilometrokomputilo de la aŭto montris, ke ni veturis jam pli ol 200 kilometrojn. Sed tie videblas nenia signo de homa ekzisto. Ni rigardis ĉirkaŭen. Subite iu kriis: "Jen fore estas homo, kiu malaperis post momenta montriĝo." Ni transiris la monteton kaj vidis homon staranta. Li estis ĉirkaŭ 30-jara, kun bruna vizaĝo kaj longa barbo, en tipa uĝura kostumo. Li iom kons-terniĝis kaj ĵetadis singardan rigardon al ni, ekzotikaj gastoj ruĝe vestitaj. Nia interpretisto konstatis, ke li estas Dahejano.

HOMOJ VIVANTAJ EN LA DEZERTO

Antaŭ la vizito mi informiĝis, ke la lokanoj de Taklimakan ankoraŭ vivas primitivan grupan vivon, portas vestojn el poplofolioj, loĝas en domoj el poplaj trunkoj, kun muroj ĉe tri flankoj, kaj multaj el iliaj infa-



Ŝtona muelilo kaj rompitaĵoj de fajencaĵo

noj estas denaskaj idiotoj pro ilia samsanga geedziĝo. . . Sed ŝajne ne estas tia la loĝanto de Dahejan, kiun ni vidis.

Iuvespere ni ekbruligis bivakfajron por forpeli la noktan malvarmon. Al bivakfajro iris viro mezastatura kun zorge pritondita barbo, en ŝaffela ĉapo, nigra jako, blua pantalono kaj nigraj ledŝuoj. Li unue salutis nin hanlingve kaj poste ekparolis la ujuguran lingvon. Antaŭ 20 jaroj li venis tien de alia loko por labori. Ni diris al li la intencon de nia esplora grupo, kaj li tre ĝojis pri tio.

Ni informiĝis de li, ke Dahejan havas 161 ujugurajn familiojn el 873 personoj, kiuj vivas en tradicia ujugura maniero. Laŭdire, ili estis senditaj de ujugura tribo por paŝti brutojn. Foje pro subita ventego sablo inundis la vojon, kaj ili ne povis hejmen reveni kaj fiksloĝiĝis tie. La loĝantoj de la dezerto sin vivtenas ĉefe per paŝtado. Pro manko de akvo ne eblas kulturi legomojn kaj fruktojn, kaj ŝafviando fariĝis do ĉefmanĝaĵo de la loĝantoj. Ili manĝis nur alkalan salon aperintan ĉe rivero.

Por fosi puton, la loĝantoj starigis siajn domojn distancajn po ok aŭ naŭ kilometrojn inter si. La dise loĝantaj familioj malofte renkontiĝas pro la longaj distan-



Parto de ruino

coj kaj kunvenis nur en tradiciaj festotagoj aŭ en geedziĝa aŭ funebra ceremonio.

Ni vizitis unu familion. La domo estas senfenestra, el senŝeligitaj poplaj traboj. Ĝi estas septita en du ĉambrojn. Anstataŭ lito sur la planko sterniĝas ŝaflana tapiŝo krude teksita de la mastro mem, sur ĝi estas dekkelkaj litkovriloj unu sur alia. Sur spaco meze de la ĉambro kuŝas terforno hejtita.

La mastro estas maljunulo. Liaj du filoj paŝtas aliloke dum liaj du bofilinoj kaj kvin nepoj restas hejme. Ili, bonorde vestitaj, aspektas plaĉe. Ili afable prezentis al ni rostitan ŝafan femuron kaj ĵus preparitan farunaĵon.

Esplora grupo en dezerto



La maljunulo diris al ni, ke ili loĝas tie jam 4-5 jarojn. Ĉi tie ne kreskas herboj, kaj ŝafoj manĝas poplofoliojn. Kiam la poplofolioj estas forkonsumitaj, oni devas transloĝiĝi aliloken. Krome, la elĉerpiĝo de akvo kaj furiozeco de ventego devigas loĝantojn transloĝiĝi. Ili kolektas en poplaro raran sovaĝan drogherbon dezerta cistanĉo (*Cistanche deserticola*), sekigis ĝin kaj interŝanĝis ĝin kontraŭ ia vivbezonaĵo.

La maljunulo informis nin ankaŭ, ke la sanitaran kaj kuracvan servojn, kulturon kaj edukon apenaŭ konas Dahejan. Dank' al la dezerta seka klimato, kiu malfavoras la vivon kaj disvastiĝon de bakterioj kaj



Knaboj de Dahejan

virusoj, kaj neekzisto de polucio en la loko, la loĝantoj ĝenerale estas sanaj.

OAZO KAJ ANTIKVA URBO

Nia esplorado kaj filmado komenciĝis en Dahejan.

Dahejan situas ĉe Kerija-rivero jam sekiĝinta. Ĉirkaŭe vastas senlima dezerto. Tamen meze de ĝi verdas oazo ne malgranda, kie kreskas poploj, tamarikoj kaj fragmitoj maldensaj sur la fluejo.

Iu ĉina botanikisto enigis borilon en poplan trunkon kaj el-tiris ĝin, kaj tuj el la truo elŝprucis biereska likvaĵo. Ni tuj starigis kameraon kaj ekfilmis. Post kiam ni filmis serion da bildoj, la ŝprucado ankoraŭ ne ĉesis. La esplorado konstatis, ke sub la sekiĝinta fluejo abundas akvo. Jen grava faktoro de la ekzisto de oazo en la dezerto. Fakuloj asertis, ke Dahejan antaŭe estis granda lago, kiu poste sekiĝis pro la ŝanĝiĝo de la klimato. Senĉese amasiĝis tie eroziaĵo de Kunlun-montaro, kaj tiel formiĝis la dezerto.

Septembro estas bona monato por Dahejan. Ne ventegas. Tage la temperaturo atingis 35°C, kaj 45°C en jurto, en kiu ni ŝvitegis. Nokte la temperaturo abrupte malleviĝis ĝis 3°C. Ni devis porti plumveston. Kaj la desertanoj dike sin vestis tage kaj nokte. La viroj portis ŝaffelan



Loĝantoj de Dahejan ripozas apud fajro.

ĉapon kaj la virinoj kaptukon, kvazaŭ tio povus ŝirmi ilin kontraŭ brula varmeĝo.

Ni aŭdis, ke 20 kilometrojn for de Dahejan sin trovas antikva urbo. Ĝuste ĝin ni intencis filmi por diskonigi, kiel dezerto malutilas al la natura ekologia medio. Por atingi la urbon, oni devas trapasi la dezerton kun risko de vojperdo kaj eĉ la vivo pro eventuala sabloŝtormo. Malgraŭ tio, ni kun pezaj ŝarĝoj ekveturis per kameloj al la antikva urbo.

La sekvantan vesperon iu el ni rimarkis la unuan koloran fajncan pecon. Proksimiĝis la antikva urbo. Nia grupestro ordonis kampadi surloke. La sekvantan matenon ni ne prenis manĝon kaj ekiris. Kiam ni grimpis sur grandan sablan monteton antaŭ la antikva urbo, prezentiĝis al niaj okuloj palisaro, kiu duone staranta sur la sablo aspektas kiel antikva urbomuro. Kun kamerao ni surpriris la transan grandan sablan monteton. Sur ĝia supro ni havis panoraman vidon al la antikva urbo.

La urbo ĉirkaŭita de altaj sablaj montetoj similas al fundo de pelvo, kun areo de kelkaj kvadrataj kilometroj. Dekstre estas ruino kompare alta. Jam disfalis ĝiaj konstruaĵoj, tamen laŭ restantaj kolonoj ni konjektis, ke la konstruaĵoj estis gran-

daj siatempe. Maldekstre estas domoj kaj stratoj englutitaj de sablo. La erozio de vento tute ŝanĝis ilian aspekton. En granda ronda kavoj ni vidis disemitaĵojn ŝtonajn muelilojn, kuprajn monerojn, bovajn kraniojn, ostojn de aliaj bestoj, pordojn, fenestroframojn, lignajn telerojn, malgrandajn fajncanĵojn k. a. En ili la plej multaj sur sablo estas koloraj fajncanĵoj rompitaĵoj. Laŭ iuj pecoj el tiuj oni eĉ povas imagi ilian formon. Tiuj antikvaĵoj ne havas eĉ la plej malgrandan ombbron de putro. Neniu el ni studis arkeologion, do restas enigmo, en kiu jaro konstruiĝis la urbo kaj pro kia kaŭzo ĝi ruiniĝis.

Je la 15-a de oktobro ni finis niajn esploradojn kaj filmadon de Taklimakan. La ĉinaj kaj germanaj sciencistoj multe rikoltis el tio. La ĉinoj gajnis multe, precipe en esplorado de riĉfontoj de la dezerto. Ankaŭ nia filmista grupo plenumis sian taskon. Baldaŭ ĉinaj spektantoj vidos sur ekrano la propran fizionomion de Taklimakan, la morojn de Dahejan, la ruinon de antikva urbo en dezerto kaj la malfacilan vojaĝon de esploristoj en dezerta loko. □

** La aŭtoro estas laboranto de la Pekina Agronomia Studio. Li partoprenis en la filmado de la esplorado menciita en tiu ĉi artikolo.*

Rimedo kontraŭ aids-malsano

Laŭ takso de la Monda Organizo pri Sano, nun en la tuta mondo troviĝas dek milionoj infektitaj de viruso de aids-malsano. En la komenco de ĉi-jaro oni trovis 44 652 aids-suferantojn en 99 landoj de la mondo. Tamen, koncernaj personoj en medicina rondo opiniis, ke la cifero estas konservativa kaj la efektivaj suferantoj estas pli multaj.

En Usono la aids-suferantoj estas plej multaj, t.e. 39 939, en Eŭropo 4 647, en Afriko 3 523. Sed fakuloj opiniis, ke la afrika cifero estas multe pli malgranda ol tiu de la efektivaj en Afriko. En Azio oni trovis nur 103 aids-suferantojn, dum fakuloj taksis, ke nur en Japanio eble troviĝas jam 10 000 personoj infektitaj de aids-viruso. Fakuloj maltrankviliĝas, ke diverslandaj turistoj enportos aids-viruson en la Sud-orienta-aziajn landojn.

La disvastiĝo kaj damaĝo de aids-malsano vekis sufiĉan atenton de la diversaj landoj, kaj tiuj landoj sinsekve aplikas diversajn rimedojn por preventi, kuraci kaj esplori la malsanon.

Lastatempe la Higiena Ministerio de Francio montris, ke la aids-prevento jam fariĝis "grava tasko de la tuta popolo" en Francio. Samtempe ĝi ankaŭ postulis, ke ĉiuj lernejoj donu lecionon pri preventivo kaj kuraco de aids-malsano por klarigi al lernantoj kaŭzon, malutilon kaj kontraŭrimedojn de aids-malsano.

Por malhelpi la disvastiĝon de aids-malsano, en la komenco de

ĉi-jaro la Kuraca Buroo de Finnlando senpage disdonis broŝurojn pri aids-prevento al pli ol 75 000 16-21-jaraj junuloj. Laŭ enketo de la buroo, plejparto de la aids-suferantoj trovitaj en Finnlando estas ĉ. 30-jaraj. Tial estas tre necese fari koncernan edukon. Krome, en la lastatempaj ĵurnaloj kaj gazetoj de Finnlando sinsekve aperis artikoloj pri disvastiĝo de aids-malsano kaj atentigo pri "sinsavo" el aids-malsano por veki ĝeneralan singardemon.

Laŭ informo de sovetunia ĵurnalo, ĝis nun Sovetunio trovis 13 aids-suferantojn, inter kiuj 12 estas fremdlandanoj. Krome, aliaj 6 sovetunianoj estis suspektataj je aids-malsano.

Por ĉesigi la disvastiĝon de aids-malsano, Sovetunio aplikis serion da rimedoj: Unue, en ĉiuj grandaj urboj fondi ambulatorion kun laboratorioj por imunaj malsanoj; due, ekzameni ĉiujn sangobankojn de la lando kaj fondi dekojn da sango-laboratorioj en la sang-esploraj departementoj kaj sangotransfuzaj stacioj; trie, produkti pli da unufojaj injektiloj — produkti en 1987 milionon da kompletoj da tiaj injektiloj; kvare, rapidigi kulturon de imunologiaj fakuloj — ĝis 1986 Sovetunio jam kulturis 200 fakulojn tiurilate.

Nun Sovetunio streĉe esploras pri medikamentoj por preventi kaj kuraci aids-malsanon, i.a. medikamentojn povantajn plifortigi homan imunecon kaj malhelpi pliiĝon de aids-viruso en homa korpo kaj vakcinojn kon-

traŭ aids-malsano. Unu el la unuaspecaj medikamentoj jam estis sukcese produktata.

Ankaŭ Usono kaj Eŭropaj landoj aktive batalas kontraŭ aids-malsano. Oktobre de la pasinta jaro la brita registaro, je la elspezo de ĉ. 19 milionoj da pundoj, disdonis 23 milionojn da propagandiloj al ĉiuj familioj. Bolonjo de Italio deklaris, ke oni kontrolos ĉiujn gravedulinojn en la unuaj 3 monatoj por konstati, ĉu la embrio estis infektita de aids-malsano. Ĉiuj familioj de FR Germanio ricevis broŝuron de la Higiena ministerio kun averto "Aids-malsano koncernas ĉiun". Iuj mezlernejoj de la lando jam prenis lecionon pri aids-malsano kiel la devigan.

Krome, aprile ĉi-jare, la Monda Organizo pri Sano unuafoje faris mondplanon pri preventivo de aids-disvastiĝo.

Ĉi-jare, la buĝeto uzota de la Monda Organizo pri Sano al preventivo de aids-malsano estas 37 milionoj da usonaj dolaroj. La organizo intime kunlaboras kun monde unuaklasaj fakuloj super aids-malsano kaj atingis interkonsenton pri la problemo de preventivo, ekz. kontrolado de turistoj, kriterio por diagnozo de aids-malsano, prognozo de kazoj, elspezo por kuracado ktp. La organizo fondos aids-virusan bankon en esploraj institucioj de iuj landoj por garantii, ke esploristoj posedu ĉiujn specojn de aids-viruso.

Krome, la Monda Organizo pri Sano helpos 50 landojn fun-

kciigi kontrolan kaj edukan planon.

La triamondaj landoj kaj la evoluantaj landoj ambaŭ frontas la penigan taskon batali kontraŭ aids-malsano. Tamen, pro la subevoluinta ekonomio ne multaj evoluantaj landoj renkontis pli seriozajn malfacilojn. Ekz. en Afriko, la plej granda malfacilo estas manko de kontrola rimedo kaj necesaj monrimedoj. Nun ekzistas la stato, ke la sango estas infektita, sed ankoraŭ uzata pro malsukcesa analizo; en multaj afrikaj landoj la elspezo uzata por kuracado de ĉiu persono ĉiujare estas nur 10-20 usonaj dolaroj. Tiu sumo ne sufiĉas eĉ por kuraci ordinarajn malsanojn, por ne paroli pri elspezo kontroli aids-malsanon. Tial la Monda Organizo pri Sano alvokis, ke la triamondaj landoj kaj evoluantaj landoj starigu kunlaboran rilaton. Nun Svedio liveris monhelpon al Zambio por efektivigi planon de sango-analizo.

Tio vidigis bonan perspektivon de intima kunlaboro inter evoluantaj kaj evoluantaj landoj.

En la monda laboro preventi kaj kuraci aids-malsanon, Ĉinio jam faris interŝanĝon kun fakuloj de iuj landoj kaj la Monda Organizo pro Sano. Samtempe Ĉinio koncentris adekvatajn homojn kaj materialojn por aktive fari preventon kaj esploradon. Lastatempe, Ĉinio trovis 4 aids-suferantojn infektitajn de transfuzo de importitaj sango-produktaĵoj. La trovo vekis grandan atenton ĉe la registaro kaj diversrondaj personoj. La Higiena Ministerio de Ĉinio refoje avertis, ke oni singarde uzu importitajn sangoproduktaĵojn kaj refoje deklaris la rigoran malpermeson de la registaro al importado de iuj sangoproduktaĵoj. □

ABONTARIFO DE EPĈ

(Ekvalidas en la 1-a de oktobro)

Lando	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	A\$	15.00	25.00	35.00
Aŭstrio	Sch	200	340	480
Belgio	BF	550	930	1300
FR Germanio	DM	30.00	50.00	70.00
Britio	£	8.00	13.60	19.00
Finnlando	Fmk	64.00	108.00	150.00
Francio	FF	90.00	150.00	210.00
Hispanio	Ptas	1200	2000	2900
Italio	Lit	18000	30600	43000
Japanio	Yen	3000	5400	7500
Jugoslavio	Din.	1500	3000	4300
Nederlando	Gld.	34.00	58.00	82.00
Nov-Zelando	NZ\$	20.00	34.00	48.00
Portugaliao	Esc	1100	1800	2600
Svisio	SF	25.00	42.00	60.00
Usono	US\$	12.00	20.00	28.00
Kanado	Can\$	14.00	23.00	33.00
Por aliaj landoj en Eŭropo:				
	£	8.00	13.60	19.00
	US\$	10.00	17.00	24.00
Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:				
	£	5.00	8.50	12.00
	US\$	6.50	11.00	16.00

Pri ĉinaj proverboj

de LAN ŜAN

Proverboj estas frazoj en fiksa formo cirkulantaj inter la popolanoj. Ili karakteriziĝas per lakoneco, populareco kaj sencoprofundeco.

En la pratempo primitivaj homamasoj, por pli bone ekzisti, fiksas akumulitajn spertojn en produkta laboro per facile memoreblaj vortoj, kiuj vaste cirkulis inter ili. Tiel naskiĝis la proverboj. Post apero de lingvo la proverboj estis registritaj. La proverboj de Ŝja- kaj Ĝoŭ-dinastioj (la 22-a jc. a. K. ĝis 256 a. K.) estis ofte menciitaj en ĉinaj klasikaĵoj. Ili estis la plej fruaj proverboj de Ĉinio. La proverboj notitaj en klasikaĵoj, kiaj “sekvi bonon kiel en grimrado, sed malbonon kiel je lavangado”, “Post ŝafperdo ankoraŭ ne estas malfrue fari urĝan riparon de heĝtruo”, cirkulis jam 2 000—3 000 jarojn kaj estas nun ankoraŭ parolataj.

Proverbo estas kristaliĝo de la popola saĝo kaj enradikiĝis en la buŝa lingvo de la popolo, tial ĝi havas solidan bazon de vivo kaj fortan popolan guston. Kompreneble, proverboj eniris ankaŭ en literaturajn verkojn de Ĉinio kaj estis cititaj en multaj famaj romanoj kaj noveloj por esprimi penson kaj ekspliki aferon, por ke la lingvo en la verkoj estu pli freŝa, klara kaj viveca.

Depost la dinastioj Song kaj Ming (960-1644) oni vaste


kolektis proverbojn cirkulantajn inter la popolanoj, kaj aperis proverbaj kolektoj, ekz., “Antikvaj kaj Nuntempaj Proverboj” de Ĝoŭ Ŝoŭĝong de Song-dinastio, “Popularaj Vortoj” de Jang Ŝen de Ming-dinastio, “Antikvaj Proverboj” de Du Ŭenlan de Ĉing-dinastio (1644-1911). En la lastaj jaroj multaj ĉinaj eldonejoj sinsekve eldonis libroforme ĉinajn proverbojn, kiel “Kolektitaj Proverboj de Ĉinio” kun 45 814 proverboj, parton de la proverba trezorejo de Ĉinio. Laŭ takso de specialistoj la nombro de ĉinaj proverboj cirkulantaj en Ĉinio superas kvar milionojn.


La ĉinaj proverboj, plejparte mallongaj, vivecaj kaj lakonaj,

esprimas profundan penson, donas inspiron kaj edifon kaj ludas rolon de instruo kaj admono. La formoj de proverboj estas variaj. Iuj el ili havas almenaŭ 5 aŭ 6 ideogramojn, kaj aliaj — maksimume 20, en solfrazo aŭ en du aŭ pluraj frazoj, kun aŭ sen rimoj.

Solfrazaj proverboj ne havas difinitan nombron de ideogramoj. Ekz. “Ĉio malfacilas je la komenco”, “Profesioj diferencas, kiel montoj sin obstrukcas”, “Unu vido pli taŭgas, ol cent aŭdoj”, “Trabo supra malĝustas, portilo ĝia kurbas” kaj “Malsamaj ŝlosiloj por malsamaj seruroj”. Ankaŭ dufrfazaj proverboj povas esti longaj aŭ mallongaj, ekz., “Se homoj unuanime pe-

Post ŝafperdo ankoraŭ ne estas malfrue fari urĝan riparon de heĝtruo.





Tri bonzoj havas nenion por trinko.

nas, transloki l' monton Tajŝan ili povas", "Kvankam pasero etas, al ĝi organoj ne mankas" kaj "Sen tigro en monto reĝas eĉ simio". Ankaŭ plurfrazaj proverboj estas interesaj, ekz., "Unu bonzo portas akvon por sia uzo, du bonzoj kunlaboras en tio por divido, tri bonzoj havas nenion por trinko".

Ne estas hazarde, ke oni ŝatas proverbojn. Multaj proverboj entenas riĉajn sciojn kaj spertojn kaj ĝeneralajn veraĵojn. En longtempa produkta laboro oni resumis siajn konojn pri naturaj fenomenoj kaj leĝoj kaj kreis proverbojn pri agrikulturo, vetero, medicino kaj moroj, tial tiaj proverboj havas fortan vivipovon. En la science subevoluinta antikveco, proverboj iam ludis rolon direkti la produktadon. Eĉ en la nuna tempo ili

ankoraŭ ne perdis sian efikon. Oni ofte diras: "Por kreskigi legomojn bone, mortigu insektojn frue", "Kampo kaj porko sin nutras en reciproko", kaj "La plantoj siajn gepatrojn ne konas, mallaboremo riĉrikolton ne donas".

Multaj proverboj venas de la popolo, tial ili povas esprimi ĝiajn volon, penson, virton kaj spiriton. Ekz., "Homo mizera, volo ŝtalfera", "Spite tigron sur monto, oni iras al ĝi en renkonto", "Diligento kiel vojo al sciomontaro, penlernado kiel ŝipo trans senliman maron", "Pli da homoj en solidaro monton movas, pli da homoj per lignometo flamojn alte levas".

En farado de proverbo oni atentigas ĝian lingvan belon kaj aplikas plurajn retorikajn artojn,

ekz. komparon: "Planto post sarkado kreskas en granda skalo, kiel en rapido galopas ĉevalo", "Tempo estas oro, tempo ne aĉeteblas per oro"; analogion: "Unu fibro ne estas fadeno, unu arbo ne estas arbaro"; kontraston: "La spektantoj vidas pli klare ol la ludantoj"; antitezon: "Havante posedaĵon, ĉiam memoru la mizeran tagon, ne en mizera tago pensu pri la pasinta posedaĵo"; hiperbolon: "Maldense plantitas rizplandidoj, rikolto ne sufiĉas eĉ por kokidoj"; klimakson: "Unuafoje oni lernas, duafoje oni lertas, tria-kvarafoje oni majstras"; kaj paralelismen: "Ne prenu ŝakalon kiel hundon, ne traktu fiulon kiel amikon". Krome, oni aplikas ankaŭ aliajn retorikajn artojn. La variaj retorikaj artoj plifortigas esprimopovon de proverboj.

Kompreneble ne ĉiuj proverboj estas enhave bonaj. En malsamaj periodoj naskiĝis malsamaj proverboj. El la malnovaj proverboj nemalmultaj fariĝis arkaikaj. Iuj enhave estas postĝintaj, eĉ ne bonaj. Ekz., "Kiu ne zorgas pri si mem ricevos dian punon", "Al kiu vi edziniĝu, tiun vi ĉiam sekvu". Tiaj lingvaj feĉoj postlasitaj de la historio devas esti forigitaj. Kaj la multnombraj proverboj tamen estas brilantaj perloj en la lingva trezorejo de Ĉinio. □

ABONU LA REVUON KONTAKTO

KONTAKTO estas revuo pli pri la mondo ol pri la movado. Ni publikigas artikolojn pri la kulturo de diversaj landoj, arto, literaturo, sociaj problemoj, junularaj aferoj kaj pri multaj aliaj temoj.


Duono de la artikoloj estas en simpla lingvaĵo. Bone por komencantoj.

Jarabonon (ses numeroj) vi povas mendi ĉe via libroservo aŭ rekte ĉe: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Se vi volas verki artikolojn, bv sendi ilin al la redaktanto de KONTAKTO: Leif Nordenstorm, Lilla Nygatan 3 B, S-961 32 Boden, Svedio.

Erinaco kaj glano

Serĉante ion manĝeblan, tigro vidis erinaceton kuŝantan kun ventro supren. La tigro prenis ĝin viando. Kiam la tigro proksimiĝis kaj provis buŝe kapti la viandopecon, la lasta tuj kroĉiĝis al ĝia nazo. La tigro terurite forkuris sen halto en montojn. Ĝi sentis lacegon kaj baldaŭ endormiĝis. Nur tiam la erinaco liberigis la nazon de la tigro kaj forkuris. La tigro vekigis kaj trovis, ke la erinaco jam foriris. Ĝi ĝojis kaj kuris sub kverkon por sin distri. Klininte sian kapon, ĝi hazarde vidis



glanon kun ŝelo, kiun ĝi prenis kiel malgrandan erinaceton. Sin tirinte flanken, la tigro diris al la glano: "Fraĉjo, mi ĵus renkontis vian patron, kaj de li mi jam ricevis lecionon. Lasu min trairi!"

Kato kun rozario

Kato okaze portis rozarion ĉirkaŭ sia kolo. Granda rato vidis tion kaj tre ĝojis: "La kato jam fariĝis budhista*, kiu prenas vegetaran dieton." Kaj ĝi kondukis sian idaron al la kato por esprimi dankon. La kato ekriegis kaj englutis plurajn ratojn unu post alia. La granda rato tuj forkuris. Eskapinte el la danĝero, la terurita granda rato diris: "La kato fariĝis eĉ pli kruela post la vegetaraniĝo!"

* *Laŭ budhisma moro, budhista portas rozarion kaj praktikas vegetarantismon. Budhista devas esti bonkora kaj ne devas mortigi vivulon.*



Baleno

Ĉe bordo de Bohaj-marograndega baleno devigis grupojn da ŝarkoj ĉasi por ĝi bongustajn fiŝojn. La ŝarkoj levis sur la maro tiel grandajn ondojn kvazaŭ grandaj insuloj skuiĝus. La baleno povis per unu tiro engluti dekojn da fiŝoj grandaj kiel boatoj. Fiera pri sia braveco, ĝi impete puŝiĝis antaŭen, ne povante sin deteni de manĝado. Fine ĝi trovis sin sur bordo antaŭ Ĝjeŝi-monto norde de la maro. Tie ĝi mortis pro soifo. Nun la fiŝoj, kiuj antaŭe servis por ĝi kiel nutraĵo, konkure roniĝis ĝin. Kaj fiŝisto ricevis ĝin sen ajna peno.

Librostando de Ĉinaj E-eldonaĵoj en 51-a

Libroborso por Flandrio

Personoj kiuj aĉetas dum la librosemajno (ekde 31.10.87 ĝis 11. 11.87) por pli ol 500 BF ĉe ni ricevos "Boek in Vlaanderen 1987-1988".

Tiuj kiuj mendas dum tiu ĉi periodo rekte ĉe ni povos ankaŭ ricevi la libron

"Boek in Vlaanderen 1987-1988".

Bonvolu tiam mencii ĉu vi volas ricevi tiun libron aŭ ne.

Peranto de El Popola Ĉinio: Eldonejo kaj Librejo Sonorilo, Doornstraat 22, 2610 Wilrijk (Antwerpen), Belgio

ĈINIO MEMORIGIS PRI LA 50-A DATREVENO DE LA EVENTO DE LA 7-A DE JULIO


La 7-a de julio 1937 estis grava tago en la historio de la ĉina naciliberiga batalo, de la rilatoj inter Ĉinio kaj Japanio kaj de la kontraŭfaŝisma batalo de la tutmondaj popoloj. En tiu tago la japana agresa armeo faris provokon ĉe la ponto Lugoŭĉjaŭ en la sudokcidenta antaŭurbo de Beijing (nun Pekino). Ĝi sieĝis la urbeton Ŭanping oriente de la ponto kaj levis totalan agresan militon kontraŭ Ĉinio. Tiutage la tuta ĉina nacio komencis la unuaniman Kontraŭjapanan Rezistmiliton. Post ok-jara sanga batalado kun subteno de la tutmondaj popoloj, la ĉina popolo fine fiaskigis la japanajn agresantojn kaj gajnis la venkon de la kontraŭfaŝisma batalo.

Antaŭvespere de la 50-a datreveno de la Evento de la 7-a de Julio, oni inaŭguris en la antikva urbeto Ŭanping, la Memorigan Domon de la Kontraŭjapana Rezistmilito de la Ĉina Popolo. En la domo estas montrataj pli ol 600 objektoj, dokumentoj, skribaĵoj kaj bildoj, kaj krome ankaŭ grandaj reliefoj kaj statuoj, kiuj sisteme kaj figure prezentis la malfacilan vojon iritan de la ĉina popolo en la batalo kontraŭ la japana agreso.

Okaze de tio oni aranĝis diversajn memorigajn aktivadojn en Pekino kaj aliaj grandaj kaj mezgrandaj ĉinaj urboj. La 7-an de julio okazis granda kunveno kun partopreno de mil personoj en la Halo de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, inkl. vicprezidanton de la Ĉina Popola Respubliko Ulanfu kaj aliajn ŝtatajn gvidantojn. Hu Ŝeng, la prezidanto de la Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj, donis gravan paroladon en la kunveno.



La Memoriga Domo de la Kontraŭjapana Rezistmilito de la Ĉina Popolo



La riparita Lugoŭĉjaŭ-ponto

Antaŭtagmeze samtage urbanoj de Nankino iris al la Memoriga Domo de Viktimoj de la Japana Amasbuĉado en Ĝjangdongmen de Nankino kaj omaĝis al 300 000 viktimoj per florkronoj.

Pri la evento memorigis ankaŭ ĉinaj teatroj en diversaj lokoj. La popolo de la ĉefurbo okazigis grandan artan vesperon. La aktoroj bone prezentis bravajn batalojn de la ĉina popolo kontraŭ la japanaj agresantoj. Ankaŭ ĉinaj ĵurnaloj,

radio-kaj televidstacioj kaj eldonejoj publikigis artikolojn kaj librojn okaze de la 50-a datreveno de la evento.

ĈINIO HAVAS 353 URBOJN

Ĉis la fino de 1986 la nombro de la ĉinaj urboj kreskis al 353, kun pli ol 200 milionoj da loĝantoj. La areo de la ĉinaj urboj konsistigas 9.1% de la totala areo de la lando.

Ekonomikistoj opinias, ke por disvolvi la ĉinajn urbojn oni de-

vas sekvi la principon "limigi la skalon de grandaj urboj, racie disvolvi mezgrandajn kaj energie disvolvi malgrandajn".

818 ĈINAJ ESPLORAJ FRUKTOJ GAJNIS PREMIOJN DE SCIENCTEKNIKA PROGRESO DE 1987

La ĉina ŝtata juĝkomitato de premio por scienc-teknika progreso juĝis kaj premiis 818 esplorajn fruktojn, el kiuj 4 gajnis superklasajn premiojn, 50 unuaklasajn, 214 duaklasajn kaj 523 triaklasajn.

La premiitaj esploraj fruktoj havas altan teknikan nivelon. Inter ili la mikroreaktoro de neŭtrona fonto, la ĉina cirkulatoro n-ro 1, la ŝtata normosistemo por longo de laseraj radioj kaj la farado de superpreciza lagrosistemo kaj superpreciza ilmaŝino estas brilaj sukcesoj akiritaj de ĉinaj sciencistoj-teknikistoj per ilia propra forto kaj atingis la internacian avangardan nivelon.

La premiitaj esploraj fruktoj havas rimarkindajn ekonomian kaj socian efikojn. Ekz. laŭ teorio de iu esplora frukto, kiu gajnis superklasan premion, oni konis riĉajn rezervojn de kupro, sulfuro, oro kaj arĝento en la meza kaj malsupra Basenoj de Jangzi-rivero, kiuj alportos valoron de dekoj da miliardoj da jŭanoj. Laŭ nekompleta statistiko 34 esploraj fruktoj kun premioj superklasaj kaj unuaklasaj povos doni senperan ekonomian valoron de pli ol du miliardoj da jŭanoj. Estas menciinde, ke 23 mol-sciencaj fruktoj por kreiva studo de scienca decido kaj moderna administrado unufoje gajnis ŝtatan premion de scienc-teknika progreso.

GRANDEGA SALMINEJO TROVITA EN HŬAJJIN

Lastatempe oni trovis grandegan salminejon en Hŭajjin, Ĝjangsu-provinco, orienta Ĉinio. Sole en spaco de 227 kvadrataj kilometroj ĉirkaŭ la urbo oni jam konis la

rezervokvanton de pli ol 250 miliardoj da tunoj.

La salminejo de Hŭajjin kovras 570 kvadratajn kilometrojn. Laŭ takso de fakuloj, la salminejo havas rezervokvanton de 400 miliardoj da tunoj. La roksalo kuŝas 600-2 000 metrojn sub la tero. La saltavoloj dikas je kelkaj ĝis pli ol cent metroj. La meza enteno de natria klorido en la roksalo estas 60%, foje eĉ pli ol 90%.

LAŬKONTRAKTA LABORSIS- TEMO PRAKTIKATA EN PETROLAJ ENTREPRENOJ

En la lastaj ses jaroj oni praktikis laŭkontraktan laborsistemon en ĉinaj petrolaj entreprenoj kaj atingis rimarkindajn sukcesojn: oni superproduktis 79 648 000 tunojn da nafto, kies profito 17.43 miliardoj da jŭanoj estis investita por la uzo de la entreprenoj kaj levis la kapablon de memdisvolvo de la petrolo industrio. La kapablo produkti pliajn 65.62 milionojn da tunoj da nafto en la ses jaroj estis akirita duone per kapitalo mem kolektita. La pliigo de tia kapitalo pluapaŝe akcelis la importon, reformadon kaj progreson de teknologio de la petrolo industrio.

Unu el la stratoj de la mezgranda urbo Suĝou



RIMARKINDAJ SUKCESOJ DE ĈINIO EN PROGNOZO DE LA SUNA AKTIVADO

Por havi bonan spacan medion por lanĉado de longdistancaj raketoj kaj eksperimento de artefaritaj satelitoj, oni konstante prognozis la sunan aktivadon. La efiko de la prognozo jam atingis la internacian avangardan nivelon.

Tiuflanka fakulo longe laboranta en la Junnan-a Observatorio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj diris, ke la efiko de la prognozo farita de ĉinaj astronomoj pri la evento de la suna protono estas pli alta ol tiu de la alilandaj observatorioj, kaj ankaŭ la prognozo de ĉinaj astronomoj pri ĝeno kaŭzita de la sunaj X-radioj al la tergloba jonsfero jam atingis la internacian avangardan nivelon.

De la fino de la 60-aj jaroj la Junnan-a Observatorio kunlaboras kun la Pekina Observatorio kaj Ziĝinŝan-observatorio de Nankino por fari konstantan prognozon pri la suna aktivado kaj laŭpete informi pri tio ĉiutage aŭ ĉiuduonmonate. La prognozaj bone servis al la eksperimento kaj lanĉado de ĉinaj artefaritaj satelitoj, longdistancaj raketoj kaj komunikaj satelitoj kaj garantiis la sekuran lanĉadon kaj facilan komunikadon de spacaj flugaparatoj.

Nova ŝtala urbo Dukoŭ

de GE ŜI

Forlasinte la belan gubernion Liĝjang, ni venis al la ŝtala urbo Dukoŭ, la unua urbo sur Ĝinŝa-rivero.

Sur la mapo, Dukoŭ situas en la sudokcidenta parto de Siĉŭan-provinco, proksime al Junnan-provinco, sude de Ĉengdu je 749 km., norde de Kunming je 351 km. La Ĉengdu-Kunming-a fervojo trairas la lokon, kaj Ĝinŝa-rivero preterfluas en ĝia nordo, akceptante la enflon de siaj branĉaj riveroj Jalong kaj Anning.

PENEGA KONSTRUADO

Ni intervjuis urbestron Li La'ŭang en kunveno de la urbodomo.

"Nia Dukoŭ estas nova urbo kun karaktero de abunda ŝtalo. Vi estas tre bonvenaj en nia urbo." Li diris al ni afable, en tono de la lokanoj.

En interparolado ni informiĝis, ke la 46-jara urbestro pasigis 15 jarojn en Dukoŭ. Li estas konstruanto de la nova urbo kaj ankaŭ ĝia gvidanto, jen kial lia voĉo pleniĝis je fiereco.

Li prezentis al ni la historion kaj la nunan situacion de Dukoŭ.

Antaŭ 20 jaroj, sur la ĉina mapo oni ne povis trovi la lokon Dukoŭ. La loko estis dezerta kaj sterila, kaj popolkanto tiel priskribis: lepro, lupoj, pafo de rabisto, domfalo pro tertremo, transiro de Ĝinŝa-rivero — jen kvin timoj por la popolo. Tie kreskas sennombraj kapokarboj kun ruĝaj floroj. La nomo "kapokfloro" en la ĉina lingvo prononcas kiel "panĝihŭa", tial la loko portas la nomon Panĝihŭa.


La loko estas honorita kiel la "urbo de vanado kaj titano" pro

la riĉa konservo de vanada-titana magnetito. Laŭ la unua enketo, la vanado el la ercoj okupas 62% de la totala rezervokvanto en Ĉinio kaj 47% de tiu en la mondo, kaj la titano, 90% en Ĉinio kaj 45% en la mondo. En la ercoj troviĝas ankaŭ aliaj pli ol 20 specoj da raraj elementoj kiel skandio, nikelo, kobalto k. a. Estas konsiderinda la rezervokvanto de karbo, grafito, oro, kaj ankaŭ tiu de kalkŝtono, dolomito kaj aliaj helpaj materialoj por metalurgio. Tie abundas ankaŭ akvoenergio, arbaro kaj estaĵoj.

Li informis nin, ke la mineraloj en Panĝihŭa estis malkovritaj en la 30-aj jaroj, sed neniam estis ekspluatitaj pro la tiamaj kondiĉoj.


Por akceli la progreson de ŝtala industrio, en 1964 la ŝtato koncentris 360 koncernajn fakulojn, inkluzive la esploran grupon konsistantan el altaj oficistoj de ministerioj de fervojo, karbo, metalurgio k.a. por totale enketi kaj projekti la regionon Panĝihŭa kaj la Ĉengdu-Kunming-an fervojon.

Post la streĉa preparado, en 1965 la ŝtato oficiale komencis konstrui la regionon Panĝihŭa. En mallonga tempo, pli ol 50 mil laborantoj el la tuta lando eniris tiun dezertan lokon. Estas imageble, kiajn malfacilojn alfrontis la 50 mil personoj en provizado de nutraĵoj kaj loĝado. Tiam, la unuavenintoj, demetinte la valizojn, tuj komencis ebenigi la





Dukou Foto de CAJ HAJFENG



Laminelejo de la Panĝihua-a Ŝtala Kompanio Foto de CAJ HAJFENG



Elverço de fundida stalo

Foto de HŪANG TJANPU



Telfero en minejo Foto de LI MINGDA



Parto de urbo Foto de LAN ŠJIFENG



Ĝardeno ĉe strato

Foto de HE ŜJANG

Loĝdomoj

Foto de ZOŬ ĜJILJU




teron, starigi tendojn kaj masoni fornon. Tion farinte, ili tuj ekkonstruis kabanojn por postaj venintoj.

Multaj laborantoj firme sin tenis sur la konstruejo malgraŭ, ke la lipoj krevis kaj la nazo sangis pro varmego. Por havigi al si akvon por trinko kaj konstruado, laboristoj transportis per lavpelvo akvon el Ĝinŝa-rivero. En la sama pelvo da akvo, ili lavis al si la vizaĝon matene, la korpon tagmeze, la piedojn vespere kaj fine miksis morteron per la akvo.

En la komenco de la konstruado, oni devis transporti kaj instalati multajn ekipaĵojn per manoj kaj ŝultroj pro manko de vojoj. La tuta altatensia linearo estis transportita sur monton per homa forto. En vico de centoj da metroj, centoj da homoj starigis en la montaro la linearon de dekoj da tunoj. Kaj la unuaj minaĵoj estis ekspluatitaj tute per marteloj kaj levstangoj.

Ĉe mia intervjuo la unuaj konstruantoj rememoris pri la pasintaĵoj kun profunda sento. Iu diris: "Kiom da fojoj oni povas partopreni dum la vivo en tiel grandioza konstruo? La afero indas ke nia dorso kurbiĝis, kiam ni vidis la novan urbon de ni starigitan." Alia diris: "Kiajn penadon kaj laciĝon ni suferis! Sed ni ilin eltenis kunpremante la dentojn, gaje babilante kiel samfamilianoj. Estas vere neforgeseblaj la entuziasmo kaj interrilato de la homoj." Iu diris signife: "La nova urbo radias brilan junecon omaĝitan de la konstruantoj."

20 jarojn poste, Dukoŭ jam fariĝas pezindustria urbo kun pli ol 600 ŝlosilaj entreprenoj el 14 branĉoj de metalurgio, karbo, elektroenergio, trafiko, konstruo, komerco k.a.



La ferma monto Lanĝjan

ŜTALA INDUSTRIO KAJ MINEJO DE DUKOŬ

Dukoŭ estas urbo ĉefe de ŝtala industrio kies kernaj entreprenoj estas la Panĝihŭa-a Ŝtala Kompanio kaj Panĝihŭa-a Metalurgia kaj Mina Kompanio. La valoro de ilia produktado okupas pli ol 70% de la totala produktvaloro de la urbo.

Unue ni venis al la ŝtala kompanio sidanta en Jijiping, kaj ni vidis, ke la granda entrepreno sinpreme kuŝas sur malvasta deklivo. La respondeculo prezentis al ni, ke la areo de la ĉefaj laborejoj de la fabriko longas malpli ol 2 km., larĝas malpli ol 1 km., tamen la nivelodiferenco atingas 80 km. Tia tereno de granda ŝtala entrepreno estas tre malofta en la mondo. La projektintoj faris la deklivon en kvar ŝtuparojn kun 23 terasoj, kaj konvene lokis la fabriksdomojn sur tiuj terasoj. Dank' al la saĝa projekto la fabriko okupas nur duonan areon kutime bezonatan de samgranda fabriko.

Enirinte la fabrikon, ni vidis, ke ombras arboj kaj aromas floroj, la fabriksdomoj kunligiĝis per koloraj koridoroj kaj vojetoj bele pavimitaj.

La respondeculo informis al ni, ke la tuta projektado kaj konstruado de la fabriko estis plenumitaj de Ĉinio. Post pli-ol-10-jara konstruado, nun la jaraj produktokvantoj de ŝtalo kaj fero atingis respektive 1 750 mil tunojn kaj 2 050 mil tunojn superante la projektitan normon, kaj okupas respektive la kvaran kaj la kvinan lokojn en la tuta lando. Multaj produktaĵoj estis eksportitaj al Britio, Japanio, Usono, FR Germanio kaj aliaj landoj kaj regionoj.

En la laborejo de altforno, ĝia respondeculo informis al ni, ke la materialoj uzataj de la ŝtala entrepreno estas vanad-titana magnetito entenanta pli ol 30% da titana dioksido. Pasinte, ĉiuj studoj en la mondo opiniis, ke oni ne povas fandi en altforno la ercojn, kiam ties enteno de titana dioksido superis 16 procentojn. Tamen, la Panĝihŭa-a Ŝtala Kompanio trovis post fojrefoja eksperimento siajn apartajn fandometodon de vanad-titana magnetito kaj novan tektonikon de fando de vanado.

Nun la Panĝihŭa-a Ŝtala Kompanio jam komencis la duaperiodan konstruadon, al kiu oni investis 3 miliardojn da ĉinaj

jŭanoj. Post 7-jara konstruado, la ŝtala kompanio multigos ĝian jaran produktokvanton de fero, ŝtalo kaj ŝtalaĵoj respektive je miliono da tunoj kompare kun la produktopovo projektita en la unua periodo.

La Panĝihŭa-a Metalurgia kaj Mina Kompanio estas bazloko de materialo por la Panĝihŭa-a Ŝtala Kompanio. Ĝi kapablas liveri jare 13.5 milionojn da tunoj da vanada magnetito, 5.88 milionojn da tunoj da fajna vanada magnetito kaj 50 mil tunojn da fajna titana erco.

Atinginte Lanĝjan-ferminejon sub la kompanio, ni vidis, ke la montpinto alta je kelkcent metroj estis transformita en ebenan minekspluatejon, sur kiu kelkdek grandaj kamionoj enverŝas minaĵojn en grandan truon meze de la minekspluatejo. La respondeculo de la minejo nin sciigis, ke ĝi estas ŝakto por transporti minaĵojn. La du ekspluatejoj de Lanĝjan-minejo altas 500-600 m. super la tero kun tre krutaj deklivoj. Iuj alilandaj fakuloj opiniis, ke la sola elirejo estas konstrui spiralan fervojon ĉirkaŭ la monto. Sed tio multe pagigos, ke la gajno ne kovros la perdon. La projektintoj de Lanĝjan-minejo bone profitis de la tereno, kaj solvis la problemon per kombino de granda ŝakto, ebena tunelo kaj fervojo. Tiu saĝa elpensado estas tre malofta en la mondo, kaj multaj alilandaj metalurgiistoj laŭdis ĝin post la vizito.

URBO LAŬLONGE DE RIVERO

La urbo Dukoŭ aperis sekve de la konstruado de la Panĝihŭa-a ŝtala bazloko kaj jam fariĝis mezgranda urbo. Preskaŭ ĉiuj ĝiaj 410 mil loĝantoj en la urbo estas alilokanoj. En Dukoŭ



Nova biblioteko

montoj estas altaj kaj valoj profundaj, kaj starigi industrian urbon sur tia tereno sendube estas malfacilege. La projektistoj, farante ĉion elpenseblan, projektis, laŭ la terena kondiĉo, riĉfonto, dislokiĝo de fabriksdomoj kaj minejoj, la planon por la urbo, kiu en formo de ĉeno sidas ambaŭborde de Ĝinŝa-rivero. Nun jam konstruiĝis 8 kvartaloj el fabriksdomoj kaj loĝdomoj sendependaj unu de alia tamen interligitaj. Ĉi tiuj kvartaloj bordas la riveron je pli ol 50 km. kiel perloj inkrustitaj sur arĝenta rubando. Kvankam Ĝinŝa-rivero dividis la urbon en du partojn, sed ses pontegoj kun ĉefa spano de ĉ. 180 m. kunigas ambaŭ bordojn kaj faris la urbon neapartigebla. El la kelkdek urboj grandaj kaj mezgrandaj ĉe Jangzi-rivero Dukoŭ estas la urbo kun plej multaj pontoj.

De la plej okcidenta kvartalo Geliping ĝis la plej orienta Ĝinĝjang-a fervoja stacio, la plej profunde impresaj estas la intermiksitaj kampoj, vilaĝoj, fabriksdomoj kaj komercaj kvartaloj. Tie ne ekzistas evidenta limo inter fabriko, minejo kaj kamparo, nek drasta diferenco inter urboparto kaj antaŭurbo. Dukoŭ havas unikan stilon en sia dis-

pozicio de urbo. Larĝaj asfaltitaj vojegoj araneaĵe interkruciĝantaj kaj etendiĝantaj en ĉiujn direktojn, kunligas, kiel angioj, ĉiujn kvartalojn kaj loĝdomojn.

Altaj etaĝdomoj anstataŭis la kabanajn tegmentitajn per asfalta kartono, uzatajn en la komenco de la konstruado, meznombro ĉiu urbano havas 6 kvadratajn metrojn por loĝado. Estas multaj malfaciloj por konstruado de domoj. Iu respondeculo de la Urbo-konstrua Komitato de Dukoŭ informis al ni, ke por ĉiu kvadrata metro de konstruaĵo oni devas fosi meznombro 7 kubmetrojn da tero kaj ŝtono.

Dukoŭ donas sufiĉan atenton al la protekto kaj reformo de la medio. Ili alportis de malproksime multajn feniksarbojn kaj aliajn arbojn por verdigi la urbon kaj kalvajn montojn. Nun pli ol 30% de la tero de la urbo estis verdigitaj. Oni konstruis en la urbo plurajn parkojn. Mia akompananto el la Urbo-konstrua Komitato diris al mi: "Novembro ne estas konvena tempo por via vizito. Se vi venos en printempo aŭ somero, disvolviĝantaj kapokfloroj kaj violaj ruĝburĝonujoj ruĝigas la tutan urbon. Vere estas rava vidaĵo!"

□

Ĉu vi interesiĝas pri la ĉina kuirarto?

Ĉu vi volas lerni la preparadon de ĉinaj pladoj?


Jen estas 2 libroj tiuflankaj eldonitaj de la Ĉina Esperanto-Eldonejo, bonvolu legi:

KURACAJ MANGAĴOJ

Kompil. Ŭeng Ŭejĝjan k.a. Trad. Tan Ŝiŭĝu 1986.

64. 18.5 cm. 15-Es-2047P. £0,65
US\$1,25

Estas rekomendataj 87 receptoj de sanigaj trinkaĵoj, konfitaĵoj, pladoj k.a. Ĉe la fino troviĝas 3 apendicoj: Pri efikoj de ingrediencoj de la kuracaj manĝaĵoj, Tabelo pri ĉefaj nutroelementoj bezonataj de la homa korpo, Nutraĵoj taŭgaj kaj netaŭgaj por pacientoj. Kun koloraj bildoj.



ĈINAJ FAMILIAJ PLADOJ

Trad. Liŭ Cajŝeng. 1986. 80p. 18.5 cm.
15-Es-2061P. £1,10 US\$2,15

Ĝi enhavas 86 ĉinajn pladojn. Plejparto el ili estas ne nur nutraj, belkoloraj kaj bongustaj sed ankaŭ malkaraj kaj facile prepareblaj. Kun detalaj klarigoj la libro multe helpas al tiuj kiuj interesiĝas pri la ĉina kuirarto. Kun koloraj bildoj.

Mendu ĉe: **Libroservo de UEA**
Perantoj de EPC

aŭ **Esperanta Sekcio de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN) P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio**

Min kontentigis, ke vi agnoskas tiun vorton

En la n-ro 2 de EPC de tiu ĉi jaro aperis artikolo verkita de s-ano M.T. Popov sub la titolo "Kio estas omnicidio?" Poste, nia usona leganto, s-ano Ronald Glossop, atentigis s-ron John Somerville, kreinton de la vorto "omnicido", pri tiu artikolo, kaj la lasta skribis al ni anglalingvan leteron kunsendante materialojn pri la asocio IPPNO. Pere de la letero s-ro Somerville montris sinceran amikecon al la ĉina popolo kaj altan entuziasmon pri la laboro por interkompreniĝo kaj paco. S-ano Glossop afable esperantigis la leteron de s-ro Somerville kaj sendis al ni la tradukon, kiun ni nun publikigas sube. Al la du usonaj amikoj ni esprimas nian koran dankon.

Okaze de tiu ŝanco ni volas sciigi al vi, karaj legantoj, ke la ĉina registaro kaj la ĉina popolo ĉiam oponas kontraŭ la nukleaj armiloj kaj nukleaj militoj, kaj ke Ĉinio esploras kaj faras nukleajn armilojn nur por rompi la nuklean monopolon kaj sin defendi. La ĉina registaro plurfoje deklaris, ke Ĉinio neniam la unua uzos nukleajn armilojn kaj ĉiam klopodas por komplete nuligi ilin. La starpunkto de Ĉinio estas varme subtenata de la pacamaj popoloj de la mondo. Ni senĉese batalu kune kun la esperantistaro de la mondo por komplete muligi la nukleajn armilojn kaj defendi la mondpacon.

La Red.

La 30-an de marto 1987
Estimata redaktoro:

Mia amiko, Prof. Ronald Glossop, afable atentigis min pri la artikolo "Kio Estas Omnicidio?" en via gazeto (Februaro, 1987). Kiel kreinton de la vorto "Omnicide", min kompreneble treege kontentigis la informo, ke vi ĝin agnoskas ankaŭ en Esperanto. Kvankam estas vere, ke mi formis ĉi tiun vorton el la du latinaj radikoj, kiuj signifas "ĉiu(j)" kaj "mortigi," kiu fakto estas nur parto de la vero.

Mi verdire kreis la vorton kiel analogon de "sinmortigo" (angle "suicide"), tio estas, "la mortigo al si mem". Sekve, la preciza difino de "omnicido" estas "la mortigo fare de kelkaj homoj al ĉiuj homoj, inkluzive de la mortigantoj mem". Ni volis emfazi ke la nuntempa historie unika danĝero de omnicidio ne estas io minacata de potencoj aŭ kaŭzoj ekstere de la homaro mem sed

de tiuj armiloj, kiujn ni mem kreis. Se ni do nomas aferojn laŭ iliaj ĝustaj nomoj, tio helpos nin malebligi ĉi tiun krimon tiel grandegan laŭ ĝia fina rezulto ke ĝi povus esti farata nur unufoje, ĉi tiun pekon tiel nepripenseblan ke ĝi neniam ĝis nun eĉ havis nomon.

Bonvolu akcepti la enmetitajn materialojn pri nia lastatempe formita asocio Internaciaj Filozofoj por la Malebligo de Nuklea Omnicidio (angle "International Philosophers for the Prevention of Nuclear Omnicide," "IPPNO"), al kiu iniciato ni invitas la kunlaboron de ĉinaj filozofoj kaj kleruloj. Prof. Glossop, kiu estas ano de nia konsilantaro, estas esperantisto, kaj ni intencas agi laŭ lia bonega rekomendo ke la revuo de nia asocio, IPPNO Journal of International Dialogue, inkluzivu esperantajn resumojn de la artikoloj, kiujn ĝi aperigos. Li ankaŭ afable

konsentis traduki ĉi tiun leteron el la angla en Esperanton kaj sendi al vi kopion. Ĉiuj el ni alte taksus la publikigon de ĉi tiu letero en via gazeto kiel la komencon de daŭra dialogo cele al pli vasta reciproke interkompreniĝo kaj paco sur la tergloblo.

Kun ĉiuj bondeziroj al vi kaj viaj kolegoj,

Sincere via
Prof. John Somerville,
Prezidanto de IPPNO

Poŝtmarkoj pri la klasika dramo "La Okcidenta Ĉambro"

de LU DONG

"La Okcidenta Ĉambro" estas fama ĉina klasika dramo verkita de la fama dramisto Ŭang Ŝifu de Ĵian-dinastio (1206-1368). La dramo rakontas pri la amafero de Ĝang Ĝjunĵuj kaj Cuj Jingjing, kiuj rompintis la katenon de feŭdisma etiko por gajni liberecon de edziĝo. La poŝtmarkoj prezentas ĉefajn intrigojn de la dramo: Admiro de Ĝang pri la beleco de Cuj (supre maldekstre), Subaŭskulto de Cuj al muzikilludo de Ĝang (supre dekstre), Rendevuo en la Okcidenta Ĉambro (sube dekstre), Adiaŭo ĉe la Adiaŭa Kiosko (sube maldekstre) kaj



Torturo al ĉambristino Hongnjang (miniatura folio). La serio estis emisiita en la 21-a de februaro 1983.





La Tri Pagodoj en Junnan

Foto de HŬANG TAŬPENG